

**Budhismaj Tradukoj**

佛学世界语译丛

(2)

**AMO AL LA VIVOJ**


**戒杀护生故事集**

Esperantigis Miaohui

Voĉlegis Zhao Jianping

妙慧世译

赵建平配音



Budhana Retejo Esperantista

佛学世界语网



Budhismaj Tradukoj 2  
佛学世界语译丛 2

AMO AL LA VIVOJ  
戒杀护生故事集

Angle verkita de T. B. Talovich  
Esperantigis Miaohui  
Voĉlegis Zhao Jianping  
妙慧翻译  
赵建平配音

Budhana Retejo Esperantista  
世界语佛学网  
<http://www.budhano.cn>  
[miaohui@budhano.cn](mailto:miaohui@budhano.cn)

Rimarko:

Ĉe ĉiu titolo estas kvadrata kodo, per kiu vi povas aŭdi la koncernan voĉlegon de s-no Zhao Jianping dum via legado se vi skanas ĝin per via poŝtelefono.

提示:

每个标题旁边都有二维码。阅读时用手机扫描二维码，则可以收听赵建平老师的配音

# TABELO DE ENHAVO

## 目录页

Enhavo de Esperantaj Rakontoj.....	I
Enhavo de Ĉinlingvaj Rakontoj.....	VII
世界语版故事目录 .....	I
汉语版故事目录 .....	VII



# ENHAVO

Antaŭparolo.....	1
1. La ploranta simio.....	4
2. Dankemo de testudo.....	9
3. Reĝo Cheng Tang kaj la reto.....	14
4. Zi Chan kaj la fiŝoj.....	18
5. Jadbastona supo.....	21
6. Dankema cervo.....	25
7. Savi la fiŝojn.....	29
8. Rekompenco de paruo.....	33
9. Savi kolombon.....	37
10. Angiloj en la urno.....	41
11. Lango de Granda Xu.....	45
12. Trimonata sufero.....	48
13. Ermito kaj birdo.....	51
14. Vivliberiga laĝeto.....	54
15. Viro sentima al morto.....	58
16. Savi drakan filon.....	63

17. Rakonto de ŝramanero.....	67
18. La patrino cervo.....	72
19. Aliformiĝinta fiŝo.....	76
20. La deka kaj la unua.....	81
21. Entombigo farita de birdoj.....	86
22. Generalo Maŭ kaj la testudo.....	90
23. Abeloj kaj miskondamnito.....	94
24. Longvivo, feliĉo kaj honoro.....	99
25. Majstro Huinen.....	104
26. Kadavroj de bestoj.....	108
27. La lango de kapro.....	112
28. Puno pro krueleco.....	117
29. Kuracisto testudo.....	120
30. Bravaj kokoj.....	124
31. Kompatemo al vivestaĵoj.....	128
32. Ideala festeno por naskiĝtago....	132
33. Sorto ŝanĝebla.....	136
34. Plilongigi vivon.....	140
35. Seninfana riĉulo.....	144
36. Valora vivo.....	148



37. Malfeliĉa rakonto.....	151
38. Terura morto.....	154
39. Terura festeno.....	158
40. Vizito de animokolektanto.....	162
41. Farmulo kaj serpento.....	165
42. Venĝo de angiloj.....	168
43. Veneno Wang.....	171
44. Favoro al helikoj.....	175
45. Prezo por kontraŭleĝo.....	179
46. Ekzekuto de angiloj.....	183
47. Mono sangomakulita.....	186
48. Birdoj omaĝaj al imperiestro.....	190
49. Imuneco sen vakcinado.....	194
50. Venĝo de ranoj.....	198
51. Kuirata testudo.....	203
52. Forto de kompatato.....	207
53. Sinjorino Kun.....	211
54. Semado kaj rikolto.....	215
55. Unu vivo kontraŭ cent.....	219
56. Sovaĝaj anseroj.....	223

57. Perlo donacita de serpento.....	227
58. Servistino savita de testudo.....	231
59. Resaniĝo de Li Jingwen.....	236
60. Bonkora oficisto.....	240
61. Majstro Xin.....	244
62. Rakonto pri cerva bambuo.....	248
63. Majstro Lianchi kaj skolopendro.....	255
64. Esti bovo por dek unu vivdaŭroj.....	260
65. Plugadi kiel Bovo.....	265
66. Viro kun bova kapo.....	270
67. Gustumi bovaĵon.....	274
68. Morto de la buĉisto.....	278
69. Buĉista dio.....	283
70. Buĉisto stufita.....	287
71. Savi bubalon.....	291
72. Skurgado de dio.....	295
73. Venĝo de Mortinta Hundo.....	299
74. Hundiĝo.....	303

75. Lerta pafisto.....	307
76. Kvar ĝemelaj hundidoj.....	311
77. Virinoj en porkejo.....	315
78. Ekzekuto de tondro.....	320
79. La vizaĝo de buĉisto.....	324
80. Tipa akcidento en ĉasado.....	329
81. Tria vulpeto.....	333
82. Foko en rivero.....	338
83. Kaŭzo de mortigita koko.....	343
84. Ruĝaj ŝnuroj.....	348
85. Konscienco de ĉasisto.....	352
86. Zhao Qun kaj rivera testudo.....	356
87. La genuoj de Maljuna Xu.....	361
88. Feliĉaj kraboj.....	366
89. Kiso de abelo.....	371
90. Morto de Jiu la Kvardeksesa.....	375
91. Avideco.....	380
92. Feliĉa homo.....	384
93. Vojaĝo al la ĉielo.....	388
94. Reviviĝo el morto.....	393

95. Vortoj de saĝulo.....	398
96. Dankemo de ranidoj.....	403
97. Savinto de maljuna kokino.....	408
98. Mesaĝo sendita de testudo.....	412
99. Senrankoriĝo per budhismo.....	416
100. Plej bona donaco.....	421
Postskribo.....	424
Pri la esperanta traduko.....	442

# 戒杀放生文集

戒杀放生文 .....	449
戒杀文 .....	449
戒杀祝愿 .....	453
放生文 .....	454
放生祝愿 .....	465

# 戒杀护生故事集

一、悲猿下泪 .....	467
二、救龟封侯 .....	467
三、成汤解网 .....	468
四、子产畜鱼 .....	469
五、护生益寿 .....	470
六、救麋免难 .....	471
七、取象囊泉 .....	472
八、救雀受环 .....	473
九、佛肉喂鹰 .....	474
十、鳝鱼乞命 .....	475
十一、牛刀断舌 .....	476
十二、三月哀号 .....	476

十三、护栖怀鸟 .....	477
十四、凿池放生 .....	478
十五、赎生得度 .....	479
十六、救龙得笈 .....	480
十七、沙弥救蚁 .....	481
十八、母鹿断肠 .....	482
十九、屈师纵鲤 .....	483
二十、大魁天下 .....	483
二十一、禽鸟助葬 .....	484
二十二、放龟免溺 .....	485
二十三、救蝇免刑 .....	486
二十四、魂超天界 .....	486
二十五、守网放兔 .....	487
二十六、饷即埋葬 .....	488
二十七、写经释冤 .....	489
二十八、断舌累子 .....	490
二十九、鳖疗奇疾 .....	490
三十、鸡啄虎目 .....	491
三十一、仁慈救劫 .....	492
三十二、寿筵良范 .....	493
三十三、定数可回 .....	493
三十四、放生延生 .....	494
三十五、挽回造化 .....	495
三十六、再生受福 .....	496

三十七、残杀恶死 .....	497
三十八、恶死可怕 .....	497
三十九、顷时万死 .....	498
四十、戒杀免勾 .....	499
四十一、杀蛇害子 .....	500
四十二、鳝鱼啮臂 .....	501
四十三、悍毒断舌 .....	501
四十四、扫螺种福 .....	502
四十五、捕蛙业报 .....	503
四十六、凶残显报 .....	503
四十七、孽钱食报 .....	504
四十八、死不蔽辜 .....	505
四十九、生杀显报 .....	506
五十、田鸡索命 .....	506
五十一、杀鳖烹身 .....	507
五十二、慈移定数 .....	508
五十三、杀生分途 .....	509
五十四、鼋来索命 .....	501
五十五、仁贤致福 .....	511
五十六、雁痛生离 .....	511
五十七、放蛇得珠 .....	512
五十八、鳖疗婢疾 .....	513
五十九、水族解毒 .....	514
六十、鱼族送行 .....	515

六十一、信师祷雨 .....	515
六十二、放狐脱灾 .....	516
六十三、蜈蚣听经 .....	517
六十四、十一世牛 .....	518
六十五、魂受牛苦 .....	519
六十六、人何牛首 .....	520
六十七、雷火烧身 .....	521
六十八、杀牛倾家 .....	522
六十九、屠牛现报 .....	522
七十、凶杀投斧 .....	523
七十一、果决成仁 .....	524
七十二、鞭骨全碎 .....	525
七十三、一口咬死 .....	526
七十四、临终作狗 .....	527
七十五、火枪回击 .....	528
七十六、循环救护 .....	529
七十七、宰猪恶报 .....	529
七十八、雷击贪残 .....	530
七十九、屠羊变羊 .....	531
八十、射鹿杀子 .....	532
八十一、戕狐种火 .....	533
八十二、陈四该死 .....	534
八十三、祭祀杀生 .....	535
八十四、嗜鸡偿报 .....	536



八十五、业病挽回 .....	537
八十六、放生赎罪 .....	538
八十七、火余痛发 .....	539
八十八、放生昌后 .....	540
八十九、残暴速死 .....	541
九十、杀蚁显报 .....	542
九十一、贪馋果报 .....	543
九十二、行仁子贵 .....	544
九十三、持斋功夫 .....	545
九十四、广劝颐罪 .....	546
九十五、杀劫由来 .....	546
九十六、蝌蚪报恩 .....	547
九十七、救鸡救己 .....	548
九十八、大鼋传书 .....	549
九十九、佛法解冤 .....	550
一百、闻经升天 .....	551
附录：翻译印赠缘起 .....	553



# Antaŭparolo



Bonvenon

Baldaŭ vi iros en malsaman mondon, kaj mi certas, ke vi preskaŭ neniom scias pri ĝia ekzisto.

Kvankam plej multe da historioj legotaj de vi okazis en Ĉinio, tamen la similaj aferoj okazas ĉe vi ĉiutage. Tiaj aferoj okazas al vi, al mi, al viaj familianoj kaj instruistoj, kaj ankaŭ al ĉiuj aliaj vivestaĵoj en la mondo.

Eble vi ne rimarkis ilin pro via nekompreneo, kaj eĉ se vi komprenis, vi malatentis ilin pro tio, ke vi neniam lernis kiel observi.

Tiujn historiojn oni rakontis tre malofte ekster Ĉinio. La okazaĵoj en la libro malfermis novan kampon por via pensado, do vi devas malfermi viajn okulojn kaj pretigi vin por lerni. Eble iujn el la historioj vi ne komprenas,

kaj la aliajn vi eĉ ne kredas. Sed ĉiuj historioj estas ne falsaj.

Ili estas veraj, ĉar ili estas simplaj priskriboj pri la leĝoj de la universo. La nunaj sciencistoj jam scias bone, kiel la suno helpas plantojn kreski, kaj kiel la luno kaŭzas tajdojn. Ili ankaŭ scias multe pri aliaj ĉiutagaj aferoj, kiuj estas malfacile rimarkeblaj kaj estis tute ne konataj de ni antaŭe. Tamen iuj el tiaj aferoj estis bone konataj en aliaj landoj antaŭ sufiĉe longa tempo. Kvankam iujn aferojn la sciencistoj ankoraŭ ne rimarkas, tamen tio ne signifas, ke ili estas malveraj. Tio ja signifas, ke ili ankoraŭ atendas nian esploradon.

Ĉiu historio donas al vi gravan lecionon. Se vi lernos tiujn lecionojn sufiĉe bone, vi povos ĝui grandajn bonfarton, inteligentecon kaj feliĉon.

Se vi ignoras la lecionojn, kaj malobservos la leĝojn de la universo..., eble iam vi fariĝos viktimoj en la

cent-unua rakonto.

Ĉu vi estas pretaj? Bone, ni komencu!

# 1. La ploranta simio



Printempon antaŭ tre longa tempo, militĉaroj veturis rapide sur ebenaĵo. La kirasoj de la militistoj brilis sub la suno kaj la standardoj flirtis en milda brizo.

La generaloj rajdis malantaŭe tenante glavon aŭ lancon en la mano, kaj ilin sekvis belega ĉaro, en kiu sidas la granda reĝo de Chu-regno (Ĉu).

Ĉiujare la reĝo gvidis armeon inspekti sian regionon, ĉasi, aŭ trejni la soldatojn, forlasante la enuige malnovan palacon.

La reĝo havis generalon nomatan Yang Youji (Jan joughji), kiu famis pro sia arkopafado. Eĉ en la nuna tempo oni ankoraŭ memoras kiel bone li pafis per pafarko. Li neniam maltrafis. La reĝo tre fidis al li. Dum la ĉasado kunikloj, cervoj kaj ĉiuj aliaj

animaloj fuĝis tien kaj reen terurite, tamen nenie ili kapablis sin kaŝi for de la sagoj de Generalo Yang. Se li pafis cent fojojn, li trafis dekoble dek fojojn...

Arbo granda kaj maljuna staris en la ebenaĵo. Kiam la soldatoj pasis preter ĝi, ili aŭdis bruon kaj vidis simion sur la branĉoj supre. Ĝi saltadis malrespekte, mokadis la ĉasantajn soldatojn kaj eĉ ĵetis nukson al ili.

"Bonege, beluleto! Mi donu al vi lecionon," diris iu arkopafisto dum li celis sian pafarkon al la simio. Sed je lia pafo, la simio sin flankenigis per artifiko, tiel ke la sago flugis sentrafe en la aeron. Tio kaŭzis ridegon el la militistaro.

"Jen hazardo. Gardu la alian!" Li pafis alifoje, sed la simio ne plu provis eviti la sagon. Anstataŭe, ĝi kaptis la flugantan sagon, snufis malestime kaj rompis en du pecojn.

La soldatoj freneziĝis de kolero. Ili pafadis al ĝi, tamen ĝi reagis sagace kaj lerte. Ĝi kaptadis iliajn sagojn en la aero kaj mokis ilin desplie.

Kiam la reĝo vidis la malestiman simion, li ordonis Generalon Yang pafi ĝin.

La simio ŝajne ekkomprenis la situacion. Tuj kiam Generalo Yang rajdis al la arbo, ĝi ekploris. Ĝi ploris kaj kriis korŝire kun torentaj larmoj sur la vizaĝo.

La reĝo demandis mirigite: "Pro kio la simio ploras?"

Generalo Yang respondis: "Eble ĝi scias, ke miaj sagoj neniam maltrafas. Do kiel lerta kaj sagaca ĝi estas, ĝi ne povos eviti morton pro la ordono de Via Moŝto. Jen kial ĝi ploras."

La reĝo mallevis la kapon kaj enpenŝiĝis: "Kiel malĝoja estas la simio! Ĉiuj aliaj animaloj suferas same!" Kompato estiĝis kaj regis en la koro de Lia Moŝto. Li ordonis, ke



Generalo Yang demetu sian armilon, kaj haltigu la armeon por ke la animaloj ne plu suferu de la ĉasado.

Li anticipe revenis al la ĉefurbo. Oni informiĝis, ke la reĝo emociiĝis de simiaj larmoj. Ĉiuj en la regno sin opiniis feliĉaj sub la regado de tiel bonkora kaj amema reĝo, ili do laboradis despli diligente por sia regno. Ekde tiam Chu-regno estis prospera kaj potenca dum centoj da jaroj.



## 2. Dankemo de testudo



Aĝulo Kong Yu (Kun Ju) loĝis en Shanyin-gubernio (Ŝanjin) en Jindinastio (Ĝin) dum la kvara jarcento. Li estis ŝtata oficisto, tamen li sin vivtenis tre malfacile pere de siaj malplej altaj rango kaj salajro.

Foje, kiam li vidis testudon mortigota por kuiri, li sentis grandan kompaton al ĝi. Li do aĉetis kaj portis ĝin al rivero, kaj lasis ĝin libera.

Ŝajne la testudo bone komprenis, ke Kong Yu savis ĝian vivon. Ĝi do senĉese turnis sian kapon por rigardi al li. Kong Yu najlis sian rigardon al la testudo ĝis kiam ĝi malaperis el lia vidkampo.

Plurajn jarojn poste Kong Yu promociiĝis al pli alta rango. Gvidante sian armeon, li sufokis ribelon, kaj pro la brila sukceso la reĝo nomumis lin Lordo de la kortego. Tio estis alta

rango en tiu periodo.

La oficista atestilo por Lordo estis metala sigelilo. Je la promociiĝo de Kong Yu, la kortegaj metiistoj ekmuldis sigelilon por li. Sed ili trovis eksteratende, ke la sigelilo elmuldiĝis en la formo de retrorigardanta testudo. Ili opiniis tion stranga, kaj refandis ĝin por fari la novan, sed la nove elmuldata sigelilo ankoraŭ similis al retrorigardanta testudo. La metiistoj provadis foje kaj refoje, kaj ĉiuj el ili inspektis la muldadon, sed ĉiufoje, la nove farita sigelilo aspektis tiel, kiel testudo turnis sian kapon malantaŭen por ion rigardi.

Tio mirigis la metiistojn. Ili do decidis viziti la novan lordon por peti lian instruon. Ili genuiĝis antaŭ li kaj raportis: "Via Lorda Moŝto. Lia Reĝa Moŝto ordonis nin muldi sigelilon kiel atestilon por via nova posteno, tamen la supra parto de la nova sigelilo ĉiam havas formon de retrorigardanta

testudo je la muldiĝo."

"Daŭrigu," diris Kong Yu, "kaj muldu ĝin denove."

La metiistoj agis laŭ lia ordono, tamen alifoje, la elmuldita sigelilo formiĝis same kiel antaŭe. Tio konfuzis Kong Yu. La informo pri tiu strangaĵo diskoniĝis ĉie, kaj eĉ atingis la reĝon.

La reĝo alvenigis Kong Yu por informiĝi, pro kio la sigelilo ĉiam elmuldiĝas en formo de testudo, sed Kong Yu havis nenian ideon pri tio.

Hejmenirante, la lordo subite rememoris

antaŭan okazaĵon. En la sekva tago kiam li estis en la palaco, li raportis al la reĝo: "Via Reĝa Moŝto, mi, via humila subulo, pensis pri la sigelilo en formo de testudo, kaj probable trovis la kaŭzon.

"Antaŭ multaj jaroj, mi hazarde vidis fiŝkaptistojn kuirontaj kaptitan testudon, kaj sentis grandan kompaton

al ĝi. Mi do aĉetis kaj forliberigis ĝin en riveron. La testudo ŝajne bone komprenis, ke mi savis ĝian vivon, ĝi do naĝis al la akvosupro kaj senĉese fiksis sian rigardon al mi retroturninte la kapon, same kiel la formo de tiu ĉi sigelilo.

"Via Reĝa Moŝto promociis min al la pozicio de Lordo, kaj ankaŭ la lorda sigelilo havas formon de testudo. Verŝajne, tio aludas, ke la alta rango, per kiu Via Reĝa Moŝto favoris min, venis de la testuda dankemo. Eble mia bonkora konduto emociis la Ĉielon."

La reĝo do diris al siaj korteganoj: "Tiuĵ, kiuj faris bonon, rikoltas bonon. Lordo Kong Yu estas bona ekzemplo por tio."



### 3. Reĝo Cheng Tang kaj la reto



Antaŭ pli ol 3000 jaroj vivis bonkora kaj eminenta reĝo nomata Cheng Tang (Ĉen Tan). Ĉiujare li inspektis sian regnon kaj vizitis ĉiujn siajn regnantojn por konstati, ĉu li povas ion fari por ili.

Iun belan tagon, la birdoj kantis senĝene kaj la bestoj ĝuis plaĉan veteron libere. La reĝo ridetis kiam li aŭdis iliajn plezurajn voĉojn. Tiam li ekvidis larĝan reton kovranta la lokon, kie ĉiuj preterpasantaj animaloj povus esti kaptitaj. Li aŭdis ĉasiston preĝi laŭte:

"Ĉiuj birdoj en la ĉielo, Ĉiuj animaloj sur la tero,

Ĉiuj animaloj de la nordo, okcidento, oriento kaj sudo,

Venu en mian reton, kaj neniu el ĝi forfuĝu plue."



La reĝo Cheng Tang maltrankviliĝis vidante tiel avidan kaj senkoran ĉasiston, sed kiel saĝa budhano, li ne ordonis la ĉasiston ĉesigi la ĉasadon. Anstataŭe, per sia reĝa mano li malfermis tri flankojn de la reto, kaj lasis nur unu fermita.

La ĉasisto ne povis diveni, kion faras la reĝo, kaj ankaŭ ne kuraĝis haltigi lin. Tiam li aŭdis la reĝon preĝi laŭte:

"Trapasu tiuj, kiuj volas trapasi la reton de dekstre;

Trapasu tiuj, kiuj volas trapasi la reton de maldekstre;

Trapasu tiuj, kiuj volas trapasi la reton de supre;

Trapasu tiuj, kiuj volas trapasi la reton de malsupre.

Nur tiuj, kiuj ne plu volas daŭre vivi, venu en mian reton."

La ĉasisto ekkonsciis pri siaj avideco kaj senkoreco. Li do rakontis al ĉiuj, kiel bonkora estas la reĝo. Ĉiuj

popolanoj ekhavis fidon je la reĝo Cheng Tang.

Shang-dinastio (Ŝang) fondita de Imperiestro Cheng Tang regis Ĉinion pli ol 600 jarojn.



## 4. Zi Chan kaj la fiŝoj



Antaŭ pli ol 2500 jaroj, Zi Chan (Zi Ĉan) estis ĉefkortegano en Zheng-regno (Ĝen) dum la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-475 A.K.). Konfuceo iam laŭdis lin pri lia moraleco. Nun la ĉinoj ankoraŭ honoras lin pro liaj saĝo kaj bonkoreco. Li emis helpi la malriĉajn kaj savi la suferantajn el danĝero. Li emis fari bonajn agojn kaj ĉiam evitis mortigi vivestaĵojn.

Iutage lia amiko donacis al li plurajn vivajn fiŝojn. El ili oni povus fari bongustan manĝaĵon. Zi Chan akceptis la donacon ĝojplene kun granda dankemo. Poste li alvenigis la servistinon.

"Portu la fiŝojn kaj liberigu ilin en la fiŝ-lageton en la korto."

La servistino diris: "Honora Mastro, la fiŝoj estas vere raraj. Se

vi metus ilin en la fiŝ-lageton, la fiŝviando fariĝos malmola kaj ankaŭ malpli bongusta, ĉar la lageto estas ne tiel klara kiel la roĝo. Ni devus kuiri ilin senprokraste!"

Zi Chan ridetis kaj respondis: "Mi estas la mastro, do obeu min. Kiel mi povus mortigi la fiŝojn tiel kompatindajn kaj senkulpajn pro ilia bongusteco? Mi ne povas toleri tion."

La servistino do obeis la ordonon. Post kiam ŝi metis la fiŝojn en la lageton, ŝi diris al ili: "Vi estas vere bonsortaj. Se vi estus donacitaj al aliulo anstataŭ al mia mastro, nun vi jam estus kuirataj en la kaldrono."



## 5. Jadbastona supo



En Wenzhou-urbo (Ŭengôŭ), Zhejiang-provinco (Ĝêĝjan) estis knabo nomata Xiao Zhen (Ŝjaŭ Ĝen). Iunokte li songĝis, ke dio en ora kostumo venis al li kaj diris: "Vi nur povos vivi ĝis dek ok jaroj, knabeto." Li eksentis timon post vekiĝo. Li malĝojis, ke li devos morti tiel juna.

La patro de Xiao Zhen estis registara oficisto. Pro sia honesteco, li estis promociita kaj sendita al Sichuan-provinco (Siĉuan) malproksime de sia hejmloko. Xiao Zhen ne volis forlasi la hejmon, ĉar li sciis bone, ke li ne povos vivi longe. La patro sciis nenion pri lia songo kaj insistis, ke li iru kune.

Je la tago post kiam la patro venis al sia posteno, la lokaj oficistoj festenis por bonvenigi lin, kaj ankaŭ Xiao Zhen estis invitita. Kiel kutime, en la

speciala festeno post tri pladoj sekvis la ĉefa manĝaĵo nomata "jadbastona supo".

La metodo por fari la jadbastonan supon estis tre kruela. Oni ĝisruĝe ardigis feran bastonon kaj penetrigis ĝin en mamon de bovino por ke la lakto koaguliĝu al ĝi. Kiam oni eltiris la bastonon, ĝi vidiĝis kiel blanka jado. Iuj opiniis, ke la supo el la koaguliĝinta lakto estas tre bongusta.


Dum Xiao Zhen atendis la festenon, li hazarde iris en la kuirejon. Tie li vidis bovinon ŝnure ligitan al kolono kaj feran bastonon ardigatan en brulanta forno. Li demandis pri tio al kuiristo, kaj la kuiristo respondis, kion ili faros. Informiĝinte pri tio, Xiao Zhen hastis al sia patro kaj petis, ke li haltigu ilin. Li diris: "Oni penetrigos ruĝe ardigatan bastonon en mamon de bovino por fari bongustan manĝaĵon, tamen, kiel dolore suferos la bovino. Paĉjo, bonvolu haltigi ilin. Ne lasu ilin



fari tiel teruran manĝaĵon!"

Lia patro estis bonkorulo, do li senprokraste ordonis ilin ŝanĝi la menuon kaj liberigi la bovinon. Post pluraj noktoj la dio en ora kostumo denove venis en la sonĝon de Xiao Zhen. Ĉifoje li diris kun ĝojo: "Knabeto, vi faris bonan aferon kaj ne plu mortos juna. Kaj krome, vi sukcesos en la kortega ekzameno kaj fariĝos unu el la plej altaj oficistoj en Ĉinio. Tio estos la rezulto de via bona konduto."

Xiao Zhen plenkreskiĝis kaj vere gajnis altegan pozicion en la kortego, kaj krome li vivis ĝis pli ol naŭdek jaroj.



## 6. Dankema cervo



Klara roĵo fluis preter la domo sidanta inter belaj floroj en verda arbaro.

La suno brilis en la blua ĉielo. Malgranda knabo sin amuzis en la korto de la domo. Subite cervo entrudiĝis en la korton. Ĝi hokis la knabeton je la vestaĵo per korno kaj portis lin eksteren. La timigita knabeto ekploregis plengorĝe. Aŭdinte tion, lia patrino elkuris kaj vidis, ke cervo kuras al la montaro portante ŝian infanon.

La terurita patrino tuj postkuris la cervon per sia tuta forto. Baldaŭ ŝi trovis, ke la knabeto sidas sekure en la herbejo. Kiam li vidis la patrinon, li ekridis kaj etendis la brakojn al ŝi. La patrino ĉirkaŭprenis lin en la sinon kaj eklarmis de ĝojo.

Ŝi hastis hejmen kun sia karuleto.

Sed atinginte la domon, ŝi haltis stupore antaŭ la vidaĵo. Apenaŭ ŝi elkuris por atingi la cervon kaj infanon, falis arbego malantaŭ la domo kaj detruis ĝin. Ĉiuj muroj kaj tegoloj de la domo dispeciĝis pro la arbego. La hundo kaj kokinoj en la domo mortis pro la katastrofo. Se ŝi restus en la domo kune kun sia infano, ili certe...

Tiam la patrino ekmemoris okazaĵon de la pasinta jaro. Iutage cervo subite entrudiĝis en ŝian domon por sin savi de ĉasisto. Ŝi sentis kompaton al la kompatinda animalo, kaj tuj kaŝis ĝin per eluzitaj kostumoj. Kiam la ĉasisto enkuris, li ne sukcesis trovi la cervon, kaj opiniis, ke ĝi jam elkuris tra la posta pordo. Do li hastis eksteren por daŭrigi la serĉadon. Kiam la ĉasisto estis malproksima de la domo, ŝi ellasis la cervon, por ke ĝi reiru en la arbaron.

Ŝajne la cervo bone komprenis,

ke ŝi savis ĝian vivon. Post kiam ĝi eliris, ĝi kapklinadis al ŝi senĉese, esprimante sian dankon por ŝia bonkoreco.

Ŝi neniam antaŭvidis, ke la cervo povus memori ŝian helpon. Kiam la cervo iamaniere sciis, ke la arbego falos rekte kontraŭ ŝin, ĝi revenis por rekompenci la favoron de sia savinto.

Kiam la patrino rememoris ĉion ĉi, ŝi diris: "Savi alies vivon ja signifas savi la propran."



## 7. Savi la fiŝojn



Antaŭ 2000 jaroj en antikva Hindio fluis rivero, ĉe kiu estis lageto plena de fiŝoj. La fiŝoj vivis feliĉe en la klara akvo, kaj ili saltetis, naĝis kaj flosis laŭplaĉe por amuziĝo.

Ne pluvis dum longa tempo. La akvo vaporiĝis tagon post tago, kaj ĝis fine la lageto preskaŭ sekiĝis. Se la lageto estos sekiĝinta, ĉiuj fiŝoj perdos sian vivon sub la varmega suno.

La suno daŭre bakis la sekan teron. Iutage, maljunulo hazarde piediris preter la lageto. Vidinte la preskaŭ sekiĝintan lageton, li eksentis maltrankvilon kaj kompaton en la koro. Li do iris al la reĝo kaj raportis: "La akvo de la fiŝa lageto preskaŭ sekiĝis, kaj la fiŝoj estas en granda danĝero. Se plaĉas al Via Moŝto, bonvolu sendi dudek elefantojn porti akvon por savi la kompatindajn

fiŝojn."

La reĝo estis pia budhano. Aŭdinte la peton de la maljunulo, li respondis afable: "Estas laŭdinde, ke vi havas tiel kompateman koron. Iru al la reĝa elefantejo kaj uzu laŭplaĉe tiom, kiom vi bezonas por porti akvon."

Konsentite de la reĝo, la maljunulo kaj liaj du filoj iris al la reĝa elefantejo kaj elektis dudek el la plej bonaj elefantoj. Ili iris unue al vinejo kaj depruntis laŭeble plej multe da ledajn sakojn— tiam en Hindio la ledaj sakoj estis uzataj por teni vinon. Ili atingis la riveron, ensakigis akvon, portis la pezajn sakojn per la elefantoj kaj verŝis la akvon en la fiŝan lageton.


Post ilia foja kaj refoja akvoportado, la lageto pleniĝis tiom, kiom antaŭe. La fiŝoj en la lageto estis savitaj. Ili denove saltetis, naĝis tien kaj reen kaj sin amuzis ĝojplene.

Vidante la ĝojplenajn fiŝojn kaj la ondetojn kaŭzitaĵojn de ili, la maljunulo



sin liberigis el la longa maltrankvilo.

Je la noktiĝo, li revenis kune kun siaj filoj kaj raportis tion al la reĝo.



## 8. Rekompenco de paruo



En la periodo de Han-dinastio antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj vivis familio Yang (Jan) ĉe la piedo de Huaying-montaro (Hŭajin). Ili estis kamparanoj, kaj havis unusolan filon nomatan Yang Bao (Jan Baŭ, "Baŭ" signifas "trezoron" en la ĉina lingvo).

Yang Bao estis ne nur saĝa kaj bonkora, sed ankaŭ bela kun delikataj brovoj kaj brilaj okuloj. Liaj gepatroj forrazis liajn harojn krom du tufojn postlasitajn sur la verto kaj ligis ilin en du tuberojn. Ĉiuj opiniis, ke li estas sprita kaj inteligenta.

Yang Bao amis naturon kaj ofte ludis en la arbaro de Huaying-montaro. Foje en sia 9-a jaraĝo, kiam li ludis ekstere, li hazarde aŭdis panikan vokrion de supre. Li levis la kapon kaj vidis, ke strigo kaptis paruon. Ekvidinte la knabon,

la timigita strigo forlasis la paruon. La paruo falis sur la teron de supre, kaj kuŝis tie senmove, perdinte la konscion.

Formikoj alvenis por forporti la paruon kiel manĝaĵon, sed la vundiĝinta paruo ne povis sin savi de ilia atako. Yang Bao alkuris, prenis la paruon en la manon kaj forigis la formikojn. Li portis la paruon hejmen kaj metis ĝin en bambuan kaĝon.

Li tre ŝatis la birdeton, flegis ĝin per krizantemaj petaloj kaj kuracis ĝian vundon. Kiam ĝi tute resaniĝis kaj kapablis flugi, li lasis ĝin libera en la arbaro.

"Jen vi denove liberas. Atentu pri la strigoj. Ĝis revido!"

Nelonge poste, li havis strangan sonĝon en iu nokto. Knabeto en bruna kostumo venis danki lin pro la savo. Li donacis al Yang Bao kvar braceletojn el blanka jado, dirante: "Mi estas servisto de Ĉiela Reĝino.

Vi savis mian vivon. Mi donacu al vi braceletojn el valoraj jadoj por esprimi miajn dankon kaj ankaŭ bondeziron, ke viaj posteuloj estu senmakulaj kiel puraj jadoj kaj prenu la plej altajn postenojn en la kortego."

Yang Bao intencis fordanki la donacojn, sed pro la insistado de la malgranda knabo, finfine li akceptis ilin. Vekiĝinte, li trovis, ke tio estis nur sonĝo.

"Tio ja estas stranga sonĝo," li pensis skuante la kapon.

Poste, la filoj, nepoj, pranepoj kaj prapranepoj de Yang Bao vere kondukis senmakule kiel puraj jadoj kaj okupis la plej altajn rangojn en la kortego.



## 9. Savi kolombon



Estis tago serena kaj bela.

Budho piediris tra la arbaro. Li vidis grandan aglon ĉasanta kolombon. Apenaŭ la aglo plongis por kapti la kolombon, la kolombo vidis Budhon kaj tuj sin kaŝis en lian sinon. Budho protektis ĝin de la aglo. La aglo alflugis sur branĉon kaj kriis: "Vi kapablas savi la kolombon, tio signifas mortigi min de malsato. Vere malica vi estas!"

Budho respondis afable: "Diru al mi, kion vi volas manĝi. Tion mi donu al vi."

La aglo respondis: "Mi manĝas viandon." Budho elprenis tranĉilon kaj tranĉis pecon da karno el sia brako. Li donis ĝin al la aglo, sed la aglo plendis: "La karno de la kolombo estas pli multa." Budho do tranĉis alian pecon. Tiel post foja kaj

refoja detranĉado, la karno restis pli kaj pli malmulta sur la brako. Fine, li detranĉis ĉion el sia brako, sed tio estis ankoraŭ malpli peza ol la kolombo.

La aglo demandis Budhon: "Ĉu vi bedaŭras pro la difekto al via propra brako?"

Budho respondis: "Mi neniel bedaŭras pri tio. Mia tasko estas savi ĉiujn vivestaĵojn en la mondo. Kio gravas, se mi perdas mian karnon?"

La aglo ĉikanis: "Vi nur parolas miele!"

Budho respondis: "Se miaj vortoj estas sinceraj, mia brako tute resaniĝu kiel antaŭe." Je lia ĵuro, karno reaperis sur lia brako kiel antaŭe.

Vidinte tion, la aglo tuj flugis en la ĉielon kaj aperigis sian propran formon. Li estis Imperiestro de Ĉielo. Li jam aŭdis, ke Budho estas bonkora kaj oferema, li do alvenis por lin provi. La ĉiela reĝo esprimis



sian elkoran estimon al Budho kaj forflugis, kantante por laŭdi la budhan kompatemon.

Ne longe poste, la tuta mondo informiĝis, kiel Budho detranĉis sian brakon por savi kolombon.



## 10. Angiloj en la urno



En Ĉinio de 1573 ĝis 1620 daŭris la periodo Wanli (Uanli) de Ming-dinastio (Min), dum kiu la pilgrimantoj atingis Masaĉusecon (Massachusetts) en Usono. Tiam riĉulo nomata Yu (Ju) vivis en la bela ĉina urbo Hangzhou (Hanĝou). La urbon Hangzhou Marko Polo nomis "Kinsai" kaj laŭdis kiel "la plej grandan kaj plej belan urbon sur la tero, tiel belan kiel paradizon".

Sinjoro Yu emis fari bonajn aferojn kaj neniam mortigis vivestaĵojn.

En nia rakonto, familio najbara de Yu estis priŝtelita kaj perdis ĉion, kion ili posedis. Yu malavare donacis monon por ilin vivteni. La edzino de la najbaro estis profunde emociita de lia favoro.

Iutage ŝi havigis al si dek angilojn. Por esprimi sian dankemon al Yu, ŝi

donacis ilin al la maljuna patrino de Sinjoro Yu. Angilo estis rare havebla manĝaĵo por ĉinoj. La familio Yu neniam mortigis vivestaĵojn, do la servistoj metis la angilojn en grandan urnon por liberigi ilin iutage estonte.

Ne longe poste, maljuna sinjorino Yu vidis en sonĝo, ke dek viroj venis en ŝian ĉambron kaj adorkliniĝis antaŭ ŝi ĝis la tero. Kiel strange ili sin vestis! Ĉiu el ili portis koloran vestaĵon kaj pintan ĉapelon. Ili petis: "Ni petas vian favoron. Bonvolu savi nian vivon." Dirinte, ili foriris.

Vekiĝinte, la maljuna Sinjorino perpleksiĝis pro la kurioza sonĝo. Ŝi tute ne sciis, kies vivon ŝi kapablas savi, kaj kion ŝi povas fari por tio. Kiel inteligenta virino, ŝi vizitis sortodiveniston.


La divenisto aŭguris, ekzamenis ŝian naskiĝdaton kaj pririgardis ŝian manplaton. Li profetis: "Ne maltrankviliĝu, Sinjorino. Tio estas

bonaŭgura sonĝo, tute ne malbona. Tiuj vivestaĵoj deziras vian helpon por savi sian vivon. Vi ne bezonas serĉi ilin malproksime. Ili estas ĝuste en via domo."

Ŝi hastis hejmen kaj ekserĉis ĉien por trovi la saveblajn vivestaĵojn. Fine servisto rememoris pri la fiŝoj en la urno. Tiam ili komprenis, ke la dek homoj en la sonĝo estas ĝuste la dek angiloj.

Maljuna sinjorino Yu diris: "Ni preskaŭ perdigis dek vivojn pro malatento!" Ŝi tuj portigis la angilojn al lageto kaj senprokraste liberigis ilin en la akvon.

Poste, la fiŝoj vivis feliĉe, kaj la familio de Yu des pli riĉiĝis.



## 11. Lango de Granda Xu



Subite aŭdiĝis timiga vekrio el malnova butikoj kaj sekvis sono de io falinta surteren.

La najbaroj alkuris tien por rigardi, kaj ili vidis Grandan Xu (Ŝju), la buĉisto de bovoj, kuŝanta en sango.

Sango fluadis el lia buŝo. Lia lango estis detranĉita, kaj li jam mortis. La najbaroj esploris la kaŭzon de lia neatendita katastrofo.

Jen la okazaĵo: Granda Xu sin vivtenis per mortigo de bovoj. Ĉiufoje, antaŭ ol mortigi bovon, li detranĉis ĝian langon kaj formanĝis ĝin kun vino. Imagu, kiel kruele li suferigis la bovojn.

Tiutage, Granda Xu metis la tranĉilon sur la lintelon por fari ion alian. Subite, li aŭdis, ke du musoj interbatalas super la pordo. Li do rigardis supren kun la buŝo

malfermita. Ĝuste tiam, la batalantaj musoj faligis la tranĉilon. Ĝi falis rekte en lian buŝon kaj detranĉis lian langon. Granda Xu falis teren morta.

Kiam la najbaroj informiĝis, kiamaniere mortis Granda Xu, ili diris skuante la kapon kun suspiro: "Granda Xu pensis pri nenio krom mortigado. Li detranĉadis la langon de bovoj kaj manĝis kun vino, ĉar li ŝatis la guston de la bovlango. Kaj je la fino, du musoj detranĉis lian langon kaj mortigis lin, ĝuste kiel li faris kontraŭ la bovoj. Budha instruo pri la rilato inter kaŭzoj kaj rezultoj estas vere kredinda! Oni rikoltos kion ili semas!"





## 12. Trimonata sufero



Lamplumo tremetis en frosta vento.

Iuj ĉinoj kredis, ke manĝi hundan viandon povas varmigi homan korpon en vintro. Do en malvarmegaj tagoj ĉiuj sidlokoj estis okupitaj en la restoracioj de hundaĵo, kaj eĉ la aero estis plena de viandodoro.

Cao Shengyuan (Caŭ Ŝenjŭan) metis mortigitan hundon en kaldronon por kuiri malantaŭ la gastejo. Li mortigadis hundojn dum longaj jaroj, kaj fine prosperis lia hundaĵservo. Li eĉ dungis du virojn kiel helpantojn.

Helpanto diris: " Kiel grasa estas tiu ĉi hundo!"

Cao Shengyuan ridis: "Jes, prave! Ni gajnos pli multe ĉifoje!"

Dum ili boligis akvon por kuiri la hundon, ili akrigis la tranĉilojn.

La kuirata hundo subite saltis

el la kaldrono, sage sin ĵetis al Cao Shengyuan kaj dente kaptis lin je la kolo. Cao Shengyuan eklekis por helpo.

Ĉiuj gastoj kuris el la gastejo kaj vidis la hundon neforlase tenantan Cao kun la dentoj en lia kolo kaj lian sangon elŝprucanta el la vundo. Vere terure!

Post kiam ili forigis la hundon de lia kolo, Cao Shengyuan ĉien vojaĝis por konsulti kuracistojn. Tamen, kian ajn metodon ili provis, lia vundo restis ne kuracebla. La vundo puis kaj putris. Tio tiel dolorigis lin, ke li senĉese ĝemis kaj vekriis tagnokte.

Finfine Cao mortis de la suferego post tri monatoj. Ĉiuj frandemuloj de hundaĵo en la regiono forlasis sian hobion. Ili komprenis, ke la viandmanĝado kaŭzos al ili grandan suferon en la estonto.



## 13. Ermito kaj birdo



Antaŭ longa tempo maljuna ermito vivis en profunda arbaro. Li estis bonkora kaj ĉiam evitis mortigi vivestaĵojn.

Iutage, li sidiĝis sub granda arbo. Apenaŭ li pretis kontempli, li sentis ekblovon. "Strange!" li pensis kaj malfermis la okulojn. Li vidis malgrandan birdon staranta sur lia genuo. La birdo senĝene ripozis tie kvazaŭ sur branĉo. La ermito ĉantis la nomon de Amitabo, kaj diris en sia koro: "Ĉu vi prenas mian genuon kiel branĉon? Bone. Mi ne kontraŭu vian volon. Amitabo! Bone! Bone!"

La birdeto kuntiriĝis kaj endormiĝis ĝuste sur lia genuo. La ermito timis ĝeni la dormon de la birdeto, li do koncentris sian menson kaj baldaŭ profundiĝis en la kontemplado.

Post la longa kontemplado li trovis, ke la birdeto estas ankoraŭ en la dolĉa dormo. Li sin tenis senmova por ĝin ne ĝeni. Li diris mallaŭte: "Amitabo! Dormu plue. Viflugos laŭplaĉe post sufiĉa ripozo."

La birdeto vekigis finfine, ĝi frapetis laflugilojn, etendis la krurojn, pepis feliĉe plurfoje, kaj ekordigis la plumojn per la beko. Poste ĝi etendis laflugilojn kaj forflugis.

La maljuna ermito stariĝis nur post la forflugo de la birdeto. Post kiam la birdeto malaperis el lia vidkampo, li forlasis la arbegon por reveni al sia dometo.



## 14. Vivliberiga laĝeto



En nigre verda koloro, la montpinto de Tiantai-montaro (Tjantaj) en Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan) staras kiel bele ornamita ekrano. Oni frekventas de malproksime por spekti la ĉarman pejzaĝon.

En la belaj montoj estas multaj budhismaj monaĥejoj kaj temploj dum centoj da jaroj. La estro de iu granda templo estis nomata Zhi Yi (Ĝi Ji). Li vivis de 539 ĝis 597 p.K. La reĝo Yang (Jan) de Sui-dinastio (Suj) nomumis lin "Saĝulo" pro lia nekomparebla saĝo, kiu famas eĉ en la nuna tempo.

Tiam Majstro Saĝulo opiniis, ke tieaj homoj estas tre kruelaj, kaj povas mortigi ĉian ajn vivestaĵon por manĝi.

Li decidis fari ion kontraŭ tio. Sed kion fari? Bonzoj ja ne havis monon. Li do almozpetis dum pluraj jaroj, ĝis finfine li posedis sufiĉan sumon



por aĉeti pecon da tero kaj dungi laboristojn fosi lageton tie.

Tion vidinte, oni mokridis lin malsaĝa!

La majstro estas tiel prudenta, ke li neniel zorgis pri alies moko. Li daŭrigis la laboron.

Li instruis la laborantojn pri budhismo dum ilia ripoza tempo. Li diris: "La sutroj (la sanktaj libroj de Budho) diris: 'Ĉiuj vivestaĵoj havas budhan naturon.' Eble neniu el vi rigardis fiŝojn aŭ kankrojn gravaj, tamen ili ankaŭ povos fariĝi budhoj iutage estonte."


"Ankaŭ sovaĝaj bestoj havas budhan naturon. Se iu estis mortigita de sovaĝa besto, ni opinias tion malfeliĉa kaj bedaŭras pro li. Ĉu vi iam opiniis, ke ankaŭ la aliaj fiŝoj opinias tion malfeliĉa kaj bedaŭras pro la mortinta fiŝo post kiam vi mortigis ĝin?"

Majstro Saĝulo eksplikis, ke

li konstruigas lageton por tio, ke iu ajn, kiu havas fiŝon aŭ kankron, havu ŝancon por liberigi kaj lasi ĝin vivi trankvile kaj sendanĝere ĝis la vivfino. Li nomis la lageton "Vivliberiga Lageto".

La laborantoj ege emociiĝis de tio. Eĉ la homoj, kiuj iam mokis lin, sin opiniis nedecaj. Ili fariĝis budhanoj kaj ne plu mortigis vivestaĵojn por manĝi.

La bonzoj en aliaj temploj ankaŭ imitis lian agon kaj konstruis multajn vivliberigajn lagetojn. Se vi havas bonŝancon por viziti budhismajn templojn kaj monaĥejojn en Ĉinio, vi eble vidos la vivliberigajn lagetojn, kie libere vivas fiŝoj, kankroj kaj testudoj. La bestoj neniam maltrankviliĝas pri la penso, ke ili estos formanĝitaj de homoj.



## 15. Viro sentima al morto



La vera nomo de Majstro Yongming (Junmin) estis Yanshou (Janshou). La reĝo titolis lin Zhijue (Ĝiĝjüe) post lia morto. Oni nomis lin Majstro Yongming, ĉar li vivis en Yongming-templo de Hangzhou-urbo (Hangôu).

Lia familia nomo estis Wang (ŭan) antaŭ ol li forlasis la laikan vivon kaj fariĝis bonzo. En liaj dudekaj jaroj li estis financa oficisto de Yuhang-gubernio (Juhan) proksima al Hangzhou. Li sentis grandan bedaŭron pro tio, ke la fiŝoj kaj salikokoj estas kaptataj kaj formanĝataj. Li do ofte ilin aĉetis per publika mono, portis al la rivero kaj liberigis en la akvon.

Malfeliĉe, la uzita mono ne apartenis al li mem. Oni eltrovis lian aferon kaj kondamnis lin al malliberejo post nelonge.

La juĝisto neniel kredis, ke li uzis la monon por liberigi la bestojn. Li konviktis Wang pri ŝtelado de publika mono. Tio estis krimo vere grava. Tiam la puno por tiu krimo estis senkapigo— Oni trenis la krimulon al la publika placo, kie ĉiuj povas rigardi, kaj dehakis lian kapon per granda glavo. Ĉiuj, kiuj vidis la teruran punon, estis ĉiam timigitaj.

La reganto de Ŝtato Wuyue (Ujüe, 907-978 p. K.) sciis, ke Wang estas bonkora kaj liberigis multajn bestojn. Ĉu li eble aĉetis la bestojn per publika mono? Li do ordonis al siaj oficistoj ĉe la ekzekutejo, ke ili atenteme observu la konduton kaj vortojn de Wang.

Kiam oni eskortis Wang eksteren por haki lian kapon, li aspektis nek timigite nek maltrankvile. Fakte, li estis plezura kaj aplomba. La ekzekutisto neniam vidis tian bildon kaj demandis al li kun respekto: "Ĉiuj aliaj krimuloj senkapigitaj de


mi tremis kaj ploris. Antaŭe mi vidis neniun, kia vi aspektas nun. Kiel vi povas teni vin en tiel granda aplombo? Vi ja scias, ke oni mortigos vin pro fiuzo de la publika mono."

Wang respondis: "Jes. Mi vere uzis la publikan monon, sed mi uzis neniom por mi mem. Mi elspezis tion por aĉeti la bestojn kaj forliberigi ilin. Do pro kio mi ektimu? Tuj post mia dekapiĝo, mi povos eniri la Puran Landon de Amitabo. Ĉu tio ne estas bona afero? Do mi neniel povas atendi plue."

Kiam la oficistoj respondecaj pri la ekzekutado aŭdis tion, ili komprenis, ke Wang estas honesta. Ili admiris liajn honeston, aplombon kaj kuraĝon. Ili senkulpigis kaj liberigis lin.

Poste, li fariĝis bonzo je la aĝo de tridek jaroj. Li estis vere bona bonzo, ke li forigis ĉiajn ĉagrenojn grandajn kaj malgrandajn, akiris iluminiĝon kaj ankaŭ verkis multajn gravajn librojn.

Post kiam li forpasis en 975 p.K. je la aĝo de 72, Amitabo mem alvenis kaj bonvenigis lin en la Puran Landon.





## 16. Savi drakan filon



Iam estis fama kuracisto nomata Sun Simiao (Sun Simjaŭ) en Tang-dinastio (Tan). Li estis tre bonkora, precipe al bestoj.

Kiam li promenis ekster la vilaĝo en iu bela aŭtuna tago, li hazarde vidis, ke du knaboj kaptis malgrandan serpenton. Ili ludis per ĝi kaj pro tio ĝi estis preskaŭ mortanta de la turmentiĝo. La maljunulo ne toleris vidi la suferon de la kompatinda vivestaĵo, li do elprenis monon kaj aĉetis ĝin de la knaboj. Poste, ĝin li portis al lagbordo kaj liberigis.

Post pluraj tagoj, li sidis en la legoĉambro kaj ekdormetis. Li vidis en sonĝo, ke viro en verda kostumo enĉambriĝis kaj invitis lin al festeno. Ii akceptis la inviton kaj estis kondukita al tre impona palaco. Tie ĉio estis neta kaj bonorda. Li neniel

povis imagi, kie li estas.

Kiam ili atingis la ĉefan halon, la mastro en aspekto de gravulo eliris kaj salutis lin dirante: "Foje mia filo ludis ekstere. Se vi ne savus lin, mi supozas, li jam perdus sian vivon."

Tiam la mastro ordonis pretigi festenon por la honora gasto. Post la franda kaj abunda festeno, la mastro elprenis multajn juvelojn kaj aliajn trezorojn por donaci al Sun, sed Sun neniom akceptis. La mastro do insistis. Fine, Sun ekkonsciis, kie li estas. Li do petis: "Mi aŭdis, ke en la kristala palaco de Draka Imperiestro estas multaj eksterordinaraj medikamentoj, per kiuj oni povas kuraci ĉiajn suferojn kaj malsanojn. Se vi estus favora, bonvolu transdoni al mi plurajn specialajn receptojn, per kiuj mi povos savi la suferantojn. Tio estas konduto kun granda merito."

La draka imperiestro senprokraste elprenis malgrandan jadsteleon, sur

kiu gravuriĝis tridek ses receptoj. Li donacis la receptojn al Sun.

Akceptinte la receptojn, Sun subite vekiĝis el la sonĝo.

Stranga afero okazis ekde tiam. Kian ajn malsanon li kuracis, kaj kiel ajn grave la malsanuloj suferis, li povis tuj sukcesi en kuracado. Tiel Sun savis multajn suferantojn de malsano.



## 17. Rakonto de ŝramanero



Juna bonzo, kiu ankoraŭ ne atingas la aĝon por havi plenan bonzegan staton, estas nomata "Ŝramanero" (novico).

Iam estis novico, kiu lernis budhismon ĉe tre saĝa Instruisto. Li estis lernanto sufiĉe bona. Li estis respektema, sincera kaj obeema. Li progresis tre rapide.

La instruisto estis homo kun granda saĝo kaj ankaŭ bone konis la estintecon, estantecon kaj estontecon. Li sciis dekomence, ke lia juna lernanto ne vivos longe. Iutage li kalkulis kaj certigis al si, ke la juna novico pluvivos nur sep tagojn. Li do tre maltrankviliĝis pri tio.

Li alvenigis la junan novicon kaj diris: "He, eta novico, vi ne vidis viajn gepatrojn jam de sufiĉe longe. Mi opinias, ke vi bezonas ferion.

Hejmeniru kaj vizitu viajn gepatrojn. Revenu poste je la oka tago." Li tiel agis por ke la novico almenaŭ povu morti en la gepatra hejmo.

Li estis tre malĝoja post adiaŭo de la novico. Li opiniis, ke li neniam revidos sian karan lernanton.

La novico eksteratende revenis post ok tagoj. La instruisto estis kaj ĝoja kaj konfuzita, ĉar la juna lernanto aspektis sane kaj bonfarte, kaj neniel plu mortante.

Fine, la instruisto decidis eltrovi la kaŭzon. Li demandis la knabeton: "Mia fileto, mi profetis la estontecon multfoje, kaj neniam eraris. Mi ordonis vin iri hejmen, ĉar vi estis destinita morti en sep tagoj laŭ via sorto. Sed sep tagoj jam pasis, kaj vi ne nur vivas, sed ankaŭ aspektas sufiĉe sane. La signo de morto jam forlasis vin. Kion vi faris kontraŭ tio?"

La juna novico ektimiĝis. Li tute ne sciis kiel respondi. Do la instruisto

enmeditiĝis kaj baldaŭ trovis la kaŭzon.


"Mia fileto, ĉu vi savis formikojn sur la vojo al via hejmo?"

"Jes, Instruisto. Dum mia hejmirado mi vidis amason da formikoj baraktantaj en akvo. Mi do savis ilin per peceto da ligno" respondis la novico. La instruisto diris: "Jen la kaŭzo! Per via bonkoreco vi gajnis plilongan vivon. La maljunaj saĝuloj diris: 'Savado de unu vivo estas pli meritoplena ol konstruado de sep-etaĝa pagodo'. Vi savis centojn da vivoj, do vi povas ĝui longan vivon."

Li daŭrigis: "Vi havos bonan estontecon, sed ankoraŭ devas klopodi por daŭre savi vivestaĵojn. Vi devas laŭeble diskonigi la instruon de Budho kaj instrui ĉiujn homojn esti kompatemaj. Diru al ĉiuj, ke ili ne plu mortigu vivestaĵojn, sed lasu la vivestaĵojn vivi pace kaj sendanĝere!"

La novico neniam forgesis la instruon. Li laboris tre diligente kaj fariĝis eminenta bonzo. Li havis tre longan vivon.





## 18. La patrino cervo



La arbaro estis kvieto en la frua mateno. La leviĝanta suno lumigis la teron, arbaron kaj ebenaĵon, ĉarmigis la montan pejzaĝon kaj ankaŭ glimigis la ondetojn de la roĵo. Ĉio estis en kvieto.

Subite aperis viro. Li paŝis rapide tra la roĵo kaj atingis la herbaron. Li haltis kaj rigardis ĉirkaŭen kvazaŭ por ion serĉi. Li havis kvadratan vizaĝon, grandajn orelojn, glavosimilajn brovojn, kaj tigrajn okulojn. Li portis ĉasistan turbanon sur la kapo, pafarkon en la mano kaj sagujon ĉe la talio. Li aspektis forta kaj vigla. La viro estis Xu Zhenjun (Ŝju Ĝenĝjun). Li preferis eksterdomajn aktivadojn, precipe ĉasadon.

Vidinte cervidon eliranta el la arboj, Xu (Ŝju) ridetis kaj tuj pretis pafi. Zum! Apenaŭ aŭdiĝis la sono de

la pafarka fadeno, kiam teren falis la cervido. Xu Zhenjun eksentis fieron pro sia eksterordinara pafarto. Tuj kiam li aliris por preni la ĉasaĵon, li vidis cervinon haste kuranta al la cervido.

Vidinte la okazaĵon de sia ido, la cervino ĝemis, ploris korŝire, kaj lekis ĝian vundon per la lango.

Xu neniam atendis pri tio. Li gapis dum la patrino flegis sian idon. Li pafis tiel trafe kaj forte, ke la cervido baldaŭ perdis sian vivon.

La patrino falis teren kaj mortis apenaŭ ĝi vidis la morton de la cervido.

Xu surpriziĝis pro tio. Li neniel povis imagi, de kio mortis la patrino. Li do elprenis la ĉasistan tranĉilon kaj distranĉis ĝian korpon por eltrovi la kaŭzon.

Li vidis, ke ĝiaj organoj kaj intestoj disrompiĝis en pecetojn longajn je colo. La internaĵoj de la

patrino dispeciĝis pro ĝia kordoloro.

Xu pentegis pro sia konduto. Li senprokraste rompis la pafarkon kaj ĵetis la sagojn en la riveron. Li forlasis hejmon, iris en profundan montaron kaj trovis al si budhisman instruiston. Li sin kulturis diligente dum multaj jaroj kaj finfine fariĝis eminenta budhana majstro.



## 19. Aliformiĝinta fiŝo



Iam estis maljunulo nomata Qu (Ĉju). Li aĝis pli ol sesdek jarojn, kaj faris multe da bonaj aferoj en la tuta vivo. Antaŭe, la trafikoj estis tre malfacilaj. Li donacadis monon konstruigi vojon kaj pontojn por ke oni trapasu pli facile. Li ankaŭ helpis la aliajn laŭ bezono. Ĉiuj en la regiono povis rakonti multajn laŭdindajn aferojn pri li.

Iutage, li vidis, ke fiŝisto iras al la bazarro por vendi la kaptitan karpon. La bela fiŝo havis ruĝajn makulojn kaj striojn brilajn kaj varmajn sur la korpo, kvazaŭ fajro en vintro. Ĝiaj okuloj brilis kvazaŭ la steloj en la ĉielo. Maljuna Qu sentis domaĝon lasi tiel belan fiŝon manĝita de homoj, li do aĉetis ĝin per alta prezo kaj metis ĝin en la lagon. Li sentis grandan feliĉon pro sia bonfaro.

Qu estis maljunulo. Neniu el la homoj povas vivi por ĉiam. Nelonge poste, li sentis malfortecon, kapturniĝon kaj deprimatecon. Li konsciis, ke li ne plu vivos longe.

Iutage, kiam li kuŝis malsana en la hejmo, alvenis servoknabo kaj diris al li: "Mia mastro bonvenigas vin al festeno, Sinjoro Qu."

Maljuna Qu tute ne konis la knabon, sed li opiniis, ke ellitiĝi estas bone por li kaj manĝi ekstere povas pliigi lian energion. Li do sekvis la knabon. "Mi vere malsaniĝis", li pensis dum la promenado, ĉar ĉio en liaj okuloj estis malklara kaj brila kiel en ora lumo.

Post nelonge, li sin trovis antaŭ grandioza palaco kun gravuritaj kolonoj kaj pentritaj traboj. Tabulo kun vortoj "La Kristala Palaco" pendis super la fronta pordo. "Strange, ĉu tio ne estas la nomo de la draka palaco?" ekmiregis Maljuna Qu.

Momenton poste, elvenis la mastro. Li estis viro kun dikaj brovoj, longa hararo kaj kvin strioj da barbo. Li estis forta, vigla kaj afabla. Maljuna Qu konsciis post iom da babilado, ke la mastro estas neniu alia ol la draka imperiestro mem.

Ili kune ĝuis la frandaĵojn el altaj montoj kaj profundaj maroj. La draka imperiestro diris al Maljuna Qu: "Foje iu el miaj filoj sin amuzis ekstere kaj estis kaptita kaj mortigota de banditoj. Feliĉe, vi vidis tion kaj savis lin. Pro tio ni elkore dankas al vi!

"Efektive, vi ne plu restos longe en la mondo, sed vi gajnis plilongan vivon pro tio, ke vi savis drakon aliformiĝintan en fiŝon. Mi invitis vin al la simpla festeno nur por esprimi nian dankon kaj ekspliki la aferon al vi."

"Mi ne aŭdacas akcepti vian favoron sen fari meriton," diris Maljuna Qu humile, "do ekde nun,



mi faros pli multe da bonfaroj por esprimi mian profundan dankon al vi!"

Post la festeno, Maljuna Qu vekigis kun plena stomako. "Eble mi songis," li diris al si mem, "sed pro kio mi estas tiel sata?"

Li faris des pli multe da bonaj agoj, kaj mortis trankvile je la aĝo de 120 jaroj, post longa tempo sen ajna malsano.



## 20. La deka kaj la unua



En antikveco, tre malmultaj homoj en la mondo scipovis legi kaj skribi. En Ĉinio la gepatroj esperis, ke ili enspezu pli multe por klerigi siajn filojn en la lernejo. Tiel la filoj povis lerni legi kaj verki de la instruisto. Se ili lernis tre diligente kaj trapasis la ŝtatajn ekzamenojn, ili povis gajni postenon en la kortego. Tio alportis estimon, honoron kaj potencon al la tuta familio. Sed la ekzamenoj estis tre malfacilaj. Multaj lernantoj partoprenis la ekzamenojn foje kaj refoje ĝis la maljuniĝo, sed neniam sukcesis.

Iam du fratoj Song Jiao (Sun Ĝjaŭ) kaj Song Qi (Sun Ĉji) iris kune al la ĉefurbo por partopreni la kortegan ekzamenon. Ili renkontis bonzon sur la vojo. La bonzo rigardis atente al Song Jiao kaj diris: "De kiam mi

ekvidis vin, mi scias bone, ke vi savis multe da vivestaĵoj. Laŭ via destino vi malsukcesos en la kortega ekzameno, tamen vi savis tiel multajn vivojn, do ĉijare vi gajnos la plej altan lokon. Permesu al mi, humila bonzo, gratuli al la estonta oficisto."

Song Jiao opiniis tion stranga kaj demandis: "Kiam mi savis multajn vivestaĵojn?"

La bonzo respondis: "Iam vi savis multajn formikojn el danĝero."

"Kio? Ĉu savi malgrandajn formikojn signifas savi vivestaĵojn?"

"Prave! Ĉiuj vivestaĵoj, eĉ la malgrandaj insektoj kiel formikoj, havas siajn proprajn vivon kaj destinton. Via malpli aĝa frato laŭdestine gajnos la plej multajn poentojn en la ekzameno, tamen via rango estos eĉ pli alta ol la lia."

La fratoj Song neniel kredis tion. Kiam ili forlasis la bonzon, Qi demandis al Jiao: "Ĉu vi vere savis la

formikojn?"

"Jes," respondis la frato, "iam mi vidis formikojn dronantaj, mi do faris ponteton per peco da bambuo kaj savis ilin."


La kortega ekzameno estis multe pli grava ol la formikoj kaj la aŭguro de la bonzo. La fratoj forgesis ĉion pri la okazaĵo kiam ili atingis la ĉefurbon kaj okupiĝis pri siaj studobjektoj.

Post la ekzameno, la oficistoj kontrolis ĉiujn paperojn, kaj sendis la rezulton al la reĝo. Song Qi gajnis la plej multajn poentojn en la tuta regno. Song Jiao gajnis la dekan, kiu estis ankaŭ sufiĉe alta loko. La reĝo legis la nomliston de tiuj kun plej multaj poentoj.

La reĝo diris: "Song Qi gajnis la unuan lokon, pli alta ol tiu de sia pliĝa frato Song Jiao. Ne decas, ke la malpliĝa frato okupas la lokon pli altan ol la pliĝa. Song Jiao estu la unua kaj Song Qi, la deka."

Oni sekvis la ordonon de la reĝo. Informiĝinte pri tio, ambaŭ fratoj rememoris la profetaĵon de la bonzo, kaj ekridis. Dum ili vojaĝis hejmen por informi la feliĉan novaĵon al la gepatroj, ili speciale faris viziton al la bonzo por esprimi sian dankon al li.

Nelonge poste, la rakonto cirkulis en la tuta lando. Ĉiuj sciis, ke Song Jiao gajnis la unuan lokon pro savo de formikoj.



## 21. Entombigo farita de birdoj



En malgranda kabano vivis soleca homo.

Li nomiĝis Sun Liangsi (Ljansi). Li estis malriĉa, sed tre honesta kaj bonkora. Li faris diversajn laborojn por sin vivteni, sed lia enspezo estis tre malmulta. Kiam ajn li vidis vivestaĵon en kaptilo, li ĉiam aĉetis kaj liberigis ĝin, nur se li havis monon.

Tiel li savis multajn vivestaĵojn, sed ŝparis al si neniom da mono. Li estis ankoraŭ tre malriĉa en la maljuneco.

Estante tro maljuna por labori, li sin vivtenis per almozpeto. Kiam li superis 70 jarojn, li estis tro malforta por ellitiĝi kaj forpasis post nelonge.

Sun Liangsi havis nek parencon nek amikon. Li estis tiel malriĉa, ke li eĉ ne havis ĉerkon. Laŭ la ĉinoj,



se la mortinto ne estis entombigita, lin trafis la plej terura destino. Neniu prizorgis Sun Liangsi. La najbaroj estis same mizeraj kiel li. Ili ne sciis, ke li jam forpasis. Eĉ se ili informiĝus pri tio, ili havus neniom por aĉeti ĉerkon kaj entombigi lin.

Je la mateno post lia forpaso, la najbaroj surprizite trovis, ke la ĉielo estas plena de birdoj. Miloĵ da birdoj flugis en lian kabanon el diversaj direktoj. La najbaroj iris en la kabanon kaj trovis, ke li jam forlasis la mondon. Ili supozis, ke la birdoj alflugas nur por manĝi lian karnon.

Tiam ili vidis, ke ĉiu el la birdoj alportas peceton da tero en la beko, kaj metas ĝin sur la korpon de Sun Liangsi. Tiamaniere ili esprimis sian elkoran dankon al li.

Miloĵ da birdoj flugadis tien kaj reen, kaj antaŭ la tagmezo, ili jam enterigis la kabanon kaj faris ĝin tombo por la maljunulo.

La najbaroj estis ege kortuŝitaj de tio.

Ekde tiam ili ne plu kaptis la vivestaĵojn.



## 22. Generalo Maŭ kaj la testudo



Dum Jin-dinastio (Ĝin) antaŭ 1600 jaroj, estis bonkora konfuziana klerulo nomata Mao Bao (Maŭ Baŭ). Iam antaŭ ol trapasi la kortegan ekzamenon kaj fariĝi registara oficisto, li hazarde vidis fiŝiston iranta al bazaro por vendi testudon. Maŭ Bao aĉetis la testudon, sed anstataŭ manĝi, li ĝin portis al proksima lago kaj liberigis.

Poste, Mao Bao fariĝis potenca generalo. Sed eĉ la plej bonaj generaloj spertis siajn malvenkojn. Lia trupo estis venkita de Shi Jilong (Ŝi Ĝilun) en Zhucheng-urbo (Ĝuĉen), kaj devis forfuĝi por sin savi.

La malamikoj postkuris sufiĉe proksime. Generalo Mao kuregis laŭeble plej rapide kiel la aliaj soldatoj. Li atingis lagbordon, sed tie troviĝis

nek boatoj, nek pontoj. Estis nenia rimedo por li transpasi la lagon. Li ne scipovis naĝi, kaj eĉ se li naĝus, liaj kirasoj premus lin al la fundo de la lago.

Rigardante malantaŭen, li trovis, ke la malamikoj baldaŭ kuratingos lin. Li suspiris: "La sorto destino morton al mi!"

Por ne kaptiĝi de la malamikoj, Generalo Mao decidis sin mortigi. Apenaŭ li pretis tion fari, li rimarkis ion malmergiĝinta kaj naĝanta al li.

Li ne havis tempon por esplori, kio flosas en la lago. La malamikoj pli kaj pli proksimiĝis. Subite en lia kapo eklumis nova ideo: "Se mi mortos ĉi tie, la malamikoj havos mian kadavron. Tio estos granda humiligo al miaj reĝo kaj regno. Estas pli bone por mi dronigi min en la lago, tiel ili ne povos trovi mian korpon." Pensante, li sin ĵetis en la lagon. Strange, li falis sur ion malmolan,

kiu ekmovis al la kontraŭa bordo. Li ekmiris pri tio.

La malamikoj atingis la bordon, ili hurlis, insultis, kaj pafadis sagojn al li, sed li jam troviĝis ekster la atingebla distanco de la sagoj. Ĉiuj sagoj falis en la akvon kaj neniu trafis lin.

Li mallevis la kapon kaj trovis, ke li staras sur granda testudo. La testudo portis lin al la transa bordo. Generalo Mao forlasis la testudon kaj surbordiĝis. La testudo naĝis sur la akvon kaj kapsignis al li. Poste, ĝi mergiĝis kaj fornaĝis.

Tiam Generalo Mao rememoris, ke antaŭ dekoj da jaroj li savis testudon kaj liberigis ĝin en la sama lago.

La testudo venis kaj savis lian vivon en danĝera momento. Jen vivo por vivo.



## 23. Abeloj kaj miskondamnito



Iutage, kelnero en restoracio hazarde vidis, ke abelo falis en vinujon kaj preskaŭ dronis. Li sentis kompaton, metis manĝbastoneton en la vinujon kaj elsavis ĝin. Demetinte la manĝbastoneton, li rigardis la ĵus elsavitan abelon. La abelo frapetis la flugilojn por sekiĝi pli rapide. Tute sekiĝinte, ĝi forflugis zumante.

La kelnero rimarkis poste, ke multaj abeloj allogitaj de la vina parfumo dronadis en la vino. Li do ekpriatentis tion kaj savis multajn abelojn.

Forpasis multaj jaroj. Iutage lakeoj de juĝejo neatendite entrudiĝis en la restoracion. Nenion dirinte, ili katenis kaj eskortis la kelneron al la juĝejo. Kiam li atingis la juĝejon, li eksciis, ke li estis denunciata per falsaj



akuzoj. Iuj el la arestitaj banditoj enviis lin, kaj mensogis, ke li estas ilia kamarado. La juĝisto arestis lin, kaj decidis ekzekuti lin kune kun la banditoj.

La kelnero protestis, ke li estas senkulpa, sed la juĝisto opiniis lin krimulo pro la falsa denunco. Li tute malesperiĝis kiam li vidis, ke la juĝisto levas ruĝan penikon por subskribi la ekzekutan anoncon pri li.

Apenaŭ la juĝisto ekskribis per la ruĝa peniko, zumado eksonis de malproksime.

Grego da abeloj enflugis tra la fenestroj kaj sidiĝis sur la peniko de la juĝisto. La juĝisto svingis la penikon por forigi ilin, tamen, pli da abeloj alflugis. Ili ne pikis, sed nur restis tie sencede.

La juĝisto opiniis tion kurioza. "Eble," li pensis, "la abeloj alflugis por malhelpi miskondamnon."

Tiel pensante, la juĝisto denove

ekzamenis la kazon, kaj trovis kontraŭdiron en la banditaj konfesoj. Li pridemandis ilin refoje, kaj fine certigis al si mem, ke li preskaŭ miskondamnis la senkulpulon.

Post kiam la juĝisto proklamis, ke la kelnero estas senkulpa, la abeloj forflugis. La juĝisto demandis la kelneron, ĉu li scias bone, pro kio la abeloj alflugis savi lin.

"Mi vere ne scias, Via Juĝista Moŝto. Sed eble pro tio, ke mi savis multajn abelojn falintajn en vinujojn kaj baldaŭ dronontajn. Ili alflugis por la parfumo, kaj ne plu povis elflugi se ili falis en la vinujon. Kiam ajn mi vidis tion, mi ĉiam savis ilin. Mi supozas, ke ili alflugis nur por savi min, Via Juĝista Moŝto."

"Vere eksterordinare! Vi elsaviĝis de morto. Memoru, ke via bona konduto savis vian vivon. Poste klopodu fari pli multajn bonajn agojn. Vi certe gajnos pli bonan

rekompencon."

La juĝisto diris prave. La kelnero daŭrigis sian bonfaron, kaj la servo de la restoracio pli kaj pli prosperis. Li ĝuis longan, feliĉan vivon kaj mortis pace en riĉego.



## 24. Longvivo, feliĉo kaj honoro



Zhang Tixing (Ĝan Tiŝjin) estis malsupera oficisto en la gubernia registaro. Li estis justa kaj honesta, kaj ofte faris filantropiajn aferojn. Kvankam li enspezis malmulte, li ofte iris al vendejoj de buĉistoj kaj aĉetis mortigotajn bestojn. Li ilin portis hejmen kaj bredis.

Li havis multajn gefilojn kaj genepojn. Tion ĉinoj rigardis kiel grandan feliĉon. Li neniam malŝparis monon, sed akumulis grandan sumon post multaj jaroj. Se li havis oportunon, li aĉetis bestojn de la buĉistaj vendejoj kaj bredis ilin en la hejmo. Kiam la breditaj bestoj mortis je la vivfino, li enterigis ilin zorgeme.

Zhang pli kaj pli maljuniĝis, kaj li retiriĝis de sia posteno. Dum sia maljuneco li ĝuis la feliĉon prizorgi

siajn gefilojn, genepojn kaj ankaŭ la bestojn. La najbaroj opiniis lin freneza, sed li tute ne zorgis pri ilia moko. Li instruis siajn posteulojn respekti ĉiun vivon. Li neniam permesis al ili mortigi vivestaĵojn. Ĉiuj en lia tuta familio estis vegetaranoj.

Li estis vegetarano kaj ankaŭ savis multajn vivojn, do kvankam li estis maljuna, li estis sana kaj vigloplena kiel tiuj multe malpliagaj.

Li estis ankoraŭ en bonega sanstato kiam li aĝis pli ol cent jarojn. Li havis klarajn okulojn, brilan haŭton kaj nigrajn harojn. Iutage li alvenigis la tutan familion. Kiam antaŭ li kolektiĝis la gefiloj, genepoj kaj pranepoj, li diris al ili: "Mi savis multajn bestojn dum mia tuta vivo, do mi akumulis grandan meriton por vi. Hodiaŭ la ĉieluloj invitos min al la ĉiela palaco. Nia familio prosperos en la estonteco. Vi ĝuos longan vivon. Post mia forpaso, memoru por ĉiam

mian instruon: Neniam mortigu vivestajojn!"

Kiam li finis siajn vortojn, la familianoj aŭdis muzikon kvazaŭ el la ĉielo. Ili neniam aŭdis tiel belan melodion antaŭe. La muziko estis tiel ĉarma, ke ĝi ne eble venis de sur la tero. La muziko sonis pli kaj pli proksimen.

Ĉiuj familianoj levis la kapon por eltrovi, de kie venas la sorĉa muziko, sed ili vidis nenion. Kiam ili mallevis la kapon, ili trovis, ke Zhang aspektas sufiĉe plezura sidante en sia plej preferata seĝo, sed lia spirado jam ĉesis. Li forpasis en paco kaj bonfarto.

La lokaj oficistoj aŭdis la mirindan rakonton de Zhang. Ili konfirmis kaj raportis tion al la reĝo. La reĝo honoris lin per pli alta rango.

La posteuloj de Zhang neniam forgesis lian instruon. Ili nek mortigis vivestajojn, nek

manĝis viandon, kaj pro tio, ili ĝuis  
longan kaj feliĉan vivon.





## 25. Majstro Huinen



Granda majstro Huineng (Hūinen) vivis de 638 ĝis 713. Lia familio estis tiel malriĉa, ke li neniam havis ŝancon viziti lernejon por lerni skribi kaj legi, sed li havis profundan naturdotitan inteligentecon. Aŭdinte budhan darmon, li tuj fariĝis bonzo kun firma volo. Li laboris diligente, kaj baldaŭ atingis iluminiĝon. Lia instruisto, la kvina patriarko de la zenisma skolo, transdonis al li la robon, kiun la unua patriarko Bodhidarmo portis el Hindio. Huineng fariĝis la sesa patriarko de la zenisma skolo.

Iluminiĝinte, li konsciis, ke la sufero de homoj estas kaŭzita pro mortigo de bestoj por manĝado. Li petis, ke oni ĉesu manĝi vivestaĵojn por eviti suferon kaj malfeliĉon, sed neniu obeis lin.

Huineng sentis grandan bedaŭron,

ke la ĉasistoj mortigis bestojn senĉese. Li do demetis la bonzan robon kaj lasis la harojn kreski tiel, ke li ne plu aspektis kiel bonzo. Li sin anigis al grupo de ĉasistoj, kiuj pasigis longan tempon por ĉasi en montaro.

Huineng nek pafis nek starigis retojn, do la ĉasistoj ordonis lin gardi la retojn. Tio estis ĝuste dezirata de li. Kiam li vidis bestojn kaptitaj en la reto, li ĉiam liberigis ilin se la ĉasistoj ne estis proksime; se la ĉasistoj ĉeestis, li do ploris kaj petis ilin liberigi la bestojn.

Li restis ĉe la ĉasistoj dek ses jarojn. Tiel li ne nur savis multajn bestojn, sed ankaŭ konvertis multajn ĉasistojn. Ili ekkonsciis pri la krueleco de sia kariero, kaj trovis aliajn rimedojn por sin vivteni.

Poste, Huineng majstrigis en sia propra templo. Li estis tiel bonkora kaj saĝa, ke la homoj venis de malproksime el diversaj regionoj por

fariĝi budhanoj kaj lerni de li. Liaj disĉiploj disvastigis lian instruon de zenismo en Koreion kaj Japanion. Kaj en la nuna periodo, lia instruo plivastiĝas ankaŭ en Eŭropo kaj Ameriko.



## 26. Kadavroj de bestoj



Antaŭ longe en Xuancheng-urbo (Ŝjŭanĉen) vivis Geng Benshu (Gen Benŝu), kiu neniam manĝis bovaĵon.

Iutage, Geng Benshu malsaniĝis. La kuracisto preskribis por li medikamenton, kiun li devos preni kun bova cerbo. Informiĝinte pri tio, liaj amikoj donacis al li bovajn viandon kaj cerbon kiel medicinaĵon. Geng transdonis la bovaĵon al siaj servantoj, kaj prenis nur la medikamenton. Li opiniis, ke tiamaniere li estas senkulpa kontraŭ la vivestaĵoj.

Li sonĝis iunokte, ke dio en belega kostumo lin riproĉas, "Vi probable manĝis bovaĵon. Alie, vi tute ne tiel fiodoras!"

Geng tuj sin senkulpigis: "Ne, mi neniam manĝis bovaĵon."

La dio ordonis subulon alporti

notlibron kaj prienketoj la konduton de Geng. "Vi manĝis neniom da bovaĵo, sed pro via malsano, vi rompita la universalan regulon. Vi donita la mortinta kadavron al viaj servantoj por manĝi. Via vivo pli mallongigita pro tio."

"Tamen vi havas la firman volon ne preni viandon kontraŭ malsaneco, kaj jam esprimis vian elkoran pentagon. Se vi restos nemortiganta la vivestaĵojn kaj ankaŭ admonos la aliajn ne plu manĝi viandon, vi estos indulgita." Geng demandis: "Kion mi faru, se oni donacos bovaĵon al mi?"

La dio ekridis. "Kompreneble vi devas scii, ke la kadavro de mortintoj devas esti enterigita respektive. Se vi persistas en tio, vi certe povos fari multajn bonajn aferojn."

Kiam Geng vekigis, li trovis, ke tio estas nur sonĝo, sed la instruo de la dio estis tre grava. Li do notis la okazaĵon, por ke ĉiuj aliaj legu.

Vivestajoj ne devas esti mortigitaj. Eĉ se iu donacos al vi viandon, memoru, ke tio estas kadavro de mortintaj bestoj, kaj vi devas enterigi ĝin.





## 27. La lango de kapro



Tang-dinastio (Tan, 618 - 907 p. K.) estis unu el la plej grandaj eraoj en la ĉina historio. En la ĉefurbo vivis Pan Guo (Pan Gǔo). Kiam li estis tre juna, li gajnis postenon en la kortego per sia eksterordinara luktarto. Li estis societema, kaj amikiĝis kun multaj junuloj proksimaj.

Iutage ili grupe piediris preter tombejo kaj Pan ekvidis kapron inter la tomboj. Eble kapristo forgesis ĝin. La kapro absorbiĝis en manĝado de herbo. Pan kaj liaj amikoj ĉirkaŭis ĝin kaj volis fortiri ĝin. Survoje la kapro komencis blekadi. Ili timis, ke la kapristo aŭdos la mekadon kaj trovos la kapron. Pan do detranĉis ĝian langon. Li opiniis, ke li estas granda saĝulo.

Reveninte hejmen, ili mortigis la kapron kaj rostis ĝin. Ili formanĝis la

viandon kun multe da vino, kaj ege plezuris de tio.

En la sekva jaro, Pan trovis terurite, ke lia lango mallongiĝas. Ĝi fariĝis pli kaj pli mallonga, kaj ĝisfine li perdis parolan kapablon. Ne plu povante plenumi sian ordinaran taskon, li petis aksiĝon. Li povis fari nenion alian ol serĉadi diversajn metodojn por renormaligi sian langon.

Lia superulo Zheng Yuqing (Ĝen Juĉin) suspektis, ke Pan ĉesigis sian laboron pro maldiligenteco. Li do ordonis al Pan malfermi la buŝon por kontroli, ĉu li vere malsanas. Li trovis timigite, ke nur langa radiko restas en la buŝo de Pan. Li demandis pri la kaŭzo, kaj Pan levis penikon kaj skribis: "Tio okazis eble pro tio, ke ni kelkaj ŝtelis kapron en la pasinta jaro. Kiam la kapro blekis, mi deigis ĝian langon el la buŝo."

Zheng Yuqing konsciis, ke la lango de Pan perdiĝis nur por kompenso al


la kapro. Li do ordonis al siaj subuloj okazigi budhisman ceremonion kiel rekompenco al la kapro. Li ordonis al Pan kopii la Lotusan Sutron (Saddharmapundarika-sutra).

Pan pentegis pri sia peko. Li ĵuris ne plu manĝi viandon, sed laŭeble favori kaprojn per bonaj agoj, budhismaj ceremonioj kaj preĝoj. Lia lango revenis post unu jaro.

Kiam li trovis, ke lia lango reaperis en la antaŭa formo, li tremis de surprizo. Li hastis al la oficejo kaj raportis tion al Zheng. Zheng laŭdis lin pri la firma volo kompensi kulpon. Kiam Pan kapablis paroli normale, Zheng promociis lin. Zheng estis tiel honesta kaj prudenta, ke ĉiuj laŭdis lin. Informiĝinte pri tio, Imperiestro Taizong (Li Shimin, 599 - 649), unu el la plej saĝaj regantoj en la ĉina historio,

promociis lin al posteno de revizoro, unu el la plej altaj postenoj en la kortego.

Zheng Yuqing raportis al la imperiestro, ke li promociigis ĝuste pro la meritoj favoraj al la kapro.



## 28. Puno pro krueleco



En Tang-dinastio (Tan) estis tre kruela kamparano.

Iutagmeze li iris al sia kampo por rigardi la plantaĵojn, kaj en la kampo li trovis bovon, kiun la najbaro uzis por plugi teron. La bovo manĝis kaj tretis la plantaĵojn.

La kamparano furioziĝis. "Mi plantis la plantaĵojn kun granda peno, kaj nun vi aŭdacas ŝteli kaj eĉ treti. Ĉu vi jam enuas pri via vivo?" Li do elprenis tranĉilon kaj kriegis: "Mi ne mortigos vin, sed vi manĝas miajn plantaĵojn, mi do detranĉos vian langon. Ĉu vi aŭdacos ŝteli plue?"


Eble la bovo komprenis, ke ĝi estas kulpa, ĉar ĝi mallevis la kapon kaj aspektis pentoplana. La malica kamparano kaptis ĝin je la korno kaj detranĉis ĝian langon. La bovo sin detenis de bleko kvankam ĝi suferis

de granda doloro.

Poste, la senkora kamparano prenis edzinon kaj generis tri infanojn. Ĉiuj liaj infanoj perdis parolan kapablon ekde tiam, kiam ili komencis paroli duonjaron. Li ne sciis, pro kio la infanoj mutiĝis. Li portis la infanojn al famaj kuracistoj, sed ili havis nenian metodon kuraci la strangan malsanon.

Tiam la kamparano rememoris pri la bova lango, kiun li detranĉis antaŭ dek jaroj. Li konsciis, kio okazis al liaj infanoj. Li eksuferis punon pro sia propra krueleco.





## 29. Kuracisto testudo



Subite aŭdiĝis bruo kaj tumulto e la kuirejo: "Kaptu ĝin! Ĵetu ĝin en la kaldronon!" Kiam Huang Dehuan (Hŭan Dehŭan) aŭdis la bruon, li pensis, ke io okazas, kaj tuj alkuris rigardi. Li vidis testudon rampanta sur la planko. Ĝi aspektis vere kompatinda. Huang demandis al la kuiristoj, kial ili bruas pro la malgranda testudo.

"Ni estis kuirantaj ĝin por vi, Sinjoro. Mi levis la kovrilon de la kaldrono por vidi, ĉu ĝi estas bone kuirita, sed ĝi kaptis la kovrilon kaj elrampis. Ĝia dorso jam vundiĝis, sed ĝi ankoraŭ kapablas movi la kapon kaj krurojn. Tio timigis nin."

Huang Dehuan do ordonis la kuiristojn, ke ili portu la testudon al rivero kaj forliberigu ĝin. Li decidis ne plu turmenti bestojn por manĝi. Li

estis vegetarano ekde tiam.

Iam post pluraj jaroj, Huang suferis de serioza febro. Liaj familianoj portis lin al riverbordo por ke la malvarmeta brizo komfortigu lin.


Iunokte li trovis ion grimpi sur lian korpon, kaj tuj eksentis komfortecon.

Kiam la suno leviĝis, li sin trovis iom malvarma kaj pli komforta je la brusto. Li rigardis malsupren kaj trovis, ke lia brusto estas kovrita de koto. Sur la lito sidis testudo. Kiam ĝi vidis, ke li jam vekigis, ĝi kapsignis al li kaj rampis eksteren.

Tiutage, Huang resaniĝis de la febro kaj kapablis ellitiĝi. Liaj familianoj diris al li, ke li reakiris sian vivon el la morto. La kuracisto diris, ke eble li jam mortus se la testudo ne venus ĝustatempe por malvarmigi lin.

Huang diris al siaj familianoj, kiel grave estas ne mortigi bestojn. Li

vivis ĝis la aĝo de 80 jaroj kaj mortis  
pace sen ajna doloro aŭ malsano.



### 30. Bravaj kokoj



Iam ĉinoj vokis homon ne per lia nomo, sed per lia vico en la familio. En Quzhou-urbo (Ĉjuĝoŭ) estis malsupera oficisto, kiun ĉiuj nomis Fang (Fan) la Tria, ĉar li estis la tria filo de siaj gepatroj.

Fang la Tria estis bonkora kaj plaĉis al ĉiuj. Iutage li iris al Familio Hou (Hoŭ) por kolekti imposton.

"Frato Hou, mi jam petis, ke vi pagu ĉijaran imposton. Mi scias, ke neniu volas pagi, tamen mi devas plenumi la ordonon de mia superulo."

Hou la Dua diris afable: "Fang la Tria, vi scias bone, ke ĉijara rikolto estis sufiĉe malbona. Ni havas neniom por pagi. Ĉu vi bonvole prokrastu la pagigon je dek tagoj aŭ duonmonato? Eble ni kapablos kolekti iom da brulligno por vendi kaj gajni monon por pagi la imposton al la reĝo."

Dum Fang la Tria paŭzis por pripensi, Hou la Dua ordonis sian edzinon prepari manĝon por la gasto. Tuj kiam sinjorino Hou elpordiĝis kun kuireja tranĉilo en la mano, Fang kvazaŭ ekvidis virinon en bruna kostumo staranta ekster la pordo kaj petanta, ke li estu bonkora por savi ŝian vivon.

Ĝuste tiam, aŭdiĝis kokina klukado. Li tuj konsciis, ke la kokino estas bruna. Li do haste diris al Hou la Dua: "Mi jam manĝis. Nenion preparu por mi." La edzino de Hou la Dua demetis sian tranĉilon, kaj la kokino estis savita.

Kiam Fang revenis al Familio Hou por la imposto post semajnoj, la bruna kokino bonvenigis lin respektoplene ekster la pordo. Ĝi vicigis siajn idojn kaj ili ĝojis vidi lin.

Fang prenis la monon kaj eliris. Kiam li ekgrimpis monton malproksiman, trapasinte rojon ĉe la

kampo de Familio Hou, tigro trudiĝis el la arbaro kaj sin ĵetis al li. Fang la Tria dronis en granda teruro. Li povis fari nenion ol fermi siajn okulojn por akcepti la eventualan katastrofon.

Tiam li aŭdis strangan bruon, li malfermis la okulojn kaj vidis, ke la kokino kaj kokidoj kune atakas la tigron. Kiel kokoj kapablis batali kontraŭ tigro? Ili flugis supren kaj bekpikadis ĝiajn okulojn. La tigro forfuĝis vekriante.

Fang la Tria perdis sian konscion. Kiam li vekiĝis, li revenis al Familio Hou kaj aĉetis la kokinon kaj ĉiujn ĝiajn idojn je tre alta prezo. Li portis ilin hejmen kaj prizorgis ilin por ĉiam.





### 31. Kompatemo al vivestaĵoj



En Ming-dinastio (Min, 1368-1644 p. K.) estis upasako nomata Wang Cheng (Ĥan Ĉen). Li ĉiam fervore helpis aliajn, precipe malriĉulojn kaj orfojn.

Wang Cheng litaniis sutrojn ĉiutage. Li estis tre pia, sed pro io li ne obeis nur unu el la budhismaj reguloj: li ne estis vegetarano.

Li vivis dum malbona periodo. En la lando regis multaj katastrofoj, kaj tumultis banditoj kaj aliaj kontraŭleĝaj aferoj. Li aŭdis, ke en iu kaverno vivas bonzo, kiu praktikas budhismon diligente kaj scipovas aŭguri pri la estinteco kaj estonteco. Li bone sciis pri la nunaj kaŭzoj kaj la estontaj rezultoj. Wang Cheng decidis viziti lin por peti instruon, malgraŭ la vojo longa kaj danĝera.

Poste, Wang Cheng atingis la

kavernon de la bonzo post multaj malfacilaĵoj. Li salutis la bonzon: "Via Honora Majstro, la nuna mondo plenas de banditoj kaj kontraŭlegiaĵoj. Oni estas subpremata de tiuj posedantaj armilojn. Ni ne scias kiel daŭrigi nian vivon. Ni dronas en granda katastrofo. Mi vizitas vin speciale por peti vian favoron helpi nin pluvivi."

La bonzo ridetis: "Vi estas Wang Cheng, ĉu ne? "

Wang surpriziĝis. "Jes, Majstro. Sed kiel vi scias mian nomon? Kio estas via honora instruo?"

"Se vi ne estas vegetarano, vi nur vane donas vian tempon al tiuj problemoj."

Wang Cheng demandis insiste, sed la bonzo respondis neniom plue. Wang Cheng povis fari nenion alian ol hejmenreveni kaj pripensadi, kion li lernis. Li faris decidon ne plu manĝi viandon.

Wang Cheng reiris al la kaverno

post pluraj jaroj. Vidinte lin, la bonzo ridis: "Bone, vi komprenis tion. Vi finfine memoras la instruon pri kompatemo en la koro."

"Ni vivas en la periodo, en kiu oni reciproke superruzas. La lando plenas de banditoj. Nur tiuj, kiuj ne mortigas, povas vivi pace. Tio estas la ekvilibro de la universo."

Dirinte, la bonzo fermis siajn okulojn kaj daŭrigis sian kontempladon.

Wang Cheng revenis hejmen kaj instruis al ĉiuj, ke neniu el tiuj, kiuj mortigas vivestaĵojn, povas ĝui pacon, ĉar mortigo kaŭzas mortigon. Se vi manĝas viandon, vi certe respondecas pri mortigado. Tiel, eĉ se vi faras bonajn aferojn, vi ne povas ĝui la veran pacon. Por ĝui pacon, vi devas klopodi por krei pacon anstataŭ kaŭzi suferon. La plej bona metodo por tio estas respekti ĉian vivestaĵon kaj manĝi nur vegetaran manĝaĵon.



## 32. Ideala festeno por naskiĝtago



Avino Xu estis patrino de Imperia-akademiano Xu en la kortego. Ili vivis en Kunshan-gubernio (Kunŝan) dum Ming-dinastio (Min).

Avino Xu estis vegetaranino dum sia tuta vivo. Ŝi emis fari bonajn aferojn, kaj helpadis malriĉulojn per sia tuta kapablo. Ŝi faris budhisman praktikon matene kaj vespere, kaj ne forgesis tion eĉ en unu tago.

Ŝi estis afabla al siaj infanoj, kaj ĉiuj infanoj estis fidelaj al ŝi. Ili vivis feliĉe kaj harmonie.

En 1637, Avino Xu celebris sian sesdekan naskiĝtagon. La sesdeka naskiĝtago estis grava por ĉinoj, sed ŝi ne celebris la feston per kukoj kaj kandeloj. Tri tagojn antaŭ la naskiĝtago, ŝi ordonis siajn infanojn pretigi manĝaĵojn kaj monon por ĉiuj

malriĉuloj en la regiono.

La malriĉuloj kolektiĝis en ŝian domon je la naskiĝtago, kaj ili ĉiuj estis feliĉaj. La bongusta festeno estis preparita per vegetaraj manĝaĵoj. Ĉiuj manĝis ĝissate.

La amikoj kaj parencoj de Avino Xu alvenis celebri la feston. Ĉinoj kutime donis nur monon anstataŭ alian donacon je la naskiĝtago, do Avino Xu ricevis multe da mono pro tio. Ŝi alvenigis sian nepon kaj diris: "Per la mono presu La Lotusan Sutron por ĉiuj amikoj kaj parencoj."

En tiu epoko, la libropresado estis tre malfacila, kaj libroj estis rare haveblaj. Por presi libron oni devis gravuri ideogramojn sur lignotabulo, unu sub alia kaj paĝon post paĝo. La Lotusan Sutron oni elpresis post tri jaroj.

La sutro estis preta ĵus antaŭ ŝia 63-a naskiĝtago. Ŝi invitis ĉiujn siajn amikojn kaj parencojn al sia

naskiĝtaga festeno, kaj ĉi-foje, ŝi donacis La Lotusan Sutron po unu ekzemplero al ili.

Avino Xu ĝuis longan vivon. Ŝi restis sana kaj vigloplena je la aĝo de okdek jaroj, kaj ŝi ĉiam havis bonan apetiton. Ĉiuj diris, ke ŝi aspektas ne pli ol sesdek-jara. Ŝiaj gefiloj kaj genepoj diris, ke ili estas tre feliĉaj kaj prosperaj, ĉar ĉiuj el ili estas vegetaranoj, kaj krome, Avino Xu faris tiel multajn bonajn agojn. Ŝi vivis ĝis pli ol naŭdek jaroj kaj forpasis plezure sen ajna malsano.





### 33. Sorto ŝanĝebla



Yuan Liuzhuang (Jŭan Liŭĝŭan) estis sperta sorto-divenisto. Li kapablis aŭguri la sorton de homoj laŭ linioj sur la manplatoj kaj formo de la nazo. Iam supera oficisto portis sian fileton al Yuan por informiĝi pri lia futuro. Yuan sciis senprokraste, ke la malgranda knabo mortos post kelkaj jaroj. Li diris tion al la oficisto.

La oficisto estis malĝojega. Survoje al la hejmo li renkontis bonzon. La bonzo demandis: "Pro kio vi aspektas tiel malĝoja?" La oficisto respondis, ke li havas malbonan informon pri sia filo. La bonzo pririgardis la knabeton kaj esploris lian sorton. Li proponis al la oficisto: "Nur per merito vi povas savi vian filon. Sed ne estas ĉiam bona ŝanco por tio. Se vi volas akumuli meritojn, la plej bona metodo estas liberigi

bestojn. Per tio vi povas savi vian filon."

La oficisto faris ĵuron senprokraste, ke li laŭeble liberigos bestojn el danĝero kaj ne plu mortigos ilin. Li laboris diligente dum pluraj jaroj, sed kiam li renkontis la bonzon, la bonzo diris: "Ne sufiĉas. Vi ankoraŭ ne akumulis sufiĉajn meritojn por savi vian filon."

La patro laboris des pli diligente por savi pli da bestoj laŭeble. Kiam ajn estis bonŝanco por favori aliajn, ĉu homojn ĉu bestojn, li ĉiam estis la unua por donaci monon kaj tempon. Tiel li savis sennombrajn vivestaĵojn. Atinginte la aĝon destinitan al morto, lia filo vivis plu kaj elkreskis sane.

Poste, Yuan Liuzhuang informiĝis pri tio. Ekde tiam, kiam ajn li vidis homon kun malbona sorto, li ĉiam instigis tiun fari bonajn aferojn kaj savi vivestaĵojn. Tiel, multaj homoj destinitaj al morto en mizero, ĝuis

longan vivon, kaj tiuj destinitaj al  
malriĉo, fariĝis riĉuloj.



## 34. Plilongigi vivon



Tu Qinwu (Tu Ĉin'u), la estro de Qiantang-gubernio (Ĉjantan) en Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan) malsaniĝis. Kuracisto malatente donis al li eraran medicinaĵon, kaj pro tio li preskaŭ perdis sian vivon.

Tu Qinwu ekkonsciis, kiel valora kaj efemera estas la homa vivo, li do faris ĵuron: "Mi ĵuras, ke mi dediĉos mian tutan vivon helpi aliajn kaj savi la mondon. La plej grava tasko por mi estas savi ĉiujn vivestaĵojn en la mondo kaj penti pri miaj estintaj pekoj. Krom tio mi pripensos nenion alian."

Iutage, Bodisatvo Avalokiteŝvaro, la Kompatema Savanto en la homa mondo, venis en lian sonĝon kaj diris: "En via pasinta vivo vi estis oficisto de Chu-regno (Ĉu). Kvankam honesta, vi estis tro rigora, tiel ke al la aliaj vi

kaŭzis grandan suferon, kio devus esti evitata. Vi estis nek avara nek egoisma, sed via malbona konduto perdigos al vi la postenon. Kaj krome, vi manĝis multajn vivestaĵojn, kaj via vivo mallongiĝos rezulte de tio.

"Feliĉe, la malsano elvekis vian konsciencon kaj vi faris elkoran ĵuron. Vi firmvole decidis helpi la aliajn kaj nutri nenian malamon en via koro. Se vi deziras vivi pli longe, la plej granda merito por tio estas savi vivestaĵojn. Savu vivestaĵojn malliberigitajn en la kaĝoj aŭ bredatajn por mortigo. Tio ankaŭ plialtigos vian postenon. Memoru kaj bone agu!"

Vekiĝinte, Tu Qinwu tuj ordonis al siaj familianoj, ke ili ne plu mortigu bestojn. Li komencis donaci monon por liberigi mortigotajn bestojn.

Poste, li estis promociita kiel estro de Jiujiang-gubernio (Ĝjuĝjan) vintre, kaj en la sekva printempo, li resaniĝis el ĉiuj suferoj. Li estis tre dankema

al la budhoj kaj bodisatvoj. Li ĉiam  
memoris sian ĵuron helpi al la aliaj,  
kaj admonis homojn ne plu mortigi,  
sed laŭeble liberigi vivestaĵojn.

Tu estis honesta, kaj ĉiam faris  
sian taskon atenteme. Li ĝuis longan  
vivon kaj fine mortis hejme en  
maljuneco.





## 35. Seninfana riĉulo



En Yuan-dinastio (Jŭan, 1279-1367), mongoloj gvidataj de Ĉingis Ĥano konkeris Ĉinion. Tiam vivis riĉulo kun multe da havaĵoj, sed sen infano. Li kaj lia edzino vivis en granda soleco. Ili deziregis filon, sed la deziro neniam realiĝis.

La riĉulo ĉiam malĝojis pro tio. Li ofte suspiris: "Pro kio miaj riĉaĵoj utilos al mi, se mi havos neniun infanon por heredi ilin?"

"Kial vi ne vizitu la proksiman templon kaj konsultu tiean bonzon?" proponis amiko. "Li povas scii la pasintecon kaj aŭguri la estontecon. Li povas vin helpi, eĉ se neniuj aliaj povas tion fari."

La riĉaj geedzoj do iris al la templo, kaj esprimis sian estimon al la budhoj. Kiam ili vidis la bonzon, ili genuiĝis kaj klinis sian kapon

respektoplene al la tero.

"Honora Majstro, mi petas vin sciigi al ni, kio eraras en ni. Ni deziras infanon multe pli ol ĉion alian, sed nia deziro neniam realiĝis."

La bonzo, farinte budhisman manovron, diris al la riĉulo: "Vi ŝuldis tro multe en la pasintaj vivoj pro mortigo de vivestaĵoj. Vi mortigis la idojn de multaj bestoj, kaj en ĉi tiu vivo, vi havos neniun infanon propran.

"La ŝuldo estis tiel peza, ke estas sufiĉe malfacile por repagi. Vi devas bedaŭri kaj penti. Se vi povos savi milionojn da vivoj, vi likvidos la ŝuldon. Se vi mortigos insekton aŭ vermon, eĉ pro malatento, vi devos savi cent aŭ pliajn vivojn kompanse.

"Tio estas la plej bona rimedo por ŝanĝi vian sorton kaj havi infanon."

La riĉulo ege emociiĝis. Li iris en la ĉefan halon de la templo kaj faris ĵuron antaŭ la budhoj, ke ili ne plu mortigos la vivestaĵojn. Kiam la

geedzoj revenis hejmen, ili eklaboris por savi vivestaĵojn, kaj elspezis plej multe da havaĵoj por tio. Ili aĉetis porkojn, kokojn kaj anasojn de la bazaro, kaj aranĝis, ke ili vivu libere en la templo ĝis la natura morto. Ili aĉetis fiŝojn, krabojn, angilojn kaj metis ilin en riveron. Ili estis tre piaj al budhismo kaj partoprenis en diversaj ceremonioj en la templo por kompensi sian antaŭan pekon.

Ili persistis dum multaj jaroj. Longan tempon antaŭ ol ili savis milionon da vivoj, naskiĝis al ili knabo plaĉa kaj sana.

Ilia filo estis tiel inteligenta, ke elkreskinte li trapasis la kortegan ekzamenon je la unua fojo.



## 36. Valora vivo



Antaŭ longa tempo iu nomata Wang Dalin (Ŭan Dalin) vivis en Suzhou-urbo (Suĝou). Ĉiuj vivestaĵoj estis valoraj en liaj okuloj. Li ĉiam aĉetis bestojn kaj liberigis ilin el kaĝoj.

Kiam ajn geknaboj en vilaĝo kaptis fiŝojn, birdojn aŭ insektojn, li ĉiam pagis por liberigi. Li kutime diris al la geknaboj: "Estas malbone mortigi bestojn. Ĉu vi ne vidas, kiel feliĉe la birdoj flugas en la arbaro? Kiam vi kaptas ilin, pripensu, kiel maltrankviliĝas iliaj gepatroj. Rigardu, kiel feliĉe naĝas la fiŝoj en akvo. Ili naĝas tien kaj reen ĝojplene. Ili beligas nian vidaĵon. Pro kio vi volas ilin kapti kaj peli al morto? Vi vere ne rajtas mortigi vivestaĵojn."

La geknaboj revenis hejmen kaj rakontis al siaj gepatroj, kion diris

Wang. Liaj gepatroj konsentis kun li.


Foje, Wang malsaniĝis. Li suferis de nekuracebla malsano. Kuracisto proponis al liaj familianoj, ke ili elfosu tombon por li. Apenaŭ li estis mortanta, kiam li aŭdis dion parolanta al li. Li eĉ ne aŭdacis kredi siajn proprajn orelojn.

La dio diris al li: "Wang Dalin, nun estas la tempo antaŭe destinita por via morto. Sed vi savis tiel multajn vivojn, ke vi savis ankaŭ vin mem. Vi ne mortos je la nuna tempo."

Wang malfermis la okulojn eksteratende. "Mi ankoraŭ vivas!" li diris al la familianoj. Poste, li ellitiĝis kaj tute resaniĝis.

Li vivis ĝis la aĝo de 97 jaroj. Liaj filoj, nepoj, pranepoj kaj prapranepoj vivis kune kun li en granda feliĉo kaj profunda harmonio.

Wang estis tiel fortuna pro tio, ke li havis bonan koron kaj opiniis ĉiujn vivojn same valoraj.





## 37. Malfeliĉa rakonto



Nun mi rakontu al vi malfeliĉan historion. Antaŭ longa tempo estis kortega oficisto.

Li plej ŝatis manĝi anserajn piedojn kaj kapran koron. Kiam li volis manĝi anserajn piedojn, li ordonis al kuiristo ligi anseron sur fera poteto super brulanta fajro. Kiam la fajro varmigis la poteton, la ansero baraktis kaj kriis, sed tio ne povis moligi la ŝtonan koron de la oficisto. La anseraj piedoj ŝvelis de la bruligo, kaj ĝia sango akumuligis en la piedojn kiam ĝi mortis de sufero. Kiel kruele la oficisto preparis sian manĝaĵon.

Poste, la oficisto ordonis ligi kapron al arbo. Lia kuiristo senfeligis ĝin viva ĉe la ripoj, etendis la manon en ĝian korpon kaj eltiris ĝiajn koron kaj hepaton. Ili kuiris kaprajn koron kaj hepaton kaj alportis vinon. La

mizera kapro blekis dolore ĝis la morto.

La oficisto mortigis multajn anserojn kaj kaprojn en tiel bruta maniero.

Iutage, klerulo admonis lin ŝanĝi la malbonan konduton kaj ne plu mortigi senkulpajn bestojn. Anstataŭ akcepti la admonon, la oficisto insultis lin kolere per diversaj fivortoj.

"Vi mortos de gangreno," dirinte, la klerulo foriris.

La oficisto blasfemis des pli furioze. Sed post nelonge, li suferis de gangreno tra la tuta korpo. Ĉiutage li suferis dolore. Multaj famaj kuracistoj provis laŭ sia kapablo, sed neniu povis lin resanigi. Li mortis post nelonge, kaj lia korpo odoris tiel haladze, ke neniu volis proksimiĝi.



## 38. Terura morto



En 1732 viro nomata Wei (Ŭej) vivis en Wuxing-urbo (Uŝjin). Li havis pafilon kaj pafis centojn da birdoj por vendi aŭ manĝi kun vino.

Wei ankaŭ ŝatis kapti angilojn, ranojn kaj testudojn. Iam li eĉ metis venenon en lagon por mortigi fiŝojn. Krom tio, li ankaŭ renversis nestojn kaj forprenis birdajn ovojn.

Liaj amikoj admonis lin: "Maljuna Wei, vi devas ĉesigi la mortigadon. Vi povas terkulturi aŭ fari alian laboron."

Maljuna Wei neniam akceptis ilian admonon. Anstataŭe, li kutime diris al ili, ke ili zorgu nur pri sia propra afero.

Maljuna Wei sin ŝargis per granda sanga ŝuldo dum longaj jaroj. Poste, li suferis de furunkoj tra la tuta korpo. Iuj furunkoj estis tiel grandaj kiel pigaj ovojn, kaj ĉiu furunko havis

malmolan peceton tiel grandan kiel kuglo en la centro. Lia tuta korpo estis plena de puso. Tio dolorigis lin tiel, ke li vekriis kiel diablo torturata en la infero.

Wei mortis de sufero finfine post kelkaj tagoj. Lia familio aĉetis ĉerkon por li. Kiam ili okupiĝis pri la funebro, ili aŭdis strangan sonon. Ili rigardis kaj vidis, ke centoj da bestoj entrudiĝis en ilian domon. Ili stuporiĝis de tio.

Ili vidis mirigite, ke la birdoj, kaproj, testudoj, kaj ranoj svarmas en la ĉambrom de lia kadavro. Antaŭ ilia reago ĉiuj bestoj sturmis al la korpo de Maljuna Wei kaj ĝin mordis, ŝiris, gratis, batis, ungis kaj bekis. Iuj el la bestoj eĉ tretis la kadavron per la piedoj, dum la aliaj frapis ĝin per la kapo. Vere timiga kaj nekredebla vidaĵo!

Lia familio sciis, ke tio estas rezulto de liaj fiagoj. Momenton poste,

nenio restis en la kadavro de Maljuna  
Wei krom la ostoj.



## 39. Terura festeno



Iam estis oficisto. Li ĵuris neniam mortigi vivestaĵojn, sed lia edzino estis malica kaj frandema. Ĉiutage ŝi mortigis plurajn bestojn por bongusta plado. Ŝia edzo neniam manĝis viandon el mortigitaj bestoj.

Iutage ŝi ordonis pretigi abundan festenon por celebri ŝian naskiĝtagon. Vekriis malĝoje ĉiuj porkoj, ŝafoj, kokinoj, kaj anasoj, ĉar ili sciis, ke venos ilia fino.

Vidinte tion, la oficisto sentis grandan bedaŭron. Li admonis sian edzinon: "Morgaŭ estos via naskiĝtago, sed ĉiuj ĉi bestoj mortos pro tio. Kompatu ilin kaj ne faru malbonan aferon."

Tio flamigis ŝin. Ŝi insultis: "Ĉu vi volas, ke mi fariĝu stulta budhano kaj ĵuru ne plu mortigi bestojn? Se ĉiuj tion farus, post pluraj jaroj ĉie estus



plene de bestoj. Mi ne agos laŭ via volaĉo. "

Ŝi atendis la festenon ĝojplene en la sekva tago. Kiam oni eltiris la unuan porkon kaj pikis ĝin per tranĉilo, ŝia animo iris en ĝian korpon. Ŝi sentis sian korpon pikata kaj dispecigata.

Poste, oni mortigis kapron, kaj ŝi suferis kiel la kapro kiam ĝi estis mortigata. Jen venis la vico de kokino, do ŝia animo iris en la kokinan korpon, kaj ŝi sentis sian kolon torde rompata. Ŝi neniam imagis tiel grandan suferon. Ĉiufoje, kiam iu ajn besto estis mortigata, ŝi sentis ĉiun ĝian doloron. Ŝi komprenis sian kulpon. Ŝi ordonis la kuiristojn, ke ili ĉesigu la mortigadon kaj liberigu la nebuĉitajn bestojn.

Ekde tiam ŝi ne mortigis vivestaĵojn nek manĝis viandon. Ŝi ĉiam rakontis al ĉiuj, kian doloron la bestoj suferas, kiam oni mortigas

ilin. Kiom senkompate oni mortigas  
bestojn ne kapablajn paroli!

Ŝi vivis longan vivon pro siaj bona  
konduito kaj kompatemo.



## 40. Vizito de animo-kolektanto



Zhao (Ĝaŭ) pasis la kortegan ekzamenon kaj gajnis akademian diplomon de Talentulo. Li estis bonkora kaj honesta, ĉiam atentema por ne damaĝi bestojn.

Iutage li iris viziti plurajn parencojn. Kiam la pramo, sur kiu li sidis, atingis la mezon de rivero, li rimarkis iun staranta sur la pramo. Strange, tiu aspektis kiel lia servisto mortinta antaŭ tri jaroj.

"Kion vi faras?" Zhao demandis lin.

"Mi laboras en la anima mondo. Mia profesio estas kolekti la animon de tiuj mortontaj," respondis la estinta servisto, "kaj hodiaŭ mi kolektos tri animojn."

"Kies?" demandis Zhao.

"Unu el ili vivas sur la bordo, la dua estas unu el viaj parencoj, kiujn vi

vizitos, la tria..."

"Kiu estas la tria?" demandis Zhao, sed lia estinta servisto respondis nenion. Zhao komprenis, ke la tria animo kolektota estas ĝuste lia.

La estinta servisto proponis, ke li ne timu: "Se ĉi-nokte mi ne iros al vi, ĉio estos en ordo."

"Pro kio?"

"Sur la vojo oni postulis min forlasi vin, ĉar vi estas bonkora kaj nenion mortigas."

Kiam Zhao atingis la domon de siaj parencoj, li aŭdis mornan ploradon. Iu mortis. Li sin returnis kaj revenis hejmen. Lia servisto ne iris al li tiunokte. Nenio do okazis.

Zhao havis longan kaj utilan vivon. Li estis feliĉa kaj prospera, ĉar li nenion mortigis. domaĝante la vivon de aliaj, vi protektas la propran.



## 41. Farmulo kaj serpento



Iam antaŭe, iu farmulo vivis en la sudo de Jiangshan-urbo (Ĝjanŝan), Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan). Li opiniis mortigon de bestoj amuza. Edziĝinte, kvankam li aĝis jam pli ol 40 jarojn, li havis nur unu filon. La malgranda knabo aĝis naŭ jarojn kiam okazis nia rakonto.

Tiutage en majo de 1868, la malica farmulo iris al sia kampo kun sarkilo sur la ŝultro. Li renkontis grandan serpenton sur la vojo. Kiam la serpento vidis lin, ĝi rigardis lin kun pardonpeta aspekto, kaj eletendis sian langon. Ŝajnis, ke ĝi estas timigita kaj petas lian indulgon.

"Mi mortigos vin sendube," diris la farmulo. La serpento komencis forkuri, sed la farmulo hakis ĝin en du pecojn per la sarkilo.

Kiam la serpento ne plu moviĝis,


la farmulo metis la sarkilon sur la ŝultron kaj daŭrigis sian vojon kantante plezure.

Tiunokte, lia filo songis, ke granda serpento mordas lin. Vekiĝinte pro timego, la knabeto febris kaj tremegis. Li murmuradis senĉese, "Dolore! Kiel dolore al mi!"

Lia patro ne sciis kion fari kontraŭ tio. Apenaŭ li volis inviti kuraciston, kiam lia filo etendis la langon— tiel longan, ke ĝi ne plu similis al tiu de knabeto, sed al tiu de serpento.

"Fileto, mia kara!" korŝire ekploris la farmulo, sed estis jam tro malfrue. Lia filo mortis post nelonge.





## 42. Venĝo de angiloj



Guizhou (Gujĝou) estas malriĉa regiono en Ĉinio. Ĝi estas monteca provinco en la sudokcidento. Tie vivis homo nomata Lu, kiu preferis angilaĵon tiel, ke sen ĝi li povis manĝi nenion alian.

Se iu demandis, pro kio li manĝis tiel multajn angilojn, li ĉiam respondis: "Ili estas vere bongustaj."

Iutage li, jam sesdek-jara, iris al bazaro por aĉeti angilojn freŝajn kaj dikajn.

Vendisto kriis: "Fiŝojn? Fiŝoj vivaj, freŝaj kaj dikaj! Aĉetu ĉi tie!"

"Ĉu vi havas angilojn?" demandis Lu. "En tiu urno," respondis la vendisto. Lu kuspis la manikon kaj etendis brakon en la urnon por elekti dikajn angilojn. Li estis tiel sperta, ke li kapablis elekti bongustajn angilojn nur per palpo anstataŭ per rigardo.

Sed la afero iris malsame tiutage. Kiam li etendis la brakon en la urnon, lia vizaĝo subite perdis ordinaran koloron, kaj li ekblekis kiel vundita bovo. Oni trovis, ke ĉiuj angiloj en la urno atakas lin je la brako kaj mordas lin laŭeble plej forte.

Neniu sciis kion fari. Ili neniel kapablis preni la angilojn for de lia brako. Iu kuris raporti al lia familio, kaj liaj gefiloj alkuris por savi lin per akra tondilo. Kiam ili detondis la angilojn, la kapo de la angiloj ankoraŭ restis sur la brako de ilia patro, kun la dentoj profunde enigitaj en la karnon. Kiam oni finfine elprenis la kapojn de la angiloj, la karno jam falis de lia brako, kaj li baldaŭ mortis pro doloro.



## 43. Veneno Wang



Lia nomo estis Wang (Ŭan), kaj oni nomis lin Veneno. Li loĝis en Hengling (Henlin) ekster Changzhou-urbo (Ĉangĝou), Jiangsu-provinco (Ĝjansu). Ĉe Hengling estis akreoj da fragmitoj, kaj tie vivis multaj paseroj. Veneno Wang bredis ferocan aglon kaj trejnigis ĝin zorgeme. Poste, li faris grandan reton kaj starigis ĝin en la fragmitejo. Li ellasis la aglon, por ke ĝi flugu tien kaj reen super la reto. Kiam la paseroj vidis sian naturan malamikon, ili disflugis ĉien panike, kaj multaj el ili sin entrudis en la reton de Veneno Wang. Oni ne povis teni la kaptitajn paserojn longe. Ili preferis sin mortigi demordinte la langon ol vivi longe en kaĝo. Kaj siaflanke Veneno Wang ne volis bredi ilin en kaĝo, tial, ilin kaptinte, li frakasis iliajn kapojn per granda ŝtono

kaj portis iliajn korpojn al bazaro por vendi kiel viandon. Tio estis lia vivrimedo, kaj li fieris pri sia artifiko.

Pro kio oni nomis lin Veneno? Li kondukis malice kaj kruele. Li ĉiam volis agi laŭ sia propra plaĉo, spite al ies admono. Se iu senatente tuŝis lian paseran reton, li blasfemadis lin per plej timigaj kaj malbonaj vortoj, kiujn li kapablis elpensi. Li povis senĉese insultadi tutan tagon. Pro tio, ĉiuj en la regiono lin konis kaj malestimis.

Finfine, li eksuferis de stranga malsano, kiun neniu el kuracistoj vidis antaŭe. La tuta korpo tiom doloris lin, kie li sin rulis tien kaj reen en lito. Li ĝemis, ploris, kaj petadis kuracistojn, sed neniu sciis, kiel kuraci lin. Li tute perdis la arogantecon, kaj lia vizaĝo distordiĝis pro doloro. Kiu ajn venis, li ĉiam petegis murmure: "Estu bonkora al mi, kaj bonvolu savi min!" Sed neniu sciis kion fari kontraŭ tio. Liaj najbaroj diris, ke liaj voĉo kaj aspekto

similas tiujn de la rete malliberigitaj paseroj.

Plurajn tagojn poste, la doloro tiom suferigis lin, ke li demordis sian langon kaj mortis. Li mortis en terura maniero, ĉar li havis teruran vivon.





## 44. Favoro al helikoj



En 1576, Han Shineng (Han Ŝinen) de Changzhou-urbo (Ĉangou), Jiangsu-provinco (Ĝjansu) songis, ke dio en brile ora kostumo diras al li: "Gratulon! Mi alportas ĝojigan novaĵon al vi. Vi promociigos al la plej alta posteno en la kortego."

Han ne aŭdacis kredi tion eĉ en la songo. "Pro kio?" li demandis la dion.


La dio respondis: "Via Honora Avo, Han Yongchun (Han Jungĉun), estis malriĉa. Kvankam li ne estis sufiĉe bonhava por vivteni la familion, tamen li ŝatis liberigi bestojn. Ĉiumatene, tuj kiam la suno leviĝis, li iris al la rojo ĉe sia domo kun balailo. Vi scias, ke helikoj kutime vagas el la rojo nokte. Via avo balais kaj remetis ilin en la rojon, por ke la homoj ne piedpremu ilin pro malatento. Iam li estis tre malriĉa kaj havis neniom

por manĝi, li do balais laŭ la rojo kilometrojn por forgesi la malsaton. Tiel li savis sennombrajn helikojn.

"Iuj kutime mokridis lin: 'Ĉu vi ne povas doni vian tempon por fari ion pli bonan?' Aliaj demandis: 'Se vi estas tiel malsata, kial vi ne manĝu helikojn? Vi ja scias bone, ke ili estas tre bongustaj.' Ili senĉese mokis kaj nomis lin malsaĝulo, sed li tute ne zorgis pri tio. Li daŭrigis la bonfaron, kio estas prava laŭ li. Li tute ne pensis, ke necesas atenti kion oni diras pri li. Tiel ĉiufoje kiam li remetis helikojn sekure en la akvon, li ĉiam ĝuis mirindajn kontentecon kaj feliĉon. Tian ĝuon oni ne povas aĉeti per mono.

"Via avo persiste faris tion en pli ol kvardek jaroj. Li savis tiel multajn vivojn, ke li ne nur rikoltis grandan fortunon al si mem, sed ankaŭ al siaj posteuloj dum multaj generacioj. Ankaŭ vi profitas de lia bonkoreco."

Tiam la sonĝo finiĝis. Han Shineng ekokupiĝis pri sia laboro. Poste, li vere promociiĝis pli kaj pli alten, ĝis fine li ricevis la postenon plej altan en ĉiuj ĉinaj kortegoj. La imperiestro sendis lin al Koreio kiel specialan misiulon. Li estis grava kaj potenca, kaj dank' al lia bonkoreco, lia familio prosperis dum multaj generacioj.



## 45. Prezo por kontraŭleĝo



En 1836 juĝisto de Jiangyin-gubernio (Ĝjanjin) faris novan leĝon malpermesi mortigon de ranoj, ĉar la ranoj manĝis fiinsektojn por protekti plantojn. Do oni ne plu rajtis mortigi ranojn por manĝi.

Kiam la leĝo publikiĝis, oni informis tion al Zhang Axi (Ĝan Aŝji). Zhang Axi kutime sin vivtenis kaptante kaj vendante ranojn. Li ne scipovis legi, tial li sciis nenion pri la nova leĝo. Aŭdinte tion, li tute ne ŝatis la informon.

"Bone, mi ne obeu tiun damnindan leĝon. Pro kio oni forlasos tiel bongustajn ranojn?" Li estis tiel malĝentila kaj obstina, ke liaj amikoj malsukcesis deadmoni lin de tia vivmaniero. Tiel li daŭre kaptis kaj mortigis ranojn.

Li ŝatis aĉeti kaj trinki vinon per

la mono gajnita pro la ranoj. Li ĉiam sin pravigis: "Kiel oni povus peki pro kaptado de ranoj? Rigardu, mi vivas sufiĉe bone."

Liaj amikoj respondis al li: "Jes, nun vi vivas bone, sed tio fakte estas malbona afero pro la kontraŭleĝeco."

Tio ege kolerigis Zhang Axi: "Kiom gravas la leĝo? Multaj homoj agas kontraŭ la leĝoj, ne nur mi mem!"

Iun ŝtorman nokton, Zhang Axi malaperis. En la sekva tago, kiam ĉesis la ŝtormo, la vilaĝanoj trovis lin finfine. Li falis en riveron kaj dronis. Tiaj aferoj povus okazi al iu ajn, tamen estis sufiĉe eksterordinare, ke centoj da ranoj venis kaj manĝis lian kadavron por venĝi siajn parencojn mortigitajn de li.

Neniu vidis tiel teruran bildon antaŭe. Ili ekkonsciis profunde, ke eĉ se iu povas eskapi de la ŝtata leĝo, tiu ne povas eskapi de la universa leĝo.

Pro la bona konduto ni estos

rekompencitaj per feliĉigo, kaj pro la malbona konduto ni estos punitaj per malfeliĉigo. Tio okazos senescepte pli-malpli-frue.





## 46. Ekzekuto de angiloj



En "Rekordo pri Vasta Amo", Meng Ping'an (Men Pin'an) notis jenan historion:

En Suzhou-urbo (Suĝou) estis tre fama restoracio de angilaj nudeloj. La mastro estis maliculo kruela kaj egoisma. Lia restoracio estis pli prospera ol tiuj de liaj konkurantoj, ĉar li elpensis sagacan metodon por kuiri angilojn. Li vicigis najlojn en la vaporumilo, kaj metis vivajn angilojn enen. Post kiam li metis la vaporumilon super la kaldronon en kiu nudeloj estis kuirataj, la angiloj en la vaporumilo movadis tien kaj reen panike por eskapi. Ilia korpo estis tranĉita pro la najloj kaj la sango fluis en la kaldronon. Multaj klientoj opiniis, ke tiaj nudeloj estas bongustegaj.

Iun tagon, li kalkulis konton per

abako. Li levis la kapon kaj ridegis:  
"Ha! Mi pli kaj pli riĉiĝas!"

"Paĉjo," diris lia filo, "ni faru alian negocon. Estas tro kruele gajni monon tiamaniere eĉ se ni pli kaj pli riĉiĝas."

"Malsaĝuleto! Por kio ni vivas anstataŭ por mono? For! Alian negocon? Per kia negoco ni povas enspezi tiel multe? Vi estas plena de absurdaĵoj!"

Iutage, la mastro ne plu vidiĝis. Lia filo serĉis lin en diversaj lokoj. Fine, najbaro alkuris kaj kriis: "Ni jam trovis lin. Rapidu! Li estas en la rivero."

La junulo kuris al la bordo, kie ĉiuj vilaĝanoj staris kaj rigardis la strangan vidaĵon. Lia patro estis dronigata de centoj da angiloj, kiuj trenis lin en la akvon ĝis lia morto.



## 47. Mono sangomakulita



Zhao Yong (Ĝaŭ Jun) estis kolportisto en Jiaxing-gubernio (Ĝjaŝjin), Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan). Li kaptis kaj vendis krabojn por vivtenado, kaj mortigis multajn vivestaĵojn tiamaniere. Li tutkore plenumis filecan devon al sia patrino. Li elspezis neniom el la gajnita mono por si mem, sed nur por prizorgi sian maljunan patrinon. Ĉiuj diris, ke li estas filo bonega.

Kvankam la filo estis bona, tamen la patrino estis malica. Ŝi neniam instruis sian filon fari bonajn agojn. Ŝi elspezis ĉiun moneron de la filo nur por manĝi kaj drinki.

Ŝi eksuferis de malsano, kaj ĝemadis pro doloro kuŝante en la lito. Foje, kiam Zhao Yong revenis hejmen, li estis terurigita de la vidaĵo. Lia patrino kondukis tute freneze.


Ŝi enbuŝigis kaj englutis la kanaban ŝnuron, kiun Zhao Yong uzis por ligi la krabojn. Zhao Yong hastis por haltigi ŝin, tamen ŝi forpuŝis lin. Iom poste, ŝi eltiris la ŝnuron, sed apenaŭ ŝi elbuŝigis ĝin, ŝi denove englutis ĝin. Ŝi ĝemadis kaj vomadis senĉese. La najbaroj aŭdis la bruon kaj alvenis por rigardi la okazaĵon.

La ŝnuro estis kovrita de sango kaj malpuraĵo de ŝia internaĵo, kaj la ĉambro estis plena de fiodoro. Estis tiel fiodore, ke multaj najbaroj ne povis sin deteni de vomado.

Fine sinjorino Zhao sin klinis al la kapkuseno kaj diris anhelante, "Mia filo mortigis multajn krabojn por gajni monon. Tio estas peko kontraŭ la naturo, sed li almenaŭ estas fidela kaj nur uzas la monon por vivteni min. Mi ne uzis la monon en ĝusta maniero! Mi elspezis la sangomakulitan monon nur por manĝi kaj drinki, tial mi havas timindan ŝuldon por pagi. Mi

devas purigi mian internaĵon, alie, mi suferos des pli grandan doloron pro mia malico."

Zhao Yong bedaŭris, ke li sin vivtenas per la sufero de tiel multaj senkulpaj kraboj. La patrino kaj filo ploradis kaj ploradis senĉese. Nelonge poste, la patrino de Zhao Yong mortis mizere.



## 48. Birdoj omaĝaj al imperiestro



"Ĉu mia edzo povos resaniĝi, Kuracisto?" demandis sinjorino Xie (Ŝje).

La kuracisto skuis la kapon kaj respondis nenion.

Xie suferis de granda furunko sur la dorso, kaj ĉirkaŭ la granda furunko estis multaj malgrandaj. La kuracistoj provis diversajn metodojn kaj medikamentojn por tio, sed neniu efikis.

Kuracisto Lin diris: "Lia malsano estas ne kuracebla per ordinaraj metodoj. Neniu medicinaĵo aĉetebla per mono povas kuraci lin."

Iu el la lertaj kuracistoj diris: "Tio estas malsano tre rara, tiel rara, ke eble vi eĉ neniam aŭdis. Ĝi nomiĝas 'Birdoj omaĝaj al imperiestro'." Aŭdinte tion, sinjorino Xie ekkriis kaj



svenis.


Xie estis tre riĉa. Li komencis sian vivon kiel malriĉa knabo, kaj laboris diligente kaj honeste por ligna komerco. Li vere ne havis aliajn malbonajn kutimojn, krom nur unu mankon komunan al multaj ĉinoj: Li estis frandema. Kiam ajn li okazigis festenon, li elspezadis laŭeble plej multe por eksterordinaraj pladoj.

Li preferis ian grandan kaj abundan pladon. Oni mortigis grandan kaj dikan anason, kaj plenigis ĝian ventron per paseroj antaŭ la kuirado. Kiam la plado estis preta, la manĝantoj malkovris la anasan ventron per manĝbastonetoj, kaj trovis la paserojn en la anaso. La plado estis nomata "Birdoj omaĝaj al imperiestro".

Jen kial sinjorino Xie terurigis je la vortoj de la kuracisto. La malsano de la edzo havis la saman nomon de lia preferata plado. Por la festenoj dum

multaj jaroj, Xie mortigis tiom da birdoj, ke li mem eksuferis pro tio.

Iu ajn, kiu iam havis furunkon, scias bone, kian doloron li suferis. La tuta dorso de Xie estis plena de furunkoj. Ili ne nur doloris, sed ankaŭ fiodoris. Li suferis plurajn monatojn kaj finfine mortis. Li suferigis tiel multajn bestojn, do lia riĉaĵo donis al li nenian helpon.



## 49. Imuneco sen vakcinado



Shen Wenbao (Ŝen Ŭenbaŭ) loĝis ĉe la granda lago Taihu (Tajhu). Li estis ĝentila kaj bonkora. Lia tuta familio kondukis same bone kiel li. Ili ĉiam malliberigis bestojn laŭeble.

"Ĉu vi jam liberigis la birdojn, kiujn mi aĉetis de ĉasistoj tagmeze?" demandis Shen la edzinon.

"Jes, mi jam liberigis ĉiujn," ŝi respondis. "Bonege!" diris Shen. "Nun ili povas libere flugi kien ajn laŭplaĉe. Ili povas flugi alte sur la ĉielo aŭ ripozi kviete sur branĉoj en la arbaro." Pensante pri tio, Shen estis tiel feliĉa, ke li ekridis elkore.

Multaj homoj en la regiono senĉese kaptis kaj mortigis bestojn. Nur gesinjoroj Shen estis malsamaj. Kiam iliaj najbaroj kaptis bestojn, ili ĉiam aĉetis tiel multe laŭeble por liberigi. La najbaroj certigis al si, ke

ili estas frenezaj: "Kial ili elspezas monon por kelkaj birdoj? Kian bonon tio donos al ili? "

"Ili estas nur malsaĝuloj!" ofte tiel konkludis la najbaroj.

Sed iunokte, ĉiuj endormiĝis krom Maljuna Li, kiu suferis de sendormeco. Li aŭdis bruon el la strato. Apenaŭ li rigardis eksteren, li falis teren terurigite.

En la strato li vidis du demonojn semantaj epidemion. Nun ni certe diras, ke virusoj kaŭzas epidemion. Eble la virusoj estas speco de demonoj. Malgraŭ ĉio, virusoj estas timigaj eĉ en imago. La demonoj, kiujn Maljuna Li vidis, certe estis teruraj. Ili portis multe da flagetoj en la mano.


Unu el la demonoj demandis: "Ĉu flageto po unu domo? "

"Prave," respondis la alia, "Sed ne al tiu domo. Jen la domo de gesinjoroj Shen. Ili savis multajn bestojn, do ni

rajtas fari nenion kontraŭ ili."

En pluraj tagoj, terura epidemio balais la regionon ĉirkaŭ Taihu-lago. En malpli ol unu semajno, pli ol duono de homoj mortis de malsano.

Sed strange, neniu en la familio Shen suferis la malsanon. Liaj najbaroj eksciis de tio, ke gesinjoroj Shen gajnis rekompenco per sia bona konduto. Shen Wenbao vivis ĝis maljuneco kaj mortis pace sen ajna sufero.



## 50. Venĝo de ranoj



Iam estis barbiro nomata Liang Jiashou (Ljan Ĝjaŝou) en Wuweigubernio (Uŭej), Anhui-provinco (Anhŭi). Lia kapo estis tiel pinta je la verto kiel tiu de cervo, kaj liaj okuloj estis tiel malgrandaj kiel tiuj de rato. Li estis eksterordinare malbela. Sed la ekstera malbeleco estis nenio kompare kun lia malica koro. Li ĉiam emis kvereli kaj ĉantaĝi. Li neniam provis plibonigi siajn konduton kaj sintenon.

Li estis ankaŭ tre avida. Liaj preferataj manĝaĵoj estis ranoj, kiujn la ĉinoj nomas "Kokoj de la Kampo". Li tute ne povis manĝi sen ranoj. Li ankaŭ scipovis kuiri ranojn en multaj metodoj. Li havis multajn amikojn, kiuj estis ne malpli fiaj ol li. Ili ĉiuj laŭdis, ke la ranoj kuiritaj de Liang Jiashou estas plej bongustaj.

Ju pli la frandemuloj laŭdis lin,



des pli da ranoj li mortigis, kvazaŭ la ranoj estus liaj malamikoj. Li tiel agis ĝis li atingis 40 jarojn.

Iunokte apenaŭ li dronis en profunda dormo, li eksentis jukon en la tuta korpo. Li vekiĝis kaj vidis, ke lia tuta lito estas plena de ranoj. La ranoj kovris la litkovrilojn kaj kapkusenon. Ĉie estis ranoj.

"Strange!" li murmuris al si mem, "Bonege! Mi scias bone, kion mi faru kontraŭ ili." Li kaptis la ranojn kaj metis ilin en la kaldronon. Kiam li revenis en la dormĉambbron, li trovis, ke la lito estas kovrita de pli da ranoj.

Liang trapasis la tutan nokton por la ranoj. Li senĉese kaptadis ilin de la lito. En la sekva tago, li alvenigis plurajn amikojn kaj diris al ili, kiel li pasigis la nokton kaptante ranojn de la lito. Sed liaj amikoj neniel povis imagi pri tio.

Subite, Liang sin kaptis je la ŝultro. "Jen revenas la ranoj!" li kriis.

"Mi vidas nenion!" diris unu el la amikoj. "Jen! Ĉi tie, estas rano sur miaj brovoj!"

Nun alia estas en miaj haroj!" Liang teruriĝis, kaj ankaŭ liaj amikoj konfuziĝis. Ili ne povis vidi eĉ ombbron de la ranoj. Ili nur vidis, ke Liang kuregas, baraktas, kaj per razilo forrazas siajn harojn kaj brovojn. Sed ili vidis neniun ranon. "Eble li freneziĝis!" ili flustris.

Ekde tiam, Liang vidis ranojn atakantaj lin ĉiutage. Li provis sin defendi per la razilo, sed la ranoj senĉese venis. Li petis, ke liaj amikoj helpu, sed neniu krom li kapablis vidi la tiel nomatajn ranojn. Li vivis freneze ses monatojn antaŭ ol morti finfine.

Ĉu li estis elĉerpita en baraktoj kontraŭ la ranoj? Ĉu la ranoj sin venĝis? Aŭ ĉu li freneziĝis? Neniu sciis pri tio. Sed ĉiuj

komprenis bone, ke se li ne kuirus  
tiel multe da ranoj, li ne suferus tiel  
terure.



## 51. Kuirata testudo



Freŝakva testudo estis preferata manĝaĵo de Zheng Laozhi (Ĝen Laŭĝi), kiu vivis en Angangvilaĝo (Angan), Zhenjian-gubernio (Ĝengĵan), Jiangsu-provinco (Ĝjansu). Li ŝatis manĝi freŝakvajn testudojn pro tri kaŭzoj: Unue, li diris, ke la viando de tia testudo estas nek tro mola, nek tro malmola. Due, li dormas bone manĝinte testudaĵon. Trie, li opiniis, ke la testudaĵo estas bona al homaj koro kaj renoj. Do kiam ajn li havis sufiĉan monon en la poŝo, li ĉiam aĉetis testudon por kuiri.

En iu nokto Zheng Laozhi sonĝis, ke iu en nigra kostumo genuis antaŭ li kaj petegis, "Liberigu min, bonvole! Estu bonkora, kaj ne mortigu min!" Estis tre strange, ke lia edzino ankaŭ vidis la saman sonĝon.

La sekvan matenon, fiŝisto venis

por vendi la ĵus kaptitan freŝakvan testudon grandan kaj dikan. Zheng Laozhi ĝojegis pro tio. Li ne povis deteni la salivon kiam li pagis monon al la fiŝisto, kvankam la prezo estis sufiĉe alta. "Kuiru ĝin!" li kantetis ĝojplene.

"Atendu momenton!" kriis la edzino, "Ĉu vi forgesis kion ni ambaŭ songis lastanokte?" "Ba! Tio estis nur absurda songo. Ne kredu la vidaĵon en la songo!"

"Sed mi ne opinias, ke la viro en nigra kostumo aŭguras al ni feliĉon. Atentu, mia kara, kial vi ne lasu la kompatindan testudon libera?"

"Kio? Ĉu vi volas, ke mi liberigu la testudon el la kuirejo? Vi virinaĉoj ĉiam havas kuriozajn opiniojn."

Dirinte, Zheng Laozhi iris en la kuirejon kaj kuiris la testudon. Poste, li manĝis kaj ĝuis ĉiun pecon da testudaĵo. Oni ne sciis kial, ke manĝinte la testudon, li tuj volis sin

bani.

La edzino atendis longan tempon ekster la banĉambro, sed li ankoraŭ ne eliris; ŝi aŭskultis atente, tamen aŭdis neniom da sono de lia sinbano; ŝi frapetis je la pordo, sed ricevis nenian respondon.

Fine, ŝi eniris por rigardi, kio okazis al li. Kiam ŝi malfermis la pordon, ŝi vidis eksteratende, ke la banujo estas plena de sango. Ŝia edzo solviĝis en la banakvon kvazaŭ la testudo en supon. Nenio de li restis krom la haroj!





## 52. Forto de kompato



Dashan-templo (Daŝan) estis unu el la plej grandaj temploj en Kuaiji (Kŭajĝji), Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan). Tie svarmis multaj pilgrimantoj, vojaĝantoj kaj spektantoj de la pejzaĝo. Iutage al la templo venis du kleraj junuloj Tao Shiliang (Taŭ Ŝiljan) kaj Zhang Zhiting (Ĝan Ĝitin). Ni jam rakontis, kiel Majstro Saĝo ekkonstruigis vivliberigan lageton ĉe la templo. Kompreneble, Dashan-templo ankaŭ havis grandan vivliberigan lageton. Kiam la du kleruloj vidis, ke centoj da angiloj kaj fiŝoj naĝas feliĉe en la lageto, ili emociiĝis kaj ankaŭ volis ion fari por favori la fiŝojn.

"Mi volus aĉeti la angilojn kaj meti ilin en grandan riveron, kie ili havos pli da spaco por naĝi. Tiu rivero fluas al Yangzi-rivero, do ili havos

tiom da spaco, kiom ili bezonas. Ili estos liberaj dum la resta tempo en sia vivo. Kiel vi opinias pri tio?" proponis Tao Shiliang.

Zhang Zhiting respondis: "Bona ideo! Mi vin helpu."

"Sed mi ne havas multan monon. Ni klopodu, ke pli da homoj partoprenu en la aktivado, tiel ni povos liberigi pli multe da angiloj."

"Bonege! Mi agos laŭeble," respondis Zhang. Zhang havis unu taelon da arĝento. Do li donacis ĉiom. Poste, li iris al la bonkoraj konatuloj por ties helpo. Ili entute kolektis ok taelojn da arĝento por la aktivado.

Tao kaj Zhang estis tre ĝojaj. Ili dungis laborantojn kaj faris aranĝon kun la bonzoj en la templo. Ili portis milojn da angiloj el la lageto al la rivero kaj liberigis ilin.

Poste, ili forgesis ĉion pri la angiloj, sed iunokte en aŭtuno, Tao havis strangan sonĝon. Li sonĝis, ke

dio alvenis kaj informis lin serioze: "Ambaŭ vi fariĝos kleruloj. Sed antaŭe vi destinis malsukcesi en la kortega ekzameno. Sciu, ke vi gajnis grandan meriton ĉar vi liberigis milojn da fiŝoj kaj helpis ilin reveni en la naturan liberecon. Vi jam havas sufiĉan meriton por trapasi la kortegan ekzamenon. Mi venas speciale gratuli vin pro via estonta fortuno."

Vekiĝinte, Tao iris al Zhang kaj informis lin pri la sonĝo.

"Strange!" respondis Zhang, "Ankaŭ mi havis la saman sonĝon en la pasinta nokto."

Vere, kiam Tao Shiliang kaj Zhang Zhiting partoprenis en la kortega ekzameno tiujare, ambaŭ sukcesis. Ili fariĝis gravaj kortegaj oficistoj. Ili ĉiam memoris, ke ilia fortuno venis de ilia favoro al la fiŝoj.



## 53. Sinjorino Kun



La historio okazis dum la lasta regperiodo de Imperiestro Qianlong (Ĉjanlun), je la fino de la dek-oka jarcento.

La homoj en la regiono Runzhou (Runĝoŭ) estis tre malicaj. Ili nature ŝatis mortigi bestojn. Kruele estis ne nur la viroj kaj knaboj, sed ankaŭ la maljunuloj, virinoj kaj eĉ knabinoj. Tie ne estis multaj knabinoj, ĉar oni preferis knabojn. Naskinte knabinon, ili tuj dronigis ŝin por havi knabon. Ili eĉ ne skrupulis mortigi siajn proprajn bebojn, do vi povas imagi, kiel ili kondukis kontraŭ la bestoj. Ili kutime instruis siajn infanojn kolekti helikojn por vendi aŭ manĝi. La infanoj kolektadis helikojn, pektenojn kaj ranojn. Ili eĉ scipovis mortigi bestojn per tranĉilo. Se la gepatroj trovis, ke ilia infano torturas bestojn,

ili kutime ridis kaj laŭdis fiere: "Kian inteligentan infanon ni havas!"

La infanoj estis edukataj tiamaniere, do ili opiniis nature, ke estas bona konduto mortigi bestojn. Kiam ili elkreskis, ili mortigis ĉiujn kaptitajn bestojn.

Sed vi ne rajtas aserti, ke ĉiuj en Runzhou estis ĝisoste malbonaj. Tie estis bonkora maljunulino nomata Kun. Ŝi estis la ununura, kiu sciis bonon kaj evitis mortigon. Fakte, ŝi kutime savis la helikojn, kiuj rampis malproksimen forlasinte akvon. Ŝi ankaŭ savis multajn formikojn el danĝero de ies piedpremo. Ĉiuj najbaroj ridis je ŝia konduto kaj diris, ke ŝi estas freneza.

Iun nokton, fiŝisto songis, ke du viroj en nigra oficista kostumo alprenis libron de la riverbordo.

"Kia libro ĝi estas?" demandis la fiŝisto. "Registroj pri ĉies kondutoj bonaj kaj

malbonaj. Estas multaj vortoj pri viaj fikondutoj, kaŭzitaj de via mortigado. Do estu singarda kontraŭ tio."

La fiŝisto ne multe pensis pri la sonĝo, ĉar ili kutimis mortigi vivestaĵojn. Post kvin tagoj, la tuta urbo de Runzhou dronis en subita inundo. Plejparte da homoj perdis sian vivon antaŭ ol ekkrii por helpo.

Sinjinon Kun ne trafis la katastrofo. En la tago antaŭ la inundo, ŝia plej juna nepo suferis de malario. Ŝi kondukis lin en la montaran templon por oferi incenson kaj preĝi al la bodisatvoj resanigi lin. Plurajn tagojn poste, post la resaniĝo de la nepo, ili forlasis la templon. Kiam ili atingis la hejmon, ili vidis, ke jam detruigis la tuta regiono. Mortis ĉiuj homoj.





## 54. Semado kaj rikolto



Wu Lin (U Lin) estis la plej riĉa ĉirkaŭe. Li havis sufiĉan monon por elspezi, do li vivis malŝpareme.

Ankaŭ lia filo estis tre ĝuema. Kia patro, tia filo! La filo speciale ŝatis manĝi novajn kaj eksterordinarajn manĝaĵojn. Iam, kiam la familio Wu okazigis festenon, kuiristo aĉetis grandan testudon en la bazar.

"Tiuspeca testudo estas tre malfacile aĉetebla. Kaj ĝia viando estas vere bongusta. Mastro Wu certe ĝojos pro tio," plezure ridis la kuiristo kiam li akiris tranĉilon por mortigi la testudon. Sed kiam li pretis dehaki la kapon de la testudo, li trovis, ke ĝi ploras. Ŝajnis, ke ĝi ploras por sia vivo.

La kuiristo demetis la tranĉilon kaj tuj raportis al mastro Wu pri la stranga testudo: "Bonvolu ne ordoni

min mortigi la kompatindan testudon, kiam ĝi petas min savi ĝian vivon."

Mastro Wu insultis la kuiriston kolere: "Idioto! Kion vi kapablas fari ĝuste? Donu la tranĉilon al mi. Mi mem mortigu ĝin se vi ne volas tion fari." Li prenis sian plej bonan tranĉilon el tirkesto kaj kuris en la kuirejon. Vidinte la plorantan testudon, li sentis nenian bedaŭron por ĝi. Li dehakis ĝian kapon fulmrapide. Sed li hakis tiel forte, ke la kapo de la testudo flugis kaj falis sur trabon subtegmentan.

"Lasu! Ne zorgu pri tio. Kuiru la restaĵon de la testudo kaj prezentu ĝin al mi vespere."

Tiuvespere, la familio Wu ekĝuis testudaĵon ĝojplene. Sed apenaŭ ili manĝis nur pecetojn, lia filo plendis, ke li kapturniĝas. Li rigardis supren kaj ekkriis timigite. Montrante trabon per sia fingro, li diris: "Rigardu! Estas grandegaj testudoj sur la trabo!"

"Mi vidas nenion," diris Wu Lin.

"For! For! Aj! Ili mordas min. Helpu, paĉjo, ili mordas min!"

"Kio mordas vin? Estas nenio alia ĉi tie." "La testudoj! Estas testudoj sur mia tuta

korpo! Ili mordas min! Helpu!" La juna sinjoro ruliĝis tien kaj reen sur la planko piedbatante kaj kriante, sed neniu alia povis vidi la testudojn.

"Ili mordas min je la piedoj! Helpu min! Dolore!" Oni povis fari nenion kontraŭ tio, ĉar neniu el ili povis vidi la tiel nomatajn testudojn, kiuj mordis lin.

Post tri tagoj, la juna sinjoro mortis. Li fariĝis viktimo de iliaj frandemo kaj krueleco.

Memoru, ke ĉiu el ni devas respondecigi pri sia propra konduto. Se vi ne volas suferigi vin mem, ne suferigu ankaŭ la aliajn vivestaĵojn.



## 55. Unu vivo kontraŭ cent



"Ĉu vi sentas vin pli bone hodiaŭ?" Fan sciis, ke lia edzino suferas de tuberkulozo malfacile kuracebla, sed li flegis ŝin ankoraŭ zorgeme.

"Dankon... pro... via... prizorgo," la edzino respondis anhelante kun granda sufero.

Fan petis la plej bonan kuraciston en la regiono por kuraci lian edzinon. La kuracisto ekzamenis ŝin atenteme, kaj tiris Fan flanken.

"Estas metodo por kuraci ŝin kvankam ŝia malsano estas serioza," la kuracisto diris. "Havigu al vi cent paserojn, kaj preparu medikamenton per la paseraĵ kapoj laŭ la recepto. Poste en la tria kaj la sepa tago la malsanulino manĝu la paseran cerbon. Tio efikas bone. La kuracmetodo estas sekreto heredita de miaj praavoj, kaj

ĉiam efikas. Sed memoru, ke vi devas pretigi cent paserojn, neniom malplie."

Fan deziregis resanigi sian edzinon, li do senprokraste elkuris kaj aĉetis cent paserojn. La paseroj estis amasigitaj en granda kaĝo. Ili pepadis kaj baraktis malĝoje, ĉar estis ne sufiĉa spaco por ili sin amuzi. Eble ili sciis pri sia venonta fatalaĵo.

"Kion vi faros per tiuj paseroj?" demandis sinjorino Fan.

"Tio estas la speciala recepto de kuracisto. Mi preparos per ili medikamenton por vi, kaj vi resaniĝos post nelonge," respondis ĝojplene ŝia edzo.

"Ne. Ne tiel agu!" sinjorino Fan sidiĝis de la lito, "Ne savu min per cent vivoj. Mi preferas morti ol lasi vin mortigi la paserojn por mi."

Fan ne sciis, kion fari.

"Se vi vere amas min," ŝi daŭrigis, "faru tion, kion mi petas. Malfermu la kaĝon kaj liberigu ĉiujn paserojn. Tiel,

eĉ se mi mortos, mi mortos en paco."

Kion li povis fari kontraŭ tio? Fan do obeeme portis la kaĝon en arbaron kaj ellasis ĉiujn paserojn. La liberigitaj paseroj flugis sur arbustojn kaj arbojn kantante kaj pepante. Ili estis feliĉaj de la liberiĝo.

Post pluraj tagoj, sinjorino Fan ellitiĝis kvankam ŝi prenis nenan medikamenton. Ŝiaj amikoj kaj parencoj alvenis gratuli ŝin pro la rapida resaniĝo el tiel serioza malsano. Ili ĉiuj estis ĝojplenaj.

Unu jaron poste, sinjorino Fan naskis knabeton. Li estis ne nur sprita kaj vigla, sed ankaŭ iom stranga, ĉar li havis signon similan al pasero sur ĉiu el siaj brakoj!





## 56. Sovaĝaj anseroj



En 1613, generalo Qian (Ĉjan) de Zhenjiang (Ĝenĝjan) gvidis sian armeon reveni al la urbo per boatoj, kaj ili jam atingis la mezon de la Rivero Jangzio, la plej longa rivero en Ĉinio. La generalo absorbite legis libron en kajuto. Li kapjesis de tempo al tempo.

Sovaĝa ansero vekriis malĝoje super boato. Ĝi jam sekvis la boaton kvindek kilometrojn kaj ne volis forlasi, ĉar unu el la soldatoj kaptis kaj malliberigis ĝian kunulinon en la boato. Tiel, unu el la ansera paro malliberiĝis en la kaĝo dum la alia povis fari nenion krom sekvi kaj vekrii.

La senkora kaptinto de la ansero tute ne zorgis tion, malgraŭ ke pluraj bonkoraj soldatoj petegis lin forlasi la kompatindan birdon.

"Ne. Ĝi estos mia viandsupo post nia albordiĝo ĉi-vespere."

Kiam la boatoj proksimiĝis al kajo, la sovaĝa ansero en la kaĝo rigardis supren kaj vokis plilaŭte. La birdo en la aero plonĝis kaj haltis ĉe la kaĝo de sia karulino. La sovaĝa ansero en la kaĝo etendis la kapon, kaj ambaŭ birdoj ĉirkaŭpremis la kolojn reciproke, kiel la geedzoj rekuniĝis post longa disiĝo.

"Ha, kiel amindaj ili estas!" diris maljuna soldato rigardante.

"Amindaj? Se ni ne tuj agus, ni perdus la manĝaĵon donacitan de la ĉielo," dirante, malica soldato eltiris sian glavon kaj tuj dehakis la kapojn de ambaŭ birdoj.

Generalo Qian aŭdis bruon kaj eliris inspekti pri la okazaĵo, sed jam estis tro malfrue por li haltigi la mortigon. Li do eksplodis de kolero.

"Arestu la aĉulon! Kiu kaptis la anseron unue? Vi? Ankaŭ vi

estu arestita!" tondris la generalo furioze, "Gardistoj! Mi ne toleras tiajn kruelaĵojn inter miaj soldatoj. Donu al tiuj sovaĝuloj po tridek battoj per bambua stango, ke ili memoru la lecionon!"

Tiel punate, la du soldatoj eksciis, ke neniu ŝatas suferi, sed kion ili faras, tion ili ricevas.

Nelonge poste, ambaŭ senkoraj soldatoj suferis de stranga malsano, kiun kuracistoj neniel kapablis kuraci. Ili mortis kaj enteriĝis antaŭ la migrado de sovaĝaj anseroj en la sekva jaro.



## 57. Perlo donacita de serpento



"Kio estas tio?" demandis gardostaranto. "Serpento. Ni mortigu ĝin!" proponis lia kamarado. Ili elprenis lancojn por mortigi la serpenton malgrandan kaj koloran.

"Haltu!" aŭdiĝis ordono.

Ambaŭ soldatoj stuporiĝis kiam ili vidis, ke la ordonanto estas la duko de Sui-regno (Sŭi).

"Ĉu vi ne vidis, ke ĝi jam vundiĝis? Kompatinda etulo!"

Vere, ili vidis, ke la serpento havas vundon sur la kapo.

La duko zorgeme alprenis la serpenton per sia irbastono kaj portis ĝin al riverbordo. Li ordonis, ke la soldatoj lasu ĝin sola.

Momenton poste, la gardostaranto diris al la alia: "Jen, rigardu! La serpento revenas denove!"

"Jes ĝi eĉ portas ion en la buŝo."  
"Rigardu, ĉu vi povas vidi? Ĝi portas perlon!" Aliaj soldatoj alkuris, kiam ili aŭdis pri la serpento. La malgranda serpento rampis antaŭen. "Rigardu! Kien ĝi iras?" iu kriis. Ili cedis la vojon. La malgranda serpento rampis rekte en la tendon de la duko, kaj metis la perlon ĉe lia piedo.

"Dankon por via favoro," diris la duko afable, "sed mi estas kortega oficisto. Mi neniam akceptas donacon, vi scias." La serpento persistis, ĝis la duko alprenis la perlon kaj metis ĝin en sian poŝon.

La duko songis tiunokte, ke li tretis serpenton senatente. Li estis tiel timigita, ke li vekiĝis kaj rigardis siajn piedojn por kontroli, ĉu li estas mordita... Estis nur songo. Sed kio? Li trovis alian perlon ĉe sia piedo, kaj tio ne estis songo.

Du belaj perloj! La duko estis bonkora kaj honesta. Li tute ne volis

akcepti rekompencan de la serpento, sed li povis fari nenion alian ol ricevi la ambaŭ perlojn, kiujn al neniu li povis redoni. Li prenis la perlojn kiel memoraĵojn pri bonkoreco al ĉiuj vivestaĵoj.

La rakonto diskoniĝis vaste kaj malproksime. Multaj homoj konsciis, ke eĉ malgranda besto rampanta surtere damaĝas sian vivon. La rakonto eĉ pensigis la maliculojn, kaj ili tute ŝanĝis sian antaŭan konduton. Poste, pli kaj pli da homoj eklernis protekti vivestaĵojn kaj ĉesis mortigi aŭ turmenti ilin.

Por la duko de Sui-regno, tio estis rekompenco multe pli valora ol la perloj.





## 58. Servistino savita de testudo



"Ne forgesu lavi la testudon antaŭ la kuirado," ordonis gesinjoroj Cheng (Ĉen) kiam ili pretis eliri. "Ĝi estas tiel granda, kaj vi devas kuiri atenteme. Faru tion bone!"

"Certe, mi scias," respondis la servistino. Post la eliro de la geedzoj, la servistino iris al la kuirejo por rigardi la testudon, pripensante, kiel komenci la kuiradon. Sed kiam ŝi vidis la testudon sur la planko, ŝi ekkompatis ĝin. "Kompatinda testudo, ĉu vi ne preferas naĝi en rivero ol barakti en supo?"

Pro kio la servistino kompatis speciale tiun ĉi testudon? Ŝi jam kuiris multajn testudojn por gesinjoroj Cheng, ĉar ili preferis testudaĵon. Neniu sciis pri la kaŭzo. Ŝi portis ĝin eksteren por liberigi.

"Ne. Mi ne devas mortigi ĝin... Kiam gesinjoroj Cheng revenos por la testudaĵo, mi diru al ili: 'Pardonu, mi jam liberigis ĝin.' Eĉ se ili skurĝos min, tio ne pli suferigos min ol la testudon, kiam oni kuiras ĝin." Tiel pensinte, ŝi firmvole liberigis la testudon.

Kiam gesinjoroj Cheng revenis por la frandaĵo kaj trovis la pladon sen testudaĵo, ili vere insultis kaj skurĝis la servistinon. Sed ŝi toleris tion silente. Ĉiuj preskaŭ forgesis la okazaĵon post tio.

Nelonge poste, en la regiono okazis subita epidemio. La servistino suferis de serioza malsano. Gesinjoroj Cheng petis kuraciston kuraci ŝin, sed la kuracisto proponis, ke ili senprokraste preparu ĉerkon, ĉar ŝi estis mortanta nekuraceble.

Tiunokte, la servistino sentis, ke el lageto rampas io malseka, glueca kaj koteca. Ĝi venis pli kaj pli proksimen

al ŝi. Ĝi venis en ŝian ĉambron, kaj rampis al ŝia lito. Poste, ĝi grimpis sur ŝian liton. Sed ŝi sentis neniom da timo pri tio.

Poste, la malseka kaj koteca vivestaĵo grimpis sur ŝian korpon, kaj ŝi tuj sentis malvarmeton en la tuta korpo. Ŝi jam ne ĝuis tian komfortecon de multaj tagoj.

La sekvan matenon, sinjorino Cheng envenis kun ŝnureto en la mano. Ŝi volis mezuri la altecon de la servistino por aĉeti ĉerkon. Ŝi vidis eksteratende, ke la malsana servistino sidas sur la lito. La servistino estis plena de koto, sed aspektis multe pli bone. "Ĉu vi pliboniĝis?" mire demandis la sinjorino.

"Jes, Mastrino. Vere strange, mi sentas min multe pli bone hodiaŭ."

"Sed pro kio vi estas tiel kotoplena?"

La servistino rakontis al ŝi pri la okazaĵo en la nokto. Sinjorino Cheng ege maltrankviliĝis, ĉar ŝi supozis, ke

la servistino deliras. Ŝi decidis rigarditi en la nokto.

Noktomeze, gesinjoroj Cheng vidis propraokule, ke la granda testudo liberigita de la servistino rampas en la ĉambron kaj ŝmiras koton sur la korpo de la servistino. Ili apenaŭ kredis siajn okulojn, sed post nelonge, la servistino resaniĝis kaj vigliĝis. Ŝi estis la ununura homo resaniĝinta el la serioza epidemio.

Ekde tiam, gesinjoroj Cheng ne plu manĝis testudojn.



## 59. Resaniĝo de Li Jingwen



Sinjoro Li Jingwen (Li Ĝjinŭen) estis bonkora. Li ofte iris al lagbordo kaj demandis fiŝistojn: "Kion vi kaptis hodiaŭ? Fiŝojn? Krabojn? Aŭ testudojn?" Poste li elprenis monon kaj aĉetis la kaptaĵojn de la fiŝistoj por liberigi. Eble vi opinias, ke li havis tro multe da mono por konsumi, sed fakte, li ne estis bonhava. Li nur ŝatis savi kompatindajn bestojn.

Kiam ajn li liberigis bestojn, li ĉiam ridis feliĉe, dirante: "Rigardu! Ili estas denove liberaj!" Li sentis sin feliĉa dum la tuta tago.

Sinjoro Li estis alkemiisto, kiu devas sin ekipi per scioj pri kemio, psikologio kaj filozofio samtempe. Li faris eksperimenton per diversaj nekonataj kemiaĵoj. Iam li eĉ englutis iom por sperti, kio okazos post tio. Vi povas imagi, kio okazos. Fine, li

malsaniĝis pro tio. Li havis grandan furunkon sur la dorso, kaj neniuj kapablis kuraci lin malgraŭ diversaj klopodoj. La furunko doloris lin tiel, ke li eĉ ne povis endormiĝi tutan nokton.


Li turniĝadis en la lito. Malgraŭ en ĉi tiu pozo li kuŝis, lia dorso doloris lin. Ĝuste tiam, li vidis, ke multaj fiŝoj, kraboj kaj testudoj blovas vezikojn al lia dorso, kaj krome, ili lekis lian dorson. Li tuj sentis neeldireblan komfortecon pro tio. Plej baldaŭ, liaj ostoj ne plu doloris, kaj lia dorso tute resaniĝis. Li elsaltis el la lito kun granda ĝojo. "Ho, mi povas piediri denove. Rigardu! Mi resaniĝis!"

La kuracistoj tute ne povis kredi tion. Neniu furunko tiom serioza povis resaniĝi tiel rapide! Sed la furunko malaperis, kaj ĉiuj venenaĵoj jam forlasis lian korpon. Li estis eĉ multe pli sana ol antaŭ la malsaniĝo.

En la resta tempo de sia vivo,

kiam ajn li havis monon, li ĉiam iris al lagbordo aŭ bazaro, kaj ĝentile demandis fiŝistojn, ĉu ili kaptis ion— fiŝojn, krabojn aŭ testudojn. Poste li elspezis tutan monon kaj portis la fiŝojn, krabojn kaj testudojn al lagbordo kaj liberigis ilin. Kun rido sur la vizaĝo, li diris kontente: "Rigardu! Rigardu! Ili denove estas liberaj!" Kaj li rigardis ĝis ili ĉiuj malaperis el lia vido. Poste li hejmeniris ĝojplena.





## 60. Bonkora oficisto



Pan Hua estis gubernia juĝisto. Estante honesta kaj bonkora, li ĉiam favoris ne nur homojn en la gubernio, sed ankaŭ bestojn. Li faris leĝon, ke neniu en la gubernio sin vivtenu per fiŝkapto, kaj iu ajn trovita estu arestita kiel krimulo. Kvankam multaj homoj sin vivtenis per fiŝkapto antaŭe, ili sciis, ke la juĝisto estas bonkorulo, tial ili ne plendis kontraŭ lia ordono. Ili obeis la novan leĝon, kaj ĉio iris bone en la gubernio.

Ĉio estis en tiel bona ordo, ke kiam juĝisto mankis en pli granda gubernio, superulo decidis rekomendi Pan por la ofico. Kiam la homoj en lia antaŭa gubernio informiĝis, ke Pan promociiĝos, ili sentis ne nur feliĉon kaj fieron por lia honoro, sed ankaŭ bedaŭron pro lia forlaso. Ĉu ilia nova juĝisto estos ankaŭ tiel bona kiel Pan?

Venis adiaŭa tago. La vojo estis plene borderita de homoj alvenintaj de proksime kaj malproksime por adiaŭi lin. Estis viroj, virinoj, knaboj kaj knabinoj. Estis maljunuloj tiel aĝaj, ke ili venis helpate de siaj nepoj, kaj ankaŭ infanoj tiel junaj, ke ilin portis la gepatroj. Ili ĉiuj alvenis por diri adiaŭon al Pan.

Viro paŝis el la homamaso, kaj genuiĝis antaŭ Pan. Li prezentis al Pan dek taelojn da arĝento respektive per ambaŭ manoj: "Jen humila donaceto por esprimi mian sinceran dankon al vi! Mi esperas, ke Via Moŝto akceptu favore."

"Mi ne akceptas tion," koleriĝis Pan, "Mi jam sciigis al vi ĉiuj, ke neniun preparu donacon por mi. Ĉu vi ne scias pri tio?"

"Jes, mi scias bone, sed ĉi tiu estas malsama. Mi estis ŝtelisto. Kiam mi estis kaptita, mi pensis, ke mi mortos pro tio, ĉar la kaptitaj ŝtelistoj kutime

estas senkapigotaj. Sed vi ne mortigis min. Anstataŭe, vi admonis min ŝanĝi mian konduton. Mi vere ŝanĝis mian vivrimedon. Mi estis tiel emociita de via favoro, ke mi decidis ne plu ŝteli. Mi lernis teknikon, edziĝis kaj nun vivtenas familion. Ĉio, kion mi havas hodiaŭ, sin ŝuldas al via bonkoreco. Se vi ne estus tiel bonkora, mi jam fariĝus senkapa kadavro putriĝinta en tombo. Jen kial mi speciale esprimas mian profundan dankon al vi."

Pan rifuzis lian donacon, sed tio montris, kiel bona oficisto li estas.

Homoj loĝantaj ĉe la lagoj kaj riveroj en la gubernio aŭdis ploron kaj lamenton ankaŭ el la akvo. La fiŝoj ankaŭ sciis, ke iliaj feliĉaj tagoj finiĝos kaj ili estos kaptitaj kaj turmentitaj por fariĝi frandaĵo de homoj.

Eĉ fiŝoj kaj kraboj domaĝas sian vivon, kaj malĝojas kiam ilia protektanto forlasas ilin.



## 61. Majstro Xin



Majstro Xin (Ŝjin) estis bonzo kun profunda saĝo kaj granda povo. La brilan atingon li gajnis per diligenta sinkulturado. Ĉar li estis tre saĝa, li estis tre kompatema. Ĉar li estis tre potenca, li estis tre indulgema.

Foje li vidis maljunan fiŝiston kun korbo. Li rigardis en la korbon kaj trovis, ke ĝi plenas de testudoj. Li sciis bone, ke la testudoj estos manĝitaj, kiu ajn aĉetos ilin. "Kompatindaj testudoj," li pensis, "vi ne volas morti, ĉu?" Li do elprenis sian monujon kaj aĉetis ĉiujn testudojn el la korbo kaj metis ilin en vivliberigan laĝeton.

Plurajn jarojn poste, okazis serioza sekeco. Ĉiuj kamparanoj ege maltrankviliĝis pro tio. Se ne pluvos, plantaĵoj ne kreskos, kaj oni mortos de malsato. Tiam oni bone sciis pri morto el malsato, ĉar tio okazis ofte.

En sekeca periodo estis tiel multaj malsatuloj, ke oni ne kapablis trovi manĝaĵon facile. Oni devis sin vivteni per herbo kaj arboŝelo. Multaj homoj mortis pro malsato.

Ĉiufoje, post komenciĝo de la sekeco, kamparanoj senprokraste oferis bovojn kaj kaprojn al dioj por peti pluvon, sed tio neniam efikis.

Ĉi-foje, iu havis novan ideon: "Ni petu Majstron Xin por helpo. Li estas tiel potenca, ke li certe kapablas ion fari kontraŭ la sekeco." Ĉiuj iris en la templon kaj petis Majstron Xin pluvigi. Li ridetis kviete, kaj respondis al ili: "Bone! Sen problemo! Mi preĝu por pluvo, tamen vi devas helpi min unue. Ekde nun ĝis nia ceremonio, neniu el vi mortigu vivestaĵojn. Ĝis tiam, vi ĉiuj devas manĝi nur vegetaran manĝaĵon. Alie, neniom efikos nia klopodo."

Eĉ por pluraj frandemuloj, kiuj ne povis manĝi sen viando, estis multe

pli bone preni vegetaran manĝaĵon ol manĝi nenion. Kaj krome, ili ĉiuj respektis Majstron Xin, do ili promesis, ke ili ne plu mortigos bestojn aŭ manĝos viandon.

En la tago por la ceremonio, ĉiuj de tiu regiono kolektiĝis en la templo kun oferoj el fruktoj kaj incensoj. Majstro Xin atendis ilin. Kiam ĉio estis preta, li bruligis incensojn kaj komencis preĝi. Li prilitaniis mantron: "Om! Dajrta salo salo... "

"Mi komprenas eĉ neniun vorton!" iu flustris.


"Ĉu vi opinias, ke tio vere efikos?" demandis alia al siaj najbaroj.

Multaj homoj diris: "Se tio vere efikos, mi fariĝu vegetarano."

La majstro preĝis konstante, kaj antaŭ ol forbruliĝis la unua incenso, nubego kovris la ĉielon kaj pluvego ekverŝiĝis al la soifa tero. Ĉiuj genuiĝis kun estimo kaj ĝojo. Ili ne povis distingi, ĉu ilia vizaĝo



malsekiĝis pro pluvo aŭ pro dankemaj  
larmoj.



## 62. Rakonto pri cerva bambuo



Iam estis malbona bonzo nomata Liaokong (Liaokong). Li kondukis tute ne kiel bonzo. Li neniam faris bonajn aferojn aŭ helpis vivestaĵojn. Li ankaŭ ne aspektis kiel bonzo. La bonzoj faris tiel multajn bonajn aferojn kaj havis tiel multajn bonajn ideojn, ke ili aspektis fervoraj kaj ĝentilaj. Sed Liaokong ĉiam ĉirkaŭvagadis kun malbonhumora mieno kiel tiu de histriko.

Li ekinteresiĝis pri Cerva Bambuo, membro de lilia familio. La formala nomo de Cerva Bambuo estas Huangjing (Hŭan Ĝin). Ĝi kreskas tri futojn alta, kun pintaj folioj. En la komenco de somero, pale verdaj bulboj aperas sub folioj, kaj poste, ili fariĝas koloraj fruktoj tiel grandaj kiel faboj. La folioj kaj la radikoj estas

dolĉaj. Oni diris, ke Cerva Bambuo povas plilongigi homan vivon.

"Ĉu vere? Ĉu tio vere plilongigas homan vivon?" Liaokong volegis scii, sed li tute ne aŭdacis provi per si mem. Li havis najbaron A la Tria. Li estis la plej malsaĝa en la regiono.

Liaokong metis faskon da Cerva Bambuo sur la fundon de seka puto, alvenigis A la Trian kaj diris al li:

"A la Tria, mi devas diri, ke vi estas granda homo kaj mia vera amiko. Mi vere amas vin, do mi diru al vi sekreton. Rigardu en la puton ĉi tie. Ĉu vi povas vidi la Cervan Bambuon sur la fundo? Via vivo daŭros por ĉiam, se vi restos tie kaj flaros ĝin."

"Ĉu vere? Bonege! Mi vere estas bonsorta, ke mi havas tiel bonan amikon kiel vin." A la Tria kredis la vortojn de Liaokong, kaj preskaŭ ekploris pro emociiĝo kiam li descendis en la puton. Sed apenaŭ

A la Tria estis en la puto, Liaokong tuj kovris la puton firme per anticipe pretigita kovrilo. Kiam A la Tria konsciis, ke li estas malliberigita, li ekploregis dolore.

Ĉe la sunsubiro, la aero en la puto pli kaj pli maldensiĝis. A la Tria pensis: "Se mi ne povas tuj eliri, mi mortos de sufokiĝo anstataŭ de malsato."

Ĝuste tiam, li aŭdis iun voki lin: "A la Tria! A la Tria! A la Tria! Ĉu vi aŭdas min?"

"Kiu vi estas?" Estis tiel mallume, ke li povis vidi nenion.

"Ne maltrankviliĝu! Estas malgranda truo en la puta kovrilo. Se vi rigardas ĝin atente, vi povas vidi sunlumon tra la truo. Tio, kion vi devas fari nun, estas kuŝi kviete kaj rigardi tra la truo. Vi devas senĉese koncentri vian menson. Poste, via tuta korpo flugos el la puto en la aeron."

"Ĉu vi ŝercas? Kiu vi estas?"

"Mi estas vulpo. Ĉiuj scias bone, ke vulpoj estas plenaj de saĝo kaj artifiko. Ankaŭ mi estas sama. Iam mi estis malliberigita, kaj vi elsavis min. Ĉu vi ne memoras?"

"Oh, jes. Mi memoras, tamen mi ne sciis, ke vi povas paroli."

"Mi ne parolas sen urĝa bezono. Nun vi estas en granda danĝero. Mi devas helpi vin elputiĝi, ĉar vi savis mian vivon antaŭe. Nun rapidu kaj ne plu babilu. Kuŝiĝu kaj najlu vian rigardon al la truo. Via vivo dependas de tio."

A la Tria agis laŭ la instruo de la vulpo, kaj li vere elflugis semajnon poste. Do li revenis hejmen ĝojplena kaj manĝis ĝissate.

Kiam Liaokong vidis, ke A la Tria jam revenis, li certigis al si mem, ke efikas la Cerva Bambuo. Li metis faskon da Cerva Bambuo en la sekan puton, kaj ankaŭ ensaltis. Unu el liaj amikoj kovris la puton laŭ lia peto.

Forpasis pli ol unu monato kiam lia amiko pensis, "Liaokong estas ankoraŭ en la puto. Do mi rigardu, kiel li fartas." Li malfermis la kovrilon, rigardis al la fundo kaj trovis, ke la malbona bonzo Liaokong jam mortis pro sufokiĝo, kuŝante sur la Cerva Bambuo.





## 63. Majstro Lianchi kaj skolopendro



Antaŭ ĉirkaŭ 400 jaroj, estis granda bonzo nomata Lianchi (Ljanĉi), kies signifo estas "Lotusa lagetoj". Li esperis, ke ĉiuj vivestaĵoj naskiĝu en la lotusan lageton de la Pura Lando de Amitabo.

Iam li vidis viron kun skolopendroj treditaj sur bambua strio. La skolopendroj estis suferantaj. Lianchi demandis: "Ĉu vi bonvole liberigus la skolopendrojn?"

"Neniel! El tiuj venenaj skolopendroj oni povas fari bonan medikamenton. Mi ne liberigos ilin. Tamen se vi pagos por ili, mi vendos ilin al vi!"

"Bone! Mi konsentas. Kiom vi postulas?" Kvankam la viro estis kruda, Majstro Lianchi ridetis kaj parolis al li ĝentile. Li aĉetis ĉiujn

skolopendrojn. La skolopendroj preskaŭ mortis pro trapiko de la bambua strio. Nur unu fartis iom pli bone. Ĝi longe najlis sian rigardon al Majstro Lianchi, kaj poste, forrampis malrapide.

Post nelonge, kiam majstro Lianchi sidis en ĉambro kun sia amiko kaj parolis pri Budhismaj Sutroj aŭ Sanktaj Libroj, la vizaĝo de la amiko subite paliĝis: "Rigardu la grandan skolopendron!"

Granda kaj terura skolopendro rampis sur la manikon de Majstro Lianchi. La amiko haste puŝis ĝin per stango, sed ĝi ne volis moviĝi. Lianchi neniel maltrankviliĝis pro tio.

"Kio okazos se ĝi mordos vin?"

Lianchi ĝentile diris al la skolopendro: "Ĉu vi estas tiu, kiun mi liberigis antaŭ nelonge? Se jes, sidu tie kviete. Mi instruos vin pri budhismo."

La skolopendro ne moviĝis. Lianchi parolis al ĝi, "Iu ajn, kiu

volas tute kompreni budhismon, scias bone, ke la naturo de ĉio en la materia universo estas la produkto de nia menso.

"Ni kreis nian vivon per nia propra menso. Tiuj kun fera menso fariĝos vulpoj aŭ tigroj. Tiuj kun venena menso fariĝos serpentoj aŭ skorpioj, aŭ aliaj venenaj insektoj.

"Nun vi estas venena skolopendro. Ĉu tio estas hazarda? Ne. Vi havis venenan menson en via pasinta vivo. Se vi volas forlasi vian suferon, unue forĵetu la venenon el via menso. Tiam vi liberiĝos. Nur vi kapablas liberigi vin mem.

"Ĉu vi komprenas? Nun, estas tempo por via foriro. Bonan sorton!"

La skolopendro malrapide elrampis tra la fenestro, kaj la amiko elrampis el sub la seĝo.

La Majstro diris al li: "Eble vi opinias, ke la bestoj estas liberaj, sed ili vivas en timo. La plej

terura afero estas tio, ke ili vivas en  
senscieco. Vivo estas plena de suferoj.  
Se vi volas liberiĝi de la renaskiĝo,  
petu Amitabon konduki vin al la Pura  
Lando. Tie vi lernos fariĝi budho. Vi  
liberiĝos de la renaskiĝo kaj vi povos  
savi aliajn vivestaĵojn. Ĉu tio ne estas  
pli bona ol la senĉesaj naskiĝoj kaj  
mortoj?"



## 64. Esti bovo por dek unu vivdaŭroj



En 1815, forpasis Du Silin. Ĉiuj liaj familianoj kaj amikoj estis malĝojaj, ĉar li estis homo sufiĉe bona.

Du Silin konsciis, ke li estas en la infero. Prijuĝadon prezidis la imperiestro de la infero. La asesoroj estis demonoj kun bova kapo kaj ĉevala vizaĝo. Aliaj demonoj atendis avide aliajn mortintojn. Sur la muro pendis teruraj torturiloj. Ĉio ĉi estis kreita de propraj malbonaj mensoj kaj malbonaj kondutoj, tute ne de dioj aŭ diabloj.

La demonoj eskortis kuraciston Yin (Jin) en la juĝejon.

"Ne. Mi ĵus mortis. Tio eble estas la juĝejo, kie mi estos juĝata." tiel pensante, Yin ektimis.

"Genuiĝu, aĉulo!" hurlis la asesoroj.

Yin genuiĝis, kaj tuj rimarkis iun ankaŭ genuanta apud li. Poste li rekonis, ke tiu estis neniŭ alia ol lia amiko Li Pi, loka buĉisto.

Li Pi ne plu estis tiel amika kiel antaŭe. Kiam li vidis kuraciston Yin, li montris per sia fingro al lia vizaĝo kaj raportis al la juĝisto: "Li estis kulpa pri ĉio. Ĝuste li! Se li ne manĝis bovaĵon, mi tute ne mortigis bovojn. Kaptu lin kaj liberigu min!"

Yin tute ne atendis pri tio! Li refutis haste: "Via Ekscelenco, se li ne mortigis bovojn, mi tute ne manĝis viandon." Li Pi furioziĝis pro tio, kaj ekatakis lin. La intendantoj haste retenis ilin.

La juĝisto bategis la tablon per la pugno: "SILENTU! Unu mortigis kaj la alia manĝis. Vi ambaŭ havas saman kulpon! Ĉu vi ne havas koron? Bovoj plugadas kampon por kreskigi grenon al vi. Vi sentas nenian dankemon, kaj eĉ manĝas la senkulpajn bestojn. Se

vi manĝas pli da bovaĵo, pli da bovoj mortas de tio. Se vi manĝas malpli da bovaĵo, malpli da bovoj mortas de tio. Se vi manĝas neniom da bovaĵo, neniu bovo mortas de tio. Ĉu vi ambaŭ komprenas tion?"

Ili kapjesis obeeme.

"Li Pi! Pro viaj kulpoj kontraŭ la vivestaĵoj kaj ankaŭ via konscienco, vi estas kondamnita al malliberiĝo en la infero, kie vi suferos turmentojn ĝis vi ĉerpos la lecionon sufiĉe bone. Fortrenu lin!"

La demonoj ĝoje fortrenis la vekriantan buĉiston, piedbatante lin senĉese.


"Kuracisto Yin! Vi manĝis bovaĵon tro multe. Ĉiufoje, kiam malsanulo invitis vin al festeno, vi ĉiam insistis manĝi bovaĵon. Ĉu vi scias, kiom da bovoj vi jam formanĝis? Ĉu vi konfesas vian kulpon?"



Kuracisto Yin mallevis la kapon kaj jesis. "Krom tio, dek unu malsanuloj mortis pro viaj malsaĝo kaj senatento. Por viaj kulpoj, mi kondamnas vin esti bovo por dek unu vivodaŭroj. Vi pagos viajn ŝuldojn al la viktimoj de via misago. Vi finos ĉiun vivon sub la buĉista tranĉilo, kiel kompenso pro via suferigo al la senkulpaj vivestaĵoj. Fortrenu lin!"

Kuracisto Yin vekriis kiam la demonoj trenis lin eksteren.

"Kaj vi," la juĝisto sin turnis al Du, parolis en milda tono, "vi estas fidela al viaj gepatroj kaj lojala al via lando. Estas ankoraŭ ne via fino, do vi povas reiri. Sed memoru, ke vi informu ĉiujn pri ĉi-tiea vidaĵo, por ke ili ne mortu pro io simila al ilia kazo." Je tio, Du Silin reviviĝis.



## 65. Plugadi kiel Bovo



Oni nomas Bodisatvon Ksitigarbo Dizang (Dizan) en la ĉina lingvo. Li estas tiel bonkora, ke li iris en la inferon por savi la suferantojn.

En iu templo sur Naŭ-flora Montaro en Anhui-provinco (Anhŭi) vi povas vidi lian korpon de unu el liaj rekarniĝoj. En 1840 grupo da pilgrimantoj iris omaĝi al li, kaj inter la pilgrimantoj estis malica viro nomata Diao Zuan (Diao Zŭan).

Diao Zuan tre ŝatis manĝi viandon, kaj precipe bovaĵon. Bovoĵ estas grandaj obeemaj bestoj. La ĉinaj kamparanoj kutime plugas per bovoj, do bovaĵo estas tabuo por plejparto de ĉinoj. En la templo, kiun ili vizitis, ili vidis bildserion instruantan homojn kompati al la bovoj.

Diao Zuan opiniis malsame. Li diris: "Mi ne obeu tion! Mi sciigu al

vi, ke mi ne povas manĝi sen bovaĵo."

Apenaŭ li finis la vortojn, li subite falis teren kaj ekspasmis kun ŝaŭmo en la buŝo.

"Li profanis la bodisatvon!"  
La tuta grupo genuiĝis por peti Ksitigarbon indulgi Diao. Ĉesis la konvulsio de Diao, sed ŝajnis, ke li tute ne scias, kiu kaj kie li estas.

Liaj amikoj metis lin sur brankardon kaj portis lin al la domo de lia parenco, kiu loĝis proksime. "Ni ne havas liberan litĉambbron por li, lasu lin loĝi en la legoĉambro," diris la parenco. Timante, ke li denove svenos de spasma, oni ligis lin al la kuŝlito por porti lin hejmen en la sekva tago.

La sekvan matenon, oni malfermis la pordon kaj trovis mirigite, ke la legoĉambro aspektas kiel blovita de tajfuno. Ĉiuj mebloj renversiĝis; la libroj kaj paperoj kovris la plankon. La litkovrilo, kiun oni metis sur la korpon de Diao, dispeciĝis. Diao

jam sin liberigis de la ŝnuro. Li estis rampanta sur la planko per kvar membroj anhelante kaj stamfante kiel bovo.

Oni portis lin al lia propra domo. Lia edzino svenis apenaŭ vidinte la edzon. Vekiĝinte, ŝi ploregis, kaj demandis, kio okazis al li.

Post kiam oni informis ŝin pri la okazaĵo,

la tuta familio faris ĵuron senprokraste, ke ili ne plu manĝos bovaĵon. Ili ankaŭ faris promeson, ke ili pilgrimos al Naŭ-flora Montaro ĉiusomere.

Ili preĝis senĉese, sed Diao ankoraŭ senhalte rampadis per la kvar membroj tien kaj reen sur la planko en la ĉambro. Neniu povis haltigi lin, eĉ se ili ligis lin.

Liaj familianoj konstante petadis favoran helpon de Bodisatvo Ksitigarbo. En la deka tago, Diao subite falis teren kaj perdis la

konscion. Poste, malferminte la okulojn, li aspektis normala.

"Kio okazis al vi?" demandis liaj familianoj kaj amikoj ĉirkaŭ li.

"Ne plu menciu tion! Mi plugadis kampojn por dek tagoj." Diao respondis tremante.

Ekde tiam, Diao ne plu manĝis bovaĵon. Kiam ajn li vidis bovon, li ĉiam speciale aliris, frapetis ĝin kaj diris plurajn favorajn vortojn al ĝi. Li jam sciis bone, kiom suferas la bovoj.



## 66. Viro kun bova kapo



Ye Asan (Je Asan) riĉiĝis per vendo de bovaĵo. Li estis lerta buĉisto kaj saĝa komercisto, do li fieregis pri sia kariero. Li ĉiam primokis la abstinadon de bovaĵo:

"Ha, kiu aŭdacas diri, ke buĉado estas malbona kariero? Rigardu min! Mi estas buĉisto, kaj ĉion mi havas nun."

Liaj amikoj admonis lin bonkore: "Vi akumulis vian riĉaĵon per sango. Ĉesigu tion, kaj faru alian komercon."

"Kio? Ĉu vi ŝercas? Tio estas la plej bona okupo. Mi faros tion ĝis fino de mia vivo. Ne nur mi mem, sed ankaŭ miaj filoj kaj nepoj faros tion. Imagu kiom da mono ni povos gajni! Kio estas pli valora ol mono? Vi rajtas parolaĉi pri via dogmo, tamen por mi, nenio estas pli bona ol mono."

Nelonge poste, subita malsano



trafis Ye, kaj preskaŭ forprenis lian vivon. En la sekva tago, kvankam li ankoraŭ vivis, lia ventro ŝvelis, kaj lia tuta korpo estis kovrita de kontuzoj. Li sidiĝis kaj forlasis la liton. Apenaŭ lia familio provis haltigi lin, kiam li iris el la pordo, murmurante dum la irado.

Liaj edzino kaj filoj sekvis lin en la urbon. Tie li haltigis ĉiujn preterpasantojn kaj parolis al ili: "Je la ordono de Lia Imperiestra Majesto de la infero, mi sciigu al vi, ke vi ne plu faru malbonajn aferojn. Ne plu mortigu bestojn."

"Vi ne konas, kian torturon mi suferas en la infero. Mi deziregas, ke mi povus reviviĝi denove kaj ĝui miajn tagojn pace sub la suno, sed mi faris tiel multajn krimojn, ke atendas min nur la sufero. Mi riĉiĝis per bovaĵo, kaj tio estas mia krimo. Oni batis mian ventron tiel kruele, ke ĝi ŝvelis. Tio estas nur la komenco. Mia

senkoreco destinis min al turmentado de la infero."

Liaj amikoj malĝojis por li. Tiam ili vidis eksteratende, ke lia kapo jam aliformiĝis en tiun de bovo, kiel rimarkigo al la aliaj pri la danĝero kaŭzita de avido kaj malico.



## 67. Gustumi bovaĵon



Tagmeze de la deka de aprilo en 1820, nigraj nuboj kovris la sunon. Subite, la nuboj apartiĝis kaj pluvo ekverŝiĝis. Fulmoj kaj tondroj furiozis tra la ĉielo. La preterpasantoj haste diskuris por ŝirmejo.

Iu el ili subite genuiĝis vekriante. Li estis trafita de tondro! Kvankam li ankoraŭ vivis, tamen li brulvundiĝis tutkorpe. La aero pleniĝis je la odoro de rostita viando. Li tordiĝis en agonio. Li tremegis tutkorpe, kaj la larmoj fluis el liaj okuloj.

Momenton poste larvoj rampis el liaj vundoj. La viro malfermis siajn okulojn kaj rigardis sian brulvunditan korpon kaj fenditan karnon. Li ŝiris pecon da karno el la korpo kaj metis ĝin en la buŝon. La rigardantoj stuporiĝis de tio.

Liaj najbaroj provis haltigi lin:

"Fang Dengshan (Fan Denŝan)! Ĉu vi ne scias, kion vi faras? Haltu!"

"Hm, bongusta bovaĵo," li diris al ili, "bongusta bovaĵo! Gustumu?"

Vidinte tion, plejparto de la apudrigardantoj svenis aŭ ekvomis. Pluraj kuraĝuloj alvenigis liajn familianojn kaj ili portis lin hejmen.

Li ne mortis senprokraste. Li plu vivis plurajn monatojn. Je la tempo de lia morto, sur liaj ostoj jam restis nemulte da karno.

Malgranda knabino, kiu loĝis najbare, demandis sian patrinon: "Mi scias, ke Sinjoro Fang estis malica kaj kutime kverelis kun ĉiuj aliaj homoj. Li ĉiam interbatis kun la aliaj. Sed pro kio li mortis tiel mizere?"

Ŝia patrino eksplikis: "Fang Dengshan estis fama buĉisto. Li ĉiam diris, ke li fariĝis buĉisto pro la prefero al bovaĵo. Sidante ĉe la buĉista vendejo, li kutime manĝis bovaĵon kaj allogis klientojn: 'Bongusta bovaĵo!'

Gustumu?"

"Li estis riĉa, ĉu ne?" demandis la knabineto.

"Jes, tre riĉa. Li ofte fanfaronis, ke li gajnos pli kaj pli da mono. Li diris, ke li neniam povriĝos nur se li havos bovojn por mortigi.

"Sed kian bonon lia tuta riĉaĵo donis al li? Se li estus iom pli bonkora, tia malfeliĉo ne okazus al li."

"Ĉu tio estas la kialo, ke ni neniam manĝas viandon, Panjo?" demandis la knabineto.

"Jes, ĉar ni ne volas, ke al ni okazus tio, kio okazis al li. Do ni ne kaŭzos suferon al ĉiuj vivestaĵoj. Jen la plej bona metodo protekti nin de la sufero."



## 68. Morto de la buĉisto



En Zhihe-gubernio (Ĝihe), de Fujian-provinco (Fuĝjan) estis malica buĉisto Zhao Fuqiao (Ĝaŭ Fuĉjaŭ). Li estis tre riĉa, ĉar li gajnis multe per vendo de bovaĵo. Ĉiutage li buĉis almenaŭ tri bovojn kaj provizis multe da bovaĵo, do en malpli ol unu jaro li jam fariĝis unu el la plej riĉaj homoj en la gubernio.

Je la komenco de la 9-a jarcento, kiam Fuqiao estis maljuna, lia filo Guanghua (Gŭanhŭa) transprenis la familian negocon. La patro kaj filo tiel fieris pri sia negoco, ke ili metis grandan stumpon de trunko antaŭ sian pardonon. Ili uzis la stumpon kiel haktabulon dum multaj jaroj. Ili kutime metis bovkapojn sur ĝin por disrompi. Kiam oni vidis ĝin, ili eksciis, ke tio estas la domo de buĉisto.



Foje en iu nokto okazis strangaj. La stumpo aliformiĝis en bovan kapon, kaj sin ruladis sur stratoj kaj vojoj en la urbo. Ĉiuj vidintoj estis timigitaj.

En la sama nokto, la preterpasantoj aŭdis bruon de sennombraj bovoj interbatalantaj en la domo de la buĉisto. Neniu povis imagi, kio okazas.

Unu aŭ du tagojn poste, Guanghua faris sian negocon kiel kutime kiam soldato alvenis por aĉeti viandon. Ĉar li aĉetis viandon por la ofica afero, li petis malaltigi la prezon.

"Ĉu vi freneziĝis?" kriegis Guanghua, "Mi malprofitos pro tio!" Li koleriĝis pro la peto de la soldato, kaj ekkverelis kun li. Fine, Guanghua ege furioziĝis, alprenis tranĉilon kaj hakis la kapon de la soldato.

Kiam Fuqiao aŭdis, ke lia filo mortigis soldaton, li tiom maltrankviliĝis kaj teruriĝis, ke li falis

teren kaj perdis sian vivon.

Guanghua ekzekutiĝis pro la mortigo. Post nelonge, liaj edzino kaj infanoj en ĉifono ekalmozpetis sur la stratoj. La najbaroj diris: "Ni neniam imagis, ke tiel riĉa Familio Zhao petos almozon ekster sia estinta etaĝdomo."

Budhano eksplikis al ili: "Ili suferis de tio, kion li kaŭzis pro mortigo de tiom multaj bovoj. Se vi faras bonon, vi gajnos bonan rekompencan al vi kaj viaj posteuloj. Kaj se vi faras malbonon vi suferigos vin kaj vian familion tiom, kiom vi suferigas la aliajn."

"Jen kial ni ne toleras manĝi viandon. Ni devas laŭeble regi nian menson, kaj vivi harmonie kun ĉiuj vivestaĵoj, tiel ke ni ĉiuj povos ĝui nian vivon."

Ĉiuj opiniis tion prava. La aliaj buĉistoj en la regiono konsciis, ke tio okazis al Zhao, okazus al ili mem, do ili fermis siajn vendejojn kaj ekfaris

aliajn negocojn. Zhihe-gubernio estis harmonia kaj paca loko dum multaj jaroj ekde tiam.

Nun, medicina scienco jam pruvis, ke manĝi bovaĵon damaĝos homan sanon. Tio kaŭzos koran malsanon kaj kanceron. Kiel ajn vi opinias pri tio, vi devas scii, ke manĝi viandon donas nenian bonon al vi.



## 69. Buĉista dio



Kun fortaj bronzkoloraj brakoj, densaj vangoharoj kaj paro da brilaj okuloj, Gu famis vaste kaj malproksime kiel la reĝo de bovaj buĉistoj. Oni preferus renkonti tigron ol vidi lin. Oni nomis lin "Buĉista Dio".

Buĉista Dio havis du filojn. Ili estis fortaj kaj sovaĝaj same kiel la patro. La najbaroj kutime evitis ilin timeme. Krome, ilia patrino, Sinjorino Gu, ankaŭ lertis pri uzado de buĉista tranĉilo. Ŝi povis buĉi bovon tiel rapide kaj nete kiel la edzo.

La timiga familio loĝis en granda ligna domo kun malmultaj mebloj. La gepatroj dormis sur la bronza lito, dum la filoj kuŝis sur la planko. Ili metis stumpon de trunko en la domo kiel haktabulon por buĉi bovojn. La ununuraj ornamaĵoj en la ĉambro estis

strioj de viando pendantaj sur la hokoj en la fenestroj. Ĉiuj bovaj kruroj, kapoj, vosto kaj aliaj partoj pendis sur la hokoj.

La tuta familio mortigis multajn bovojn. Iutage, Buĉista Dio plendis, ke liaj okuloj doloras al li. Li vizitis ĉiujn kuracistojn, kiujn li povis trovi, sed neniu el ili kapablis kuraci lin. Post kelkaj tagoj li tute perdis la vidpovon. Iom poste Sinjorino Gu eksuferis de stranga malsano. La karno de ŝia tuta korpo putriĝis kaj disfendiĝis. Tio tiom doloris ŝin, ke ŝi eĉ ne toleris surporti vestojn. Eĉ tuŝo de kotona tuko dolorigis ŝin kvazaŭ oni distranĉus ŝin per tranĉiloj.


Iunokte, prizorgante ŝin, servistino aŭdis ŝian murmuron: "Jen prijuĝejo de la infero. Ili instruas al mi, kiel suferas la bovoj kiam oni senfeligas ilin."

"Mi neniam sciis, ke iliaj animoj ankoraŭ suferas doloron pro la

tranĉiloj kaj brulanta fajro eĉ post ilia morto. Vere dolore! Ho, dolore! dolorege! Kiel mi dezirus ĉesigi tion!"

La servistino estis timigita, sed ŝi povis fari nenion por ĉesigi la torturadon kreitan de Sinjorino Gu al si mem pro sia torturado al la bestoj dum tiel longaj jaroj.

Bovoj ĉiam favoras al homoj. En la antikvo, ili tiris ĉarojn por niaj prapatroj, kaj eĉ nun ili plugas kampojn en multaj partoj de la mondo. Ĉu ne estas peke buĉi tiel helpemajn bestojn?





## 70. Buĉisto stufita



"Iru, ĉu vi volu aŭ ne!" Feroca buĉisto tiregis ŝnuron per sia tuta forto. Maljuna bovo ligita per la ŝnuro sciis bone, kio okazos al ĝi. Ĝi mallevis la kapon kaj rifuzis sin movi.

"Rapidu! Ĉu ne?" La buĉisto elprenis vipon, blasfemis kaj freneze skurgis la bovon. Ili luktis sur la strato: unu blasfemis, batis kaj tiris, dum la alia kontraŭstaris mute.

Kiam ili iris preter banko, la bovo subite genuiĝis per la antaŭaj kruroj antaŭ la pordo kaj komencis plori. Grandaj larmogutoj falis de ĝia vizaĝo. La bankestro eliris kaj vidis la malfeliĉan bovon.

"Buĉisto, kiom estas la prezo por tiu ĉi bovo?" li demandis.

"Ok mil monerojn, alie mi ne vendos ĝin!"

"Mi donu al vi dek mil kontraŭ la

bovo. Ĉu vi konsentas?" La bankestro estis emociita de la bovaj larmoj, kaj decidis savi ĝin .

Sed la buĉisto rikanis kaj respondis: "Tiu ĉi bovaĉo donis al mi grandan malagrablajon! Mi jam suferis sufiĉe. Mi dehakos ĝian kapon kaj mortigos ĝin. Jen kion mi faros! Mi ne vendos ĝin al vi, kaj ankaŭ vi ne plu cerbumu por plialtigi la prezon!"

Ŝajne, la maljuna bovo komprenis liajn vortojn. Audinte tion, ĝi suspiris, stariĝis kaj sekvis la buĉiston obeeme.

La buĉisto furioziĝis de la bovo, kiu eĉ provis peti sian vivon. Anstataŭ al bazono, li tiris ĝin hejmen kaj dispecigis ĝin. Li ĵetis la viandon en sian plej grandan kaldronon por kuiri.

Jam estis malfrue, li do enlitiĝis, lasante fajron bruladi sub la kaldrono tutan nokton, por ke la viando estu bone kuirita kaj fariĝu bongusta en la sekva mateno.

Li ellitiĝis frue en la sekva mateno. "Mi kontrolu la fajron, kaj vidu, kia estas la viando," li diris al la edzino.

Pasis longa tempo, sed li ankoraŭ ne revenis. Lia edzino ellitiĝis por serĉi lin. En la kuirejo ŝi vidis, ke la fajro estas ankoraŭ brulanta sub la kaldrono — sed oni ne scias, kiel ŝia edzo falis en la kaldronon kaj estas kuirata kune kun la bovaĵo.



## 71. Savi bubalon



Chen Xingyuan (Ĉen Ŝjin'jŭan) rakontis la suban historion al ni.

Iam estis grupo da malfeliĉuloj. Iuj el ili pasis la kortegajn ekzamenojn kaj fariĝis oficistoj, tamen ili malpromociiĝis de siaj postenoj pro diversaj kaŭzoj. Aliaj neniam sukcesis en la ekzamenoj. Ili ĉiuj estis deprimitaj kaj decidis vojaĝi al iu fama templo por sin distri.

Kiam ili atingis la templon, Chen Xingyuan hazarde eliris por ĝui freŝan aeron. Li vidis hazarde, ke kamparano skurĝas bubalon, sed malgraŭ la skurĝado ĝi rifuzas sin movi. Kiam la bubalo vidis lin, ĝi ekploris. Tiam li konsciis, ke ĝi ploras pro tio, ke oni pelas ĝin al morto. Nature, neniu el la vivestaĵoj voluntas morti. Li forgesis sian propran malĝojon kaj ekkompatis la suferantan bruton. Li demandis la

kamparanon: "Kiom vi postulas por la bubalo?"

"Kvindek rulojn da silko."

Li tuj iris en la templon kaj diris al la aliaj: "Ni jam pretigis monon por nia sekva vojaĝo, sed kial ni ne elspezu tion por pli bona afero?"

"Kion vi opinias?"

"Ni aĉetu la misfortunan bubalon, kaj lasu ĝin vivi sekure ĝis la fino."

"Sed ni jam decidis elspezi la monon por alia pikniko dum la flora sezono. Ĉu vi forgesis tion?"

"Ne, mi memoras bone. Sed la pikniko daŭros nur plurajn horojn, kaj poste ĉio forpasos sen spure. Ni povas uzi la saman sumon savi vivon. Pripensu, kiu estas la plej bona maniero por elspezi la monon laŭ via opinio?"

Liaj amikoj ekpripensis tion. Li urĝis ilin: "Rapidu, ni unue uzu la monon por la bubalo, kaj kiam pompos la floroj, mi pagos nian

piknikon. Bone?"

"Certe?"


"Certe!"

Vidinte, ke li jam faris decidon, ili kolektis monon kaj donis al la kamparano por la bubalo. Poste, ili kondukis la bruton en la templon kaj aranĝis, ke oni lasu ĝin vivi tie ĝis la natura fino.

Kiam floroj ekpompis, Chen Xingyuan estis ankoraŭ malriĉa, sed li ne forgesis sian promeson. Li lombardis sian plej bonan veston kaj pagis por la pikniko.

Sed li ne plu povris poste. En la sekva jaro li tre sukcesis en la kortega ekzameno kaj fariĝis oficisto.

Nelonge poste, li promociiĝis al tre alta posteno en la kortego, kaj ĝuis honoron, potencon kaj fortunon. Li certigis al si mem, ke li ĝuas tian bonan fortunon nur pro savo al kompatinda bubalo.





## 72. Skurĝado de dio



En Guangdong-provinco (Gŭandun) estis generalo, kiu estis granda klerulo. Lia nomo estis Zhang Zhendao (Ĝan Ĝendao). Li estis bone trejnita luktisto. Brava kaj forta, li kapablis konkeri multajn malamikojn samtempe. Li estis ankaŭ bone edukita klerulo. Li povis versi kiel la plej eminentaj poetoj. Li famiĝis pro sia kaligrafio kun militista stilo.

Sed li havis mankon same kiel multaj guangdong-anoj. Li ŝatis manĝi hundan viandon. Estis neniu tago por li sen hundaĵo. Li tiel manĝis hundon, kiel oni manĝas kokon aŭ porkon. Rezulte de tio, kien ajn li iris, la hundoj postkuris lin bojante.

Zhang estis tiel talenta, ke li promociiĝis al grava posteno. Iam imperiestro sendis lin al Fujian-provinco. Dum la vojaĝo de sia

inspektado, la generalo iris grimpi faman Wuyi-montaron (Uji), kiu sin etendis en la aeron kiel klabo. Estis malfacile grimpi la monton, do li pasigis la nokton en proksima vilaĝo.

Liaj subuloj sciis bone, ke ilia superulo ŝatas hundaĵon, ili do aĉetis plurajn hundojn por la vespermanĝo.

En la sekva tago, ili iris viziti belan taŭisman templon.

Kiam ili atingis la templon, taŭisto Cai Yuanying (Caj Jŭanjin) volis haltigi ilin, sed aŭdacis diri nenion al tiel potenca kortega oficisto kiel Zhang Zhendao.

Apenaŭ paŝinte en la templon, Zhang ekvidis okulpikan oran lumon. Tio estis ekster lia tolero, kaj tuj svenigis lin. Kiam liaj subuloj suprenlevis lin, li ne nur perdis la parolan kapablon, sed ankaŭ paraliziĝis. Lia tuta korpo estis tiel mola, kvazaŭ sen osto. Kiam ili palpis lian frunton, ili trovis, ke li jam perdis


la vivon.

La subuloj terurigis de tio. Ili demandis la taŭiston pri la kaŭzo. La taŭisto respondis: "La dio adorata ĉi tie estas tre potenca. Li ŝatas hundojn, tial la frandemuloj de hundaĵo tute ne aŭdacas veni. Ili ne aŭdacas kontraŭstari tiel potencon dion aŭ profani la templon."

"Mi volis haltigi Lian Honoran Moŝton, sed li estis tiel potenca kaj altranga, ke mi aŭdacis diri neniom. Lia alveno ja signifas, ke li estis destinita al morto."

Ektimis la subuloj de Zhang. Ili demandis: "Sed pro kio lia korpo fariĝis tiel mola?"

La taŭisto respondis: "Tia afero kutime okazas. Ĉiuj ostoj en lia korpo estis dispecigitaj pro la skurgado de la Dio."



## 73. Venĝo de Mortinta Hundo



Ĉinaj kamparanoj plugas kampojn per bovoj, do plejparto de ĉinoj ne manĝas bovaĵon pro dankemo al la fidelaj brutoj. Sed multaj ĉinoj rigardas hundojn kiel porkojn. Do iuj ĉinaj buĉistoj speciale buĉas hundojn.

Iu buĉisto de hundoj vivis en Nanxiang-vilaĝo (Nanŝjan) de Jiaxing-gubernio (Jiaŝjin), proksima al Ŝanhajo. Li nomiĝis Cai Liu (Caj Liŭ). Hundaĵo estis precipe populara en vintro, ĉar oni opiniis, ke hundaĵo varmigas homan korpon. Je la alproksimiĝo de la novjara festo, Cai ridis kiam li akriĝis siajn tranĉilojn kaj pripensis, kiom li povos enspezi.

Cai buĉis hundojn de longaj jaroj, do li havis lertan rutinon. Li tranĉis hundon je la gorĝo kaj tuj ĵetis ĝin en urnon de varma akvo. Kiam ĝi estis

tute trempita, li senhaŭtigis ĝin tre facile. Li ĉiam tiel agis. Lerteco donis efikon. Sed la aferoj iris malsame ĉifoje. Tuj kiam li metis la hundon en la urnon, liaj okuloj ekŝvelis, dum liaj oreloj zumis kaj lia koro bategis. Li antaŭsentis misfortunon.

Ĝuste tiam, la hundo reviviĝis. Per sia tuta forto, ĝi sin ĵetis el la urno, rekte al Cai! La antaŭsento de Cai pruviĝis. Apenaŭ li vidis la hundon kaj sin tiris malantaŭen, la hundo jam kaptis lin per la dentoj. Li provis forpuŝi ĝin per ambaŭ manoj, sed ĝi jam firme tenis lian brakon per akraj dentoj.

Cai vekriis pro doloro. Liaj najbaroj alvenis por helpi lin. Ili provis malfermigi la hundan faŭkon per diversaj metodoj, sed malsukcesis.

"Kiu imagis, ke hundo kun gorĝo tranĉita ankoraŭ havas tiel grandan forton!" iu el la najbaroj diris mirigite.

"Ne estas tempo por diskuti. Trenu


ĝin for de mi, mi petas!" Cai sin rulis tien kaj reen sur la planko, klopodante sin liberigi de la hundo, sed ĝi tenis lin firme kvazaŭ gluita al lia brako.

Li larmis kaj liaj pantalonoj malsekiĝis pro la doloro, sed la hundo ankoraŭ ne forlasis lin.

La doloro des pli fortiĝis, kaj li ne plu kapablis elteni la suferon. La najbaroj vidis senhelpe, ke lia vizaĝo pli kaj pli paliĝas. "Ka!" ili aŭdis klakon el lia gorĝo.

Li perdis sian vivon. Samtempe la hundo forlasis lin kaj ankaŭ mortis.

Ekde tiam, neniu en la regiono aŭdacis manĝi hundaĵon plue.





## 74. Hundiĝo



Fengjing (Fenĝin) estis vilaĝo malgranda sed tre bela. Tie plejparte de la homoj estis simplaj kamparanoj. Kun honesteco kaj diligenteco, ili vivis harmonie kaj ĝuis la pacan vivon.

Tamen estis malica viro en la vilaĝo. Oni nomis lin Shen (Ŝen) la Dua, ĉar li estis la dua filo de sia familio. Li havis malgrandan vendejon, kaj la komerco iris tiel bone, ke li akumulis grandan sumon iom post iom.

Shen ŝatis drinki alkoholaĵon kaj manĝi hundaĵon. Kiam ajn li trovis ŝancon, li ĉiam aĉetis alkoholaĵon kaj kuiris hundaĵon por ĝui.

Li kutime diris al aliaj: "Hundaĵo odoras bone kaj gustas spice! Nenio estas pli bona ol ĝuo de alkoholaĵo kaj hundaĵo!" Li ofte invitis amikojn al

festenoj, do dum kelkaj jaroj, li buĉis multajn hundojn.

En la jaro 1756, Shen eksentis malfortecon. Iutage, li subite genuiĝis senforte, kaj oni tuj portis lin en lian liton. Eĉ kuracistoj ne sciis, pro kio li malsanas.

Lia edzino prizorgis lin fidele, precipe kiam li eksuferis pro perioda sveno. En profunda nokto, Shen kutime turniĝadis pro la sufero, sed la edzino povis fari nenion kontraŭ tio. Subite ŝi aŭdis, ke li murmuras. Ŝi kliniĝis al li por aŭskulti atente, kaj ŝia sango preskaŭ fridiĝis kiam ŝi aŭdis la vortojn:

"Alia nigra hundo! Vere feroca!"

"Hundo kun makuloj atakas min!"

"Hundoj, du, tri, kvar... mi ne povas kalkuli ilin ĉiujn. Forpeli ilin de mi. Bonvolu, bonvolu forpeli ilin!"

Poste li kriegis tiel laŭte, ke li vekis ĉiujn en la domo: "Helpu! Helpu! Savu min!" Ĉiuj aŭdis lin,

tamen ili neniel povis vidi la tiel nomatajn hundojn. Ili vidis nur, ke Shen baraktas kaj sin turnas en la lito kun terura esprimo en la okuloj.

"Eble li freneziĝis," diris liaj parencoj malĝoje skuante la kapon.

Ekde tiam, Shen rampis per la kvar membroj kaj bojis kiel hundo ĝis morto.

Antaŭ onia morto kutime estas signo, kie tiu renaskiĝos poste. Homo renaskiĝonta en la ĉielo mortas pace kaj eĉ feliĉe. Homo renaskiĝonta en la infero ankaŭ scias pri sia destino. la sufero de Shen la Dua komenciĝis tuj antaŭ la morto ege malfeliĉa.

Li certe fariĝos hundo en sia sekvonta vivo. Eble ankaŭ li finos sian vivon kuirata en kaldrono.



## 75. Lerta pafisto



Li Fucai (Li Fucai) en Baoshan (Baŭŝan), Jiangsu-provinco (Ĝjansu) estis malalta. Li havis larĝan frunton, hokan nazon, grandajn okulojn kaj maldensajn harojn. La okuloj neniam rigardis rekte antaŭen kaj la malsupren kurbiĝinta buŝo neniam kovris la malebenajn dentojn.

Li estis ne nur voluptema kaj malica, sed ankaŭ la plej kruela viro en la regiono. Li havis riĉan familion kaj vivis apud rivero. Por sin protekti kontraŭ inundoj kaj humideco el la rivero, oni plantis dikajn bambuojn ĉirkaŭ sia domo. Birdoj estis allogitaj de la bambuoj kaj faris siajn nestojn inter la folioj.

Tiam oni jam enkondukis pafilojn en Ĉinion el la Okcidento. Kiam li estis ankoraŭ knabeto, li jam lertis en pafado. Li tre ŝatis la bambuan boskon

ĉirkaŭ la domo, ĉar tio provizis lin per tre multaj celoj por pafi.

"Mi trafis alian!" li kriis ĝojplene. Apenaŭ alia nesto falis, li kriegis frapante la manojn.

Kiam li plenkreskiĝis, pafado estis lia preferata aktivado. En la aĝo de 50 jaroj, li ankoraŭ dronis en amuziĝo de pafado. Sennombraj birdoj mortis mizere antaŭ lia paftubo.


Iumatene liaj familianoj trovis lin saltanta antaŭ la fenestro, kvazaŭ laŭ stilo de stranga danco, senĉese movante ambaŭ manojn ĉe la kapo. Li kriis plorante: "Ne beku min! Ne plu beku min!"

Li provis protekti jen la kolon, jen la ŝultrojn, jen la mandorsojn, jen la krurojn, jen la dorson, kaj li eĉ malleviĝis por protekti la maleolojn. La tutan tempon li saltadis kvazaŭ formiko en varma kaldrono. "Ne beku min! Ne beku min!" Li senĉese vekriis.

Sed neniu povis vidi, kio bekas lin. Poste li komencis krei: "Birdoj! Birdoj! Birdoj!" Lia mieno esprimis timon kiel tiun de muso antaŭ kato. Sed neniu el lia familio povis vidi la birdojn.

"Mi mortos!" li kriegis. Liaj brakoj kaj kruroj spasmis malgraŭ la klopodado de liaj filoj por rektigi ilin. Li senĉese movis la kolon kvazaŭ birdego fluganta tra la ĉielo.

Liaj familianoj kapablis fari nenion ol ploregi, rigardante la spertan pafiston ruliĝantan kaj tordiĝantan pro la turmentiĝo.





## 76. Kvar ĝemelaj hundidoj



Iam estis maljunulo nomata Zhu Ping (Ĝu Pin). Li estis ĉiam bonkora, kaj precipe ŝatis bestojn. Iutage, li eliris por viziti parencon. Kiam li alvenis tien, li vidis, ke la parenco eltrenis kvar hundidojn.

"Kion vi faras kontraŭ ili?" demandis Zhu Ping.

"Mi enterigos ilin. Nia hundino samtempe naskis kvar idojn. Laŭ onidiro, hundida kvarĝemeleco kaŭzos fatalaĵon. Mi do mortigos ilin."

"Ĉu vi bonvolas doni ilin al mi?"  
"Forportu ilin, se vi volas."

Tiel Zhu Ping fariĝis la mastro de la kvar hundidoj viglaj kaj amindaj. Li prizorgis ilin atenteme kaj ofte ludis kun ili. Post nelonge, ili jam fariĝis hundoj sanaj kaj fortaj.

Iun vesperon, kiam Zhu Ping sidis en ĉambro, li aŭdis siblon el herboj

ekstere. La sono pli kaj pli laŭtiĝis kaj ankaŭ pli kaj pli proksimiĝis. Komence ĝi similis flustron, sed poste ventegon hurlantan tra la valo.

Elirinte, Zhu Ping vidis grandan serpenton ĉe la pordo. Ĝia korpo estis tiel dika kiel rado de ĉaro. Ĝi rigardis ĉirkaŭen sovaĝe per grandaj kaj timigaj okuloj. Ĝia brile ruĝa lango etendiĝis kaj tordiĝis.

Ekvidinte Zhu Ping, ĝi sin ĵetis al li kiel sago el pafarko. Zhu Ping stuporiĝis kaj eĉ ne povis krii pro timo.

En la danĝera momento, la kvar hundoj sturmis fluge al la serpento. Ili sentime atakis la gigantan monstron kune de kvar flankoj, bojante kaj hurlante.

La bruo alvenigis najbarojn de la mastro, tamen neniu el ili aŭdacis proksimiĝi al la giganto, krom nur senĉese hurai por la bravaj hundoj starante malproksime.

Post nelonge, la hundoj mordis la serpenton je la gorĝo. Ili sin tenis sufiĉe malproksime por ke la serpento ne atingu ilin. La sango de la serpento elŝprucis kaj ĝi mortis momenton poste.

La hundoj atenteme snufis por konstati, ĉu la serpento vere mortis. Ili malestime ĵetis polvon al ĝia kadavro kaj kuris al Zhu Ping, etendinte la langon kaj svingante la voston. Ĉiuj najbaroj aplaŭdis kiam Zhu Ping kaŭriĝis kaj karesis la savintojn. La hundoj lekis liajn vizaĝon kaj manojn.

"Kiu diris, ke kvarĝemeleco de hundoj donos malbonan sorton?" Zhu Ping diris al siaj hundoj.

"Mi neniam imagis, ke post mia savo al vi, vi savos mian vivon."

"Savi la vivon de aliaj ja signifas savi la propran!"



## 77. Virinoj en porkejo



La ĉefurbo de Anhui-provinco (Anhŭi) havas interesan nomon: Hefei (Hefej), kiu signifas "Kunan Grasiĝon".

Ne malproksime, en Paitou-vilaĝo (Pajtoŭ) estis porkobuĉisto nomata Xuan (Ŝjŭan) la Kvara. Li havis dudekjaran sperton pri buĉado. Li enspezis multe el tiu ĉi profesio, kaj ŝparis monon zorgeme, do li havigis al si tri domojn. Li loĝis en unu el ili, kaj ludonis la aliajn. Li ankaŭ posedis cent akreojn da fekunda kampo.

Alivorte, li jam havis sufiĉan monon por pasigi la restan vivon. Sed ne estas multaj homoj sciantaj kontentecon. Fakte, Xuan tiel kutimiĝis al la buĉado, ke li sentus ĝenon se li pasigus tagon farante nenion. Eĉ en la festoj li akrigadis tranĉilon.

Li ellitiĝis frue iumatene kiel kutime por komenci la tagan laboron. Lia edzino iris al necesejo ĉe porkejo. Ŝi senatente ĵetis rigardon al la porkejo, kaj ekkriis. Je tio la edzo alkuris haste.

"Kio okazas? Kio okazas?"

"Mi hazarde rigardis en la porkejon, kaj vidis du virinojn kuŝantaj tie, anstataŭ la porkojn. Mi opiniis, ke tio estis iluzio. Mi do frotis al mi la okulojn kaj rigardis atente, tamen mi certis, ke tio estas du virinoj, sed ne porkoj. Mi pensas, ke tio aŭguras ion. Mia kara! Bonvolu ne plu mortigi porkojn!"

"Ha, ha, ha!" ekridis Xuan la Kvara, "Vi havas strangan ideon! Eble vi ankoraŭ ne sobriĝis el sonĝo?"

SinJORINO Xuan vidis, ke li ne akceptis ŝian admonon, ŝi do forkaptis lian tranĉilon kaj ĵetis ĝin en fekejon. Xuan la Kvara ne mortigis porkojn tiutage, sed li eliris kaj aĉetis novan

tranĉilon.

En la sekva tago, Sinjorino Xuan petis siajn gepatrojn veni por admoni la edzon: "Rigardu, vi jam havas sufiĉe multan monon por la resta vivo. Kial vi ankoraŭ ne obeas la deadmonon de via edzino?"

"Sed estas mia kariero mortigi porkojn." "Se vi ne rezignos tion, nia filino eksigôs de vi."

Xuan pensis pri la geedza vivo dum longaj jaroj, kaj ankaŭ pri la gajnita mono pro buĉado de porkoj. "Do lasu ŝin eksigi."

Xuan donis al sia eksedzino duonon de ilia havaĵo kaj ankaŭ la rajton prizorgi ilian infanon. Kiam ĉio estis aranĝita, Xuan revenis al sia laboro kaj buĉis la porkojn, kiujn lia eksedzino iam opiniis virinoj.

Li mortigis ankaŭ iliajn porkidojn. Sed apenaŭ li finis la laboron, iu enkuris kaj informis lin, ke lia infano subite mortis.

Xuan ekpentis, tamen li estis tro obstina por konfesi, ke li eraras. Li komencis partopreni en hazardludado por forgesi sian malĝojon. Sed post nelonge, ĉiuj ludantoj sciis bone, ke iliaj poŝoj pleniĝos de mono kiam ajn Xuan venas al ilia tablo, ĉar li perdadis monon ĉiufoje.

Nelonge poste, li perdis ĉiujn havaĵojn pro la monludado.

"Kion fari?" li diris al si mem, "Mi nur povas repreni mian antaŭan karieron mortigi porkojn, ĉu ne?" Li kolektis iom da mono, aĉetis kelkajn porkidojn kaj ekbredis ilin. Sed antaŭ ol pasis unu monato, li ekmalsaniĝis kaj devis kuŝi surlite.

Li suferis pro stranga malsano. La sango kaj puso senĉese fluis el lia nazo, kaj tio tiel dolorigis lin, ke li vekriis plengorĝe. Kiam homoj aŭdis tion, ili ĉiuj opiniis, ke tio sonas same kiel vekrio de buĉata porko.





## 78. Ekzekuto de tondro



Laŭ Kolektitaj Perloj en la Darma Ĝardeno (Fajŭan Ĝulin), en Tang-dinastio (Tan) estis lerta kuiristo Feng Yuan (Fen Jŭan) en Changsha, (Ĉanŝa), Bohai (Bohaj). La reĝo de Regno Khotan en la okcidento venis omaĝi al la reĝo de Ĉinio. Oni dungis Feng Yuan por prepari festenon al la honoraj gastoj. La gastoj manĝis kaj frandis ĝissate kaj ĉiuj laŭdis, ke vere bongustas la pladoj. Tamen je la fino de la festeno, restis ĉirkaŭ cent kaproj ne mortigitaj. La respondeculoj de la festeno ne sciis kion fari per la restaj kaproj. Kiam la reĝo de Khotan hazarde aŭdis tion, li postulis, ke oni savu la kaprojn.

"Mi sincere deziras, ke oni sendu la kaprojn al budhisma templo por ke ili vivu ĝis la natura fino."

Feng akceptis la ordonon sendi la

kaprojn al la templo, sed li pensis, ke la reĝo de Khotan reiros al sia regno post nelonge, kaj pli ol naŭdek kaproj kostas grandan sumon! Do anstataŭ sekvi la ordonon, li vendis la kaprojn al buĉisto. Li vere ĝojis pro sia profito.

Poste li elspezis ĉion gajniton per la kaproj, kaj eble forgesis tion iom post iom. Li estis kuiristo tiel lerta, ke kiam ajn potencaj oficistoj aŭ famaj riĉuloj en la ĉefurbo volis okazigi festenon, ili ĉiam dungis lin por tio. Li laboris diligente, kaj lia enspezo estis tre alta.

Somere de la jaro 661, Feng promenis ekster la pordego de Xuanyang-urbo (Ŝjŭanjan). Subite, ekblovis ŝtormo, kaj nigriĝis la ĉielo. Pluvego ekverŝiĝis kun fulmoj kaj tondroj.


Timiga tondrego eksonis ĉe la urbomuro, kaj stuporigis ĉiujn homojn ĉirkaŭajn. Poste ili vidis viron genuantan en la pluvo. Lia hararo

distaŭziĝis, kaj liaj okuloj elstariĝis. Li tenis la mentonon sur la brusto kvazaŭ senkapigota kondamnito.

Oni rigardis atente, kaj trovis, ke lia kapo preskaŭ detranĉiĝis. Lia kapo dispeciĝis kaj la cerbo fluis el la verto. Li similis al tiu, kies kapo hakiĝis de ekzekutisto.

"Haj, ĉu ne Feng Yuan, la fama kuiristo?" "Jes, prave," iu respondis, "eble tio estas la rezulto de mortigo al la liberigindaj kaproj."

Ni neniam povas eskapi de la prijuĝado kaŭzita de ni mem.



## 79. La vizaĝo de buĉisto



Qian Meixi (Ĉjan Mejŝji) iam notis la historion de Xue Qingguan (Ŝjüe Ĉjin'güan), la buĉisto de kaproj. Xue havis vendejon por vendi kapran viandon kaj viandan supon. La bongusteco de lia vianda supo famis eĉ en malproksimo, kaj allogis multajn klientojn proksimajn kaj malproksimajn. Iuj eĉ vojaĝis kelkajn tagojn por gustumi lian supon, kaj poste foriris kontente.

Xue riĉiĝis post nelonge pro la prospera negoco.

Pluraj el liaj amikoj estis budhanoj. Ili ofte admonis lin ne plu mortigi kaprojn: "Vi jam gajnis sufiĉan monon. Ne estu tiel avida. Ni ja ne estas bestoj en la ĝangalo. Vi scias bone, ke mortigi bestojn estas terura peko kontraŭ la universo. Vi ne povos eskapi de la ŝuldo estonte.

Frue aŭ malfrue vi devos pagi pro via malbona konduto, kaj tiam, kiom ajn riĉa vi estos, tio donos nenian helpon al vi."

"Rigardu, Xue, kial vi ne faru alian negocon per via mono? Vi povas gajni monon per tio, kaj samtempe, vi povas penti kaj fari bonajn aferojn por kvitigi ĉiujn viajn pekojn. Alie, malfeliĉo trafos vin kaj ankaŭ viajn infanojn kaj prainfanojn."

Neniu volas aŭskulti bonan admonon malplaĉan. Xue mokis: "Mi ne estas tiel malsaĝa por kredi la mitojn de maljunulinoj. Ĉu vi opinias, ke vi povus timigi min per la feaj rakontoj? Peko kontraŭ universo! Kia sensencaĵo!"

Kiam Xue estis ĉirkaŭ kvardek-jara, li eksuferis de stranga malsano. Lia buŝo etendiĝis, lia mentono longiĝis kaj liaj okuloj perdis la antaŭan brilon. Efektive, li aspektis pli kaj pli simila al kapro.

Post nelonge, ĉiuj lokanoj opiniis, ke la vizaĝo de Xue Qinguan similas tiun de kapro. Kvankam ili povis diri nenion al li, tamen ĉiutage aroj da homoj venis por rigardi lin. Kontentiĝinte pri la rigardo, ili sin turnis al siaj amikoj, flustris inter si kaj kapjesis. Xue laciĝis de tio. Neniu el la kuracistoj povis kuraci lin, kaj ankaŭ ili ĉiuj diris, ke li vere mienas kiel kapro.


Xue tiel afliktiĝis, ke li sin opiniis freneza, sed li estis tro obstina por konfesi, ke li eraris. Li rifuzis agnoski, ke li ne rajtis mortigi tiel multajn kaprojn.

Fine, li falis en riveron kaj dronis, okaze de komerca vojaĝo. Oni eĉ ne povis trovi lian kadavron.

La humiliĝo kaj subita morto ja estus eviteblaj por malfeliĉa Xue. Se li havus konsciencan kaj ne estus tiel avida, li povus ĝui longan kaj feliĉan vivon.



Sed malfeliĉe, mono, obstino kaj  
malsaĝo estis pli valoraj al li ol feliĉo,  
bonfarto kaj saĝo.



## 80. Tipa akcidento en ĉasado



Estis pitoreska montaro, tamen Wu Tang (U Tan) tute ne zorgis pri la ĉarma pejzaĝo. Li kaj lia filo elspezis multe da tempo por ĉasi en la montaro.

Wu Tang estis lerta arkopafisto. Li neniam maltrafis. Li estis tiel lerta en la pafado, ke li tute ne bezonis celi. Li bezonis nur tiri la pafarkon por trafi la celon. Neniam estis bestoj tiel rapidaj kaj lertaj por eskapi de liaj sagoj.

Jen aperis malgranda cervido. Malgrandaj cervidoj eble estas la plej amindaj bestoj en la naturo, sed Wu Tang tute ne pensis pri tio. Kiam li vidis ĝin, li tiris sagon el la sagujo. Zum! La cervido falis teren kaj mortis.

Wu Tang rimarkis, ke ĝia patrino

estas tre malproksima en la herbejo, kaj lia sago ne povas atingi ĝin. Li do restis senmova por atendi la plej bonan momenton.

La patrino cervo korŝire kriis, trovinte sian idon morta. Lamente, ĝi komencis leki la vundon de la cervido. Tuj kiam ĝi absorbiĝis en la lekado, Wu Tang pafis senprokraste kaj mortigis ĝin.

Sed tio ne estis sufiĉa por Wu Tang. Li pensis, ke eble troviĝas pli da cervoj ĉirkaŭe, ĉar li aŭdis ion marŝanta en la herboj. Tie eble estas almenaŭ du aliaj cervoj.

"Tri cervoj estas multe pli bonaj ol du," li pensis kiam li sin pretigis por pafi. Konfirminte la devenon de la sono, li tuj pafis al figuro en la herboj.

Li sentis fieron aŭdinte la sonon de io falinta sur la teron, sed lia fiero tuj fariĝis timego kiam li aŭdis homan ĝemkrion. Cervoj ne kapablis ĝemi tiamaniere. Tie sonis homa voĉo!

Wu Tang alkuris haste, kaj vidis timigite, ke la tria viktimo estas ne cervo, sed lia propra filo, kiu venis por ĉasi kun li.

Wu Tang stuporiĝis. Subite aŭdiĝis voĉo el la ĉielo: "Wu Tang! Ĉu vi nun komprenas, kiel vi malĝojas vidinte vian propran filon vunditan per sago? Bestoj amas siajn idojn same kiel vi amas la vian. Kiom da malĝojoj vi jam kaŭzis al la gepatroj de la bestoj?"

Wu Tang staris tie tiel malĝoje kaj stultece, ke li tute ne rimarkis la sonon de proksime. Subite, li konsciis, ke la sono, kiun li aŭdis en la herboj, ne estas de cervo, sed de tigro.

Estis jam tro malfrue. Apenaŭ li pretis forkuri, la tigro jam mordis lin je la brako, per kiu li pafis. Kaj plej baldaŭ, la resta parto de lia korpo estis en ĝia ventro.



## 81. Tria vulpeto



Wang Huonan (Ŭan Hŭonan) estis riĉulo en Huainan (Hŭajnan). Li entreprenis lombardejon, kaj la komerco iris tre bone. Li bezonis pli da spaco por teni la varojn, do li aĉetis plurajn malplenajn domojn ĉe la lombardejo. Oni eksteratende trovis tri vulpetojn en unu el la aĉetitaj domoj. La laborantoj provis forpeli ilin, tamen Wang Huonan donis alian proponon:

"Ili kaŭzos al ni senfinajn malagrablajojn se vi lasos ilin eskapi vivaj. Mortigu ilin." Do du el la vulpetoj estis mortigitaj kaj nur unu eskapis.

Ekde tiam, Familio Wang ne plu havis pacan vivon. Iuj objektoj malaperis, dum aliaj perdiĝis mistere, aŭ ĉiuj objektoj ne plu restis sur siaj antaŭaj lokoj. Oni diris, ke tion faris

la tria vulpo.

En vintro de 1815, fajro senkaŭze okazis en la tenejo. Feliĉe oni trovis tion frue, kaj la familio ne suferis grandan damaĝon. Wang Huonan petis sorĉiston okazigi ceremonion por forpeli la malagrablajojn, tamen post pluraj monatoj okazis alia fajro. Oni scias bone, kiel ruzaj estas la vulpoj. Se ili persistas, ili ja povas kaŭzi senfinajn malagrablajojn.

Fine, post longjaraj senĉesaj malagrablajoj, Wang Huonan decidis forvendi la tenejon. Li proponis ĝin al Chen (Ĉen), alia riĉulo, kiu ankaŭ bezonas spacon por siaj varoj. Chen venis kaj inspektis la tenejon. Ili interkonsentis pri la konvena prezo de 40 000 oraj moneroj, kaj decidis la tagon por subskribi kontrakton.

Ĝuste en la tago antaŭ la subskribo de la kontrakto, Gesinjoroj Chen aŭdis voĉon dirantan al ili: "La malamo inter mi kaj Wang Huonan tute ne



estas via afero, do ne intervenu pri tio." Ili ne povis distingi, de kie venis la voĉo, sed Sinjoro Chen konvinkiĝis, ke li devos serĉi tenejon aliloke.

"Ĉiuj miaj havaĵoj ruiniĝos en la fajro!" la vekrio de Wang Huonan vekis ĉiujn familianojn iunokte en marto 1841. Li kuris el la loĝejo eĉ sen pantalono kaj ŝuoj.

Oni ne sciis, kiel fajro okazis en la kuirejo kaj sin etendis al la tenejoj. Kiam la familio vekiĝis pro tio, ĉiuj tenejoj jam dronis en la fajrego. Do je la tagiĝo tie restis nenio alia krom ruino.

La tria vulpo plenumis sian venĝon.

Kvankam bestoj ne havas homan inteligentecon, tamen ili ankaŭ povas memori kiu estis bona kaj kiu iam faris malutilon al ili. Saĝaj bestoj kiel vulpoj eĉ povas sin venĝi necedeme. Neniu povas teni ilin for de la venĝo, kaj eĉ la spertaj sorĉistoj ne povas

subigi ilin.

La ununura metodo por eviti malfeliĉon estas pento kaj kompto. Wang Huonan devus penti pri la mortigo al la vulpoj, fari bonajn aferojn kompanse kaj ĉesi mortigi bestojn por pruvi sian sinceron. Kaj samtempe, se li kapablas instrui la vulpon pri la budhisma darmo, kiu eksplikas la ekvilibron kaj naturon de la universo, ili povas likvidi la malpacon inter si men, fariĝus amikoj kaj evitus la malfeliĉaĵon.

En konkludo, per venĝo oni tute ne povas rikolti bonon.



## 82. Foko en rivero



Li Chuntan (Li Ĉuntan) gvidis armeon por eskorti grenon laŭ rivero al Dachangkou (Daĉankou) en Huaining (Hŭajnin), Anhui-provinco (Anhŭi). Lia subulo Gong Kai (Gun Kaj) venis al li kaj raportis: "Mi havis strangan songon lastanokte."

"Kion vi songis?"

"Mi songis maljunulon kun blankaj haroj kaj longa barbo. Li venis al mi plorante kaj petis: 'Helpu! Donu favoron por savi min. Se vi tiel agos, mi certe rekompencos vin iutage!'"

"Songo vere stranga!"

Ilia interparolo rompiĝis de subita bruo. Ĉiuj soldatoj en la boato kriis ekscitite, rigardante ion en la akvo. "Rigardu, sinjoro!" diris Gong Kai: "Jen foko! Ĉu vi iam vidis fokon en la rivero?"

La soldatoj kaptis la fokon kaj

trenis ĝin al la boato. Li Chuntan kaj Gong Kai aliris por rigardi. Kiam la foko vidis Gong Kai, ĝi najlis al li sian rigardon longan kaj signifoplenan. La koro de Gong Kai batis pli rapide. Li rememoris sian sonĝon.

"Sinjoro, mi volas aĉeti la fokon kaj savi ĝian vivon. Mi opinias, ke ĝi havas rilaton kun mia sonĝo, pri kiu mi ĵus diris al vi."

"Bone, se vi volas. Vi tion faras per via propra mono." Gong Kai prenis sian monujon por doni rekompencan al la soldatoj okupiĝantaj pri la foko.

La soldatoj ĝojis pro tio, sed malica soldato nomata Chen (Ĉen) la Kvara insistis, ke li volas manĝi la fokon kiel vespermanĝon. Li rifuzis la monon de Gong Kai. Anstataŭ liberigi la fokon, li prenis sian lancon kaj pikis ĝin je la kapo. La akvo ruĝiĝis pro la sango.

"Ĉu vi ne scias, kiel bongustas la fokajo?" kriis Chen la Kvara al

la soldatoj, "Kion vi volas kun la malgranda trinkmono? Ni manĝu fokaĵon ĉi-nokte!" Multaj soldatoj bedaŭris por la kompatinda foko, sed iuj ne zorgis pri tio. Ili helpis Chen movi la mortan fokon sur la boaton, kaj ĝin manĝis kune kun li.

Eble estis malprudente manĝi la fokon. Nelonge poste, malsaniĝis ĉiuj, kiuj partoprenis en la manĝado kun Chen la Kvara. Chen malsaniĝis plej grave kaj suferis terure. Kelkaj soldatoj prizorgis lin. Subite, Chen ekparolis en stranga tono: "Mi laboris longajn jarojn por min kulturi. Ĉio iris glate ĝis mia misfortuno kaj finiĝo en la rivero. Mi petis Gong Kai por helpi. Ĉiuj konsentis liberigi min, krom vi, maliculo. Vi rifuzis liberigi min, Chen la Kvara! Vi rifuzis lasi min vivi. Vi eĉ prenis lancon, pikis mian kapon kaj mortigis min. Vi forrabis mian vivon, kaj ankaŭ mi ne plu lasos vin resti en la mondo!"

La soldatoj rigardis terurite kiam Chen la Kvara klinis sian kapon kaj mortis mizere.

Iuj vivestaĵoj kultivas sian povon en centoj kaj miloj da jaroj. Iuj el ili eĉ atingis la kapablon de metamorfozo. Kvankam sciencistoj ankoraŭ ne rekonas tiajn kapablojn de la vivestaĵoj, tamen malgraŭ ĉio, en la naturo estas pli multaj vivestaĵoj, kiujn ni ne povas vidi per niaj propraj okuloj.





## 83. Kaŭzo de mortigita koko



"Li estis pia budhano kaj vera vegetarano. Li observis la budhismajn regulojn tre bone." diris Li Ziwei (Li Ziŭej) viŝante siajn larmojn.

"Jes, prave. Li estis modelo de ĉiuj budhanoj," respondis lia amiko Luo Dagan (Lŭo Dagŭan).

Ili babilis pri sia malnova amiko Jin Shiyan (Ĝin Ŝijan). Jin Shiyan estis vere tiel bona kiel ili laŭdis. Eĉ homoj je cent kilometroj ĉirkaŭe sciis bone, ke li estas vera budhano. Ili estis surprizitaj kaj malĝojaj pro tio, ke li mortis en la aĝo de kvardek jaroj.

Jin Shiyan venis en la sonĝon de sia servanto kaj diris al li: "Mi tre ĝojas revidi vin."

"Bedaŭrinde, mi mortis tiel juna. Mi deziregis iri al la Pura Lando, tamen mia deziro ne realiĝis. Mi fartas bone. Mi povas veni kaj iri

laŭplaĉe."

"Nun mi estas novico ĉe Amitabo. Mi okupiĝas akumulante meritojn por iri en la Puran Landon. Diru al miaj familianoj, ke ili ne plu malĝoju por mi. Bone? Estas vere agrable paroli kun vi."

Ili ĉiuj ĝojis pro tio, sed iom poste, Jin Shiyan aperis en la sonĝo de sia estinta edzino, kaj li furioziĝis: "Vi malsaĝulinaĉo! Ĉu mi ne instruis ĉion al vi? Jen rigardu, kion vi faraciĝis! Ĉu vi volis detrui min? Kiel vi povis esti tiel senprudenta?" Li riproĉis ŝin severe.

SinJORINO Jin tute ne sciis, pri kio ŝi eraris. Antaŭe ŝi neniam vidis sian estintan edzon tiel kolera. "Pri kio mi eraris?" ŝi pensis, "Ĉu eble li furioziĝis pro mia reedziniĝo?"

"Vi buĉis kokon ĉe mia tombo je via reedziniĝo! Mi tre ĝojas pri via reedziniĝo. Mi ne toleras lasi vin suferi de soleco, sed pro kio vi

faris tian malbonaĵon kontraŭ la kompatinda koko? Ĉu vi ne scias kiel serioza la kulpo estas?"

Lia edzino sentis grandan bedaŭron kaj konfesis honeste: "Ne, mi vere ne scias, kiel serioza tio estas."

"Bone, lasu min diri al vi. Nun la oficistoj observadis min ĉie por certigi al si, ke mi neniam mortigis bestojn. Eble ili misopiniis, ke mi mem mortigis la kompatindan kokon. Nun ili ĉiam intervenas en miajn aferojn kaj instruas al mi, kion mi devas fari kaj kion mi ne rajtas fari. Vi kaj via koko..."

"Mi tre bedaŭras... Shiyan, vi scias bone, ke mi jam reedziniĝis. Mi ĝojas, ke vi ne malhelpis min kontraŭ tio. Ĉu vi ankaŭ scias, ke mi jam gravediĝis?"

"Jes. Mi scias bone. Estas knabo."

"Knabo? Bonege!"

"Tiu ĉi estos bona, tamen alifoje..."

"Kio okazos alifoje?"

"Alifoj, vi kaj via bebo ne fartos tiel bone. Jen, miaj oficistoj revenis, do mi devas forlasi vin. Sed aŭskultu! Mi esperas, ke vi fariĝu vegetarano. Ne plu metu mortajn bestojn ĉe mian tombon. Ĉu vi komprenas?"

Poste, ĉio okazis kiel Jin diris en la sonĝo de sia estinta edzino.

Atentu, kiel grava estas la morta koko por la animo de mortinto. Do pensu, kio okazas al la animoj de la homoj, kiuj manĝadis kokaĵon, porkaĵon kaj bovaĵon tagon post tago!



## 84. Ruĝaj ŝnuroj



Fama klerulo Ji Xiaolan (Ĝi Ŝjaŭlan) notis jenan historion:

Grandioza boato atingis bordon. Oni surprizite vidis, ke mezaĝa sinjorino dolore ploregas ĉe la fenestro de la boato. Ŝi estis en belega kostumo, kaj oni povis konstati tuj je la vido, ke ŝi estas la edzino de iu granda sinjoro. Iu flustris: "Ĉu ŝi ne estas la edzino de Lia Subprovincestro Moŝto?"

"Jes. Sed pro kio ŝi malĝojas en tiel alta pozicio?"

Ŝiaj servantoj en la boato ankaŭ provis informiĝi pri la sama afero.

Fine, maljuna nutristino malkaŝis la sekreton. La sinjorino songĝis, ke ŝia filineto, kiu mortis tre juna, estas ligita per ruĝaj ŝnuroj por esti mortigota. La filino petegis ploregante, ke la patrino savu ŝin. Tio estis tiel korŝira, ke la

sinjorino vekiĝis timigite.

Sed la sonĝo ne tuj finiĝis. Kiam ŝi vekiĝis, ŝi ankaŭ povis aŭdi la ploradon de la kompatinda filino, kaj la voĉo aŭdiĝis el la najbara boato.

La nutristino iris esplori tion. Atinginte la boaton, ŝi tuj vidis sangan bildon.

Buĉisto okupiĝis mortigi porkidon, kaj la porkido vekriis plengorĝe. Kiam la nutristino iris sur la boaton, ĝi baraktis kaj spasmis tutkorpe. Vere terure! Ĝiaj kruroj estis ligitaj per ruĝaj ŝnuroj, same kiel en la sonĝo de la sinjorino.

La nutristino venis tro malfrue por savi la porkidon. La sinjorino ĝin aĉetis kaj solene enterigis sur la bordo.


Poste oni babilis multe pri la stranga afero.

La filino de la subprovinca estro estis aminda kaj inteligenta. Ŝi ne havis malbonan konduton, tamen al ŝi tre plaĉis kokida viando. Ŝi rifuzis

manĝi sen plado da kokaĵo. Ĉiujare  
sepcent aŭ okcent kokidoj mortis  
por kontentigi ŝian apetiton. Kiam ŝi  
mortis malfeliĉe en la aĝo de dek ses  
jaroj, ŝi devis respondecigi pri la vivo de  
miloj da kokidoj.

Kiu povas eskapi el la sanga ŝuldo  
de miloj da vivoj?





## 85. Kŝncienco de ĉasisto



Sinjoro Huang Xiuyuan (Hŭan Ŝjujŭan) estis fama kuracisto sperta pri malsanoj de haŭto.

Iutage li sidis en kuracejo kiam viro eniris ĝemante. "Kia malbelulo!" Li ne povis sin deteni de la penso, kvankam li sciis bone, ke kuracistoj devas laŭeble kuraci la suferon de malsanuloj malgraŭ ilia aspekto.

La viro demetis sian veston kaj sidiĝis sur seĝon por ke la kuracisto vidu lian dorson. Estis dekoj da furunkoj sur la dorso kaj ŝultroj de la malsanulo. Iuj furunkoj estis tiel grandaj kiel tasoj, ĉirkaŭataj de multaj malgrandaj. Ili ĉiuj odoras naŭze.

Kuracisto Huang estis tiel surprizita, ke li diris pretervole: "Via tuta dorso jam putriĝis."

"Kio?" demandis la malsanulo sin turninte.

"Tio estas vere rara malsano nomata 'Birdoj Omaĝi al la Imperiestro'. Ne kuraceble!"

Kuracisto Huang supren puŝis siajn okulvitrojn sur la nazo kaj demandis: "Kian karieron vi faras? Mi opinias, ke estas plej bone por mi informiĝi pri tio unue."

"Ĉu vi scias pri la nova armilo nomata 'pafilo'? Mi havas pafilon, kaj uzas ĝin por pafi birdojn. Mi kutime renversas nestojn tiel ke la birdoj ne plu povu reiri. Poste mi pafas ilin kiam ili flugas ĉirkaŭe. Mi tion faras jam de multaj jaroj." konfesis la malsanulo.

"Jen la kialo!" respondis la kuracisto, "Pensu, kiom da familioj vi ruinigis, kaj kiom da vivestaĵoj vi mortigis! Vi suferas la doloron de vi mem pro la kulpo kontraŭ la natura leĝo."

La ĉasisto maltrankviliĝis: "Do kion mi faru?"

"Se vi estas sufiĉe brava por konfesi, ke vi ne rajtis mortigi la senhelpajn birdojn, kaj se vi ĵuras, ke vi ne plu mortigos vivestaĵojn, ni eble havus ŝancon, alie..."

La ĉasisto enpensiĝis pri tio, kaj li konsciis, ke li vere estis tro kruela mortigi tiel multajn senhelpajn birdojn. Li senprokraste ĵetis sian pafilon en riveron kaj prenis alian karieron.

En du semajnoj lia dorso multe pliboniĝis. Li eksentis komfortecon ambaŭ mense kaj korpe. Post nelonge li tute resaniĝis.

La malsanulo savis sin mem el la terura fino pro tio, ke li vidis la veron kaj obeis al sia konscienco.



## 86. Zhao Qun kaj rivera testudo



La historio okazis en Dantu, Jiangsu-provinco (Ĝjansu). Iam fiŝisto kaptis grandan testudon. Li ne sciis kion fari per ĝi plej bone. Li do pensis: "Vere granda testudo! Ĝi valoras tre multe. Neniu sufiĉe riĉas por aĉeti ĝin krom Zhao Qun (Ĝaŭ Ĉjun) en la regiono. Li estas la plej riĉa homo en la gubernio."

Li metis la testudon en ĉaron kaj portis ĝin al Zhao Qun. Vidinte ĝin, Zhao Qun tuj diris: "Faru testudan supon per ĝi!" Li pagis altan prezon al la fiŝisto por la testudo. Ekde tiam, kiam ajn fiŝistoj kaptis testudojn, ili ĉiam vendis al Zhao Qun. Do kapti testudojn por Zhao Qun fariĝis speciala kariero en la regiono.

Post unu jaro, Zhao Qun songĝis, ke li estas akuzita antaŭ juĝisto en

la Templo de la Orienta Montaro. La akuzanto estas dikulo kun triangula kapo. Li sin nomis Rivera Testudo. La rivera testudo raportis al la reĝo de la Orienta Montaro: "Zhao Qun mortigis multajn el ni testudoj. Li devas kondamniĝi pro tio."

"Neniom. Mi nur ŝatas manĝi testudaĵon. Nur tiom. Neniom da malbonaĵo mi faris! Mi diras, ke mi tute ne kaptis la testudojn."

La reĝo respondis: "La fiŝistoj estas senkleraj, kaj oni ne povas supozi ilin kompreni la veron, ke mortigi senkulpajn bestojn rompas la ekvilibron de la universo. Vi, kiel klerulo, devas scii pli bone pri tio. Se vi estas senscia, ni donos al vi lecionon en la infero." La reĝo najlis sian indignoplenan rigardon al Zhao Qun, dum la rivera testudo kapjesis.

"Zhao Qun," tondris la voĉo de la reĝo, "kion vi diros por vin defendi?"

"Ĉu vi korektos vian eraron? Ni

donu al vi bonan ŝancon. Se vi ne plu mortigos nek kaŭzos mortigon al ĉiuj bovoj, porkoj, kortobirdoj, hundoj, testudoj kaj aliaj bestoj, sed laŭeble deadmonos aliulojn de mortigado, vi povos kompensi vian kulpon per vi mem."

"Ĉu la akuzanto havas ion por aldoni?" "Jes, Via Majesto," petis la rivera testudo,

"Ĉu vi forlasos lin tiel facile? Ne forgesu, kiom el miaj parencoj finiĝis en lia ventro."

"Jes, prave! Se ni ne donas al li lecionon pro liaj kruelaj kondutoj, ni ne povas esprimi la koleron de ĉiuj vivestaĵoj. Subuloj! Bategu lin dekfoje per bambuaj stangoj."

Ses demonoj faligis Zhao Qun kaj premis lin al la tero dum aliaj du bategis lin per bambuaj stangoj.


Kiam Zhao Qun stariĝis de la tero, la reĝo diris: "Se iu posedas bonan ideon, la dioj kaj demonoj



povas donaci al li bonan sorton. Se iu malbone kondutas, fatalaĵo trafos lin. Se vi ŝanĝos vian konduton, vi povos gajni bonan sorton. Se vi daŭre agos laŭ via malbona hobia, vi ne estos indulgita." Kelkaj demonoj kondukis lin el la templo.

Zhao Qun vekigis en sia propra lito. Liaj sidvangoj estis ŝveligitaj. Li kuŝis en la lito dum semajno por resaniĝi.

Li diris al sia tuta familio, kio okazis al li. Ekde tiam, ili ĉiuj fariĝis vegetaranoj. Ili ne plu manĝis viandon. Ili aĉetadis kaptitajn bestojn kaj liberigis ilin. Nelonge poste, ĉiuj opiniis, ke la familio de Zhao Qun ŝanĝiĝis entute. Ili fariĝis ne nur la plej riĉaj, sed ankaŭ la plej bonkoraj homoj en la regiono.



## 87. La genuoj de Maljuna Xu



Maljuna Xu (Ŝju) eklaboris kiel servanto en la familio Gao (Gaŭ) jam en siaj kvindek jaroj. Li laboris diligente kaj ĉiam faris sian laboron rapide kaj atente sen plendo aŭ malkontento. Do li tre plaĉis al Gesinjoroj Gao.

Iutage la suno jam leviĝis alte en la ĉielo, tamen Maljuna Xu ankoraŭ ne ellitiĝis. Tio estis kontraŭ lia kutimo, ĉar li ĉiam ellitiĝis plej frue en la mateno. Alia servanto iris al lia ĉambro por vidi, kio okazis. Komence li frapis je la pordo, kaj poste, li bategis la pordon ĝis Maljuna Xu eliris ŝanceliĝante kun esprimo de granda doloro.

"Kio okazis al vi je la kruroj?" mire demandis la alveninto.

"Rigardu, miaj genuoj ruĝiĝis kaj

ŝvelis. Eble mi suferas de furunkoj," diris Maljuna Xu, kuspinte siajn krurumojn.

Li daŭrigis: "Mi havis strangan songon lastanokte. Mi vidis centojn da angiloj. Du el la plej grandaj angiloj sin ĵetis al mi kaj mordis min je la genuoj. Tio tiel dolorigis min, ke mi vekiĝis. Mi trovis, ke mi ne plu povas moviĝi. Jen kial mi ne povis rapide malfermi la pordon."

Sinjoro Gao diris: "Tio estas kurioza songo. Ĉu vi scias pri la kaŭzo?"

Maljuna Xu iom pripensis kaj respondis: "Kiam mi estis dudekjara, mi havis nudelan vendejon en Dongguan-(Dungŭan)-kvartalo. Mia angila nudelo estis fama kaj bone vendebla, do mi devis mortigi dekojn da angiloj ĉiutage por kontentigi la bezonon."

"Post tridek jaroj, mi jam akumulis grandan sumon. Enuiĝinte

pri la nudela komerco tagon post tago, mi decidis investi. Mi komencis akapari oleon por elvendi je plialta prezo kiam ĝi estos en urĝa bezono. Ĉio estis preta, tamen subita brulego okazis en mia tenejo, kaj elpelis min. Mia havaĵo de tridek jaroj cindriĝis dum nokto! Mi havis nenion ĉe mi. Jen kial mi venis al vi por labori kiel servanto."

"Ĉu vi opinias, ke mia songo havas rilaton kun miaj genuoj, Sinjoro?" demandis Maljuna Xu.

"Tio estas nur songo. Ne maltrankviliĝu. Mi donos ion al vi." Sinjoro Gao elprenis medicinan ŝmiraĵon faritan laŭ speciala recepto de sia familio, kaj ŝmiris ĝin sur la genuojn de Maljuna Xu. Momenton poste, la genuoj de Maljuna Xu pliboniĝis kaj li kapablis piediri. Sed post nur pluraj tagoj, li denove suferis de furunkoj sur la genuoj.

Maljuna Xu ne plu kapablis ellitiĝi

por malfermi la pordon. Oni povis fari nenion ol eniri tra la fenestro. Li montris siajn genuojn al ili. La karno sur la genuoj preskaŭ putriĝis ĝis liaj ostoj.

"Venos mia fino," li plorĝemis, "ili denove venis al mi lastanokte. Dolorege! Mi ne povas elteni plue." Xu mortis de doloro post kelkaj tagoj.



## 88. Feliĉaj kraboj



Liang Tui'an (Ljan Tŭi'an) estis kuracisto, kiu vere deziris sensuferigi ne nur la homojn, sed ankaŭ ĉiujn vivestaĵojn. Kompreneble, li estis vegetarano.

Iun aŭtunon, lia amiko donacis al li du korbojn da kraboj kaj diris: "Manĝu kun vino!" Oni sciis bone, ke aŭtunaj kraboj kaj vino estas plej bongustaj kombinaĵoj. Sed Liang faris strangaĵon. Anstataŭ al la kuirejo, li portis la krabojn al malproksima riverbordo kaj liberigis ilin en la riveron.

Alia amiko veninta de Huzhou (Huĝou) diris al Liang Tui'an: "Vi estas vera bonkorulo. Tio rememorigis min pri Zhang Fengweng (Ĝan Fenŭen) en mia hejmloko. De generacio al generacio lia familio praktikas vegetarismon, kaj nenion



mortigas.

"Lia bonkoreco estas rekompencita. Multaj el liaj familianoj havas altan postenon en la kortego kun potenco kaj gloro. Mi certas pri la rezulto de via bonkoreco. En la estonteco via filo atingos altan postenon en la kortego, ĝuste kiel la filoj de la familio Zhang."

Liang Tui'an ridis dirante: "Fari bonajn aferojn estas mia devo. Mi tiel agis tute ne por ricevi bonan rekompencan. Kiam mi faris ion bonan, mi neniam deziris, ke tio alportu meriton al mi mem aŭ al mia familio. Ĉu vi ne opinias, ke la kraboj estas pli feliĉaj naĝante en rivero ol kuirate en poto? Tio estas rekompenco sufiĉa por mi."

Elkreskinte, Liang Qiqing (Ljan Ĉiĉjin), la filo de Liang Tui'an, trapasis la kortegan ekzamenon per bonaj atingoj kaj enoficiĝis en Gaozhou-urbo (Gaŭĝou). Kiam li vojaĝis al Fujian-


provinco (Fuĝjan), li plezure vidis sian plej bonan amikon, la klerulon Zhang (Ĝan), laborantan en la provinca departemento. La klerulo estis neniu alia ol la filo de Zhang Fengweng, kaj li estis ankaŭ vegetarano.

Liang Qiqing gastis monaton ĉe klerulo Zhang, kaj li ĝoje vidis, ke la familio Zhang neniam mortigis bestojn por la pladoj. En ordinaraj festenoj, ĉiuj pladoj estis vegetaraj, krom eventuale nur iom da sekigita anasaĵo, tamen Liang Qiqing rimarkis, ke lia amiko Zhang neniam tuŝis ĝin.

Liang ankaŭ havis profundan impreson pri la personeco de sia amiko Zhang. Zhang estis honesta kaj laborema. Li vivis kaj manĝis simple. Li manĝis malgrandan matenmanĝon kaj iris al la oficejo frue por la taga laboro. Li neniam iris al la oficejo malfrue kiel iuj aliaj gravaj oficistoj, kaj ankaŭ neniam prokrastis la ofican laboron.

Pripensu pri tio! En kiom bona mondo ni vivus, se ni ĉiuj estus vegetaranoj; se ni ĉiuj manĝus simplajn manĝaĵojn; se ni ĉiuj farus nian laboron fidele, rutine, senpompe kaj nekoruptiĝeme; se ni ĉiuj estus justaj kaj honestaj?

Se vi deziras vivi en tiel belega mondo, komencu fari tion per vi mem. Vi ne povas postuli, ke la aliaj estu bonkoraj, dum vi ne estas tia.



## 89. Kiso de abelo



Lu Xiaozheng (Lu Ŝjaŭĝen) estis malsupera oficisto en la nordokcidenta Ĉinio komence de Tang-dinastio (Tan), unu el la plej prosperaj periodoj en la ĉina historio.

Malfeliĉe, Lu estis avarulo. Li ne povis vivi harmonie kun la aliaj. Li estis ankaŭ malica kaj kruela. Se liaj servantoj faris ion ne plaĉan al li, li kutime venigis kaj bategis ilin. Li eĉ tiel kondukis al homoj, do vi povas imagi, kiel li kondukis al bestoj.

Iutage li rimarkis abelujon en arbo en la korto. Li estis tiel avara, ke li tute ne volis abelojn vivi en la korto. Li ordonis al servantoj forigi la abelujon. La abeloj zume flugis ĉe la abelujo, do la servantoj aŭdacis fari nenion kontraŭ ili.

Tio ege kolerigis la mastron. Li ordonis al la servantoj verŝi sitelon

da boligita akvo sur la abelujon, kaj mortigis centojn da senkulpaj abeloj.

Estis varme en majo. Foje Lu ripozis en sia dormoĉambro kaj dronis en profunda dormo. Subite, li eksaltis de la lito kun vekrio, masaĝante al si la buŝon. Io dolorigis lin.


Granda abelo flugis en la ĉambron kaj pikis lin je la buŝo. Lia buŝo ŝveliĝis, kaj la doloro estis tiel ne eltenebla, ke li vekriis kaj ĝemis senĉese.

Servantoj venis por rigardi la okazaĵon. Vidinte tion, ili tuj alvenigis kuraciston. La kuracisto metis medikamenton sur lian buŝon, sed tio ne efikis. Lia buŝo ŝvelis pli kaj pli serioze. Kvankam la kuracisto provis multajn metodojn, tamen li neniam sukcesis kuraci lin. Lu ne plu povis malfermi sian ŝveliĝintan buŝon por manĝi.

Vidinte tion, la kuracisto skuis la kapon kaj diris: "La veneno probable

jam eniris en lian koron."

Lu Xiaozheng fariĝis pli kaj pli malsata, kaj ankaŭ pli kaj pli malforta. Li pripensis longe kaj rememoris la abelujon kiun li ruinigis. Eble la sufero estis la rezulto de lia krueleco. Sed tiam estis jam tro malfrue por li savi sian vivon.





## 90. Morto de Jiu la Kvardek-sesa



Ni jam legis antaŭe, ke iuj ĉinoj nomiĝis per numeroj. Iuj el tiuj estis nur kromnomoj, sed iuj estis veraj nomoj. Antaŭe ni legis pri la obstina porko-buĉisto Xuan (Ŝjŭan) la Kvara. Eble li estis la kvara filo de sia familio.

Nun ni rakontos al vi pri ĝardenisto nomata Jiu (Ĝju) la Kvardek-sesa. Kio? La kvardek-sesa filo? Eble. Aŭ eble lia patro nur ŝatis tiun numeron.

La Kvardek-sesa estis ĝardenisto atentema kaj sperta. Li ne estis bone edukita, tamen li havis multajn spertojn pri ĝardenado. Kvankam ĉiuj laŭdis lin pri lia sperto, tamen li havis grandan mankon. Li estis malbonkora. Kompreneble, la ĝardenistoj kutime ne kapablis eviti al insektoj morton

de tempo al tempo, tamen la Kvardek-sesa precipe emis mortigi insektojn senpripense, ĉu ili vere minacas liajn kreskaĵojn.

Foje, kiam li laboris por flegi florojn, li hazarde vidis formikejon. La formikejo estis profunda, kaj ĉe la enirejo estis sennombraj okupitaj formikoj.

"Jen la ĝusta tempo!" diris la Kvardek-sesa al si mem. Li ĵus boligis kruĉon da akvo en la kuirejo por infuzi teon. Do malica ideo venis en lian kapon. Li tuj kuris en la kuirejon, elprenis la kruĉon kaj verŝis la bolantan akvon en la formikejon. Preskaŭ ĉiuj formikoj en la kaverno mortis de tio. La Kvardek-sesa opiniis tion vere amuza.

Boligi akvon kaj labori ja estis ŝvitige precipe en tiel varmega somero. La Kvardek-sesa demetis sian veston kaj reiris al la laboro, kantetante ĝojplene.

Vere bela tago! La vetero estis bona, kaj li ĵus mortigis multegajn formikojn. Li prizorgis sian ĝardenon tiel bone, ke li havos pli multajn legomojn kaj florojn por vendi en bazaro. Li jam ŝparis sufiĉan monon por preni edzinon. Jen estis la ĝusta tempo. Lia aĝo jam superis tridek jarojn kaj multaj el liaj amikoj eĉ havis infanojn.

"Fraŭlino Zhang (Ĝan) estas taŭga por mi. Ŝi havas ĉarman vizaĝon kaj delikatajn blankajn manetojn, kiujn mi iam vidis. Se mi edziĝos al ŝi, mi havos grupon da infanoj. Ĉu tio ne estas feliĉo?"

"Ŝia patro estas la plej bona amiko de la mia, kaj nun mi jam havas sufiĉan monon por vivteni la familion. Do mi petu mian patron trovi taŭgan svatistinon por nia geedziĝo."

Ju pli pensis la Kvardek-sesa, des pli li ĝojis. Ĉio estis perfekta en la perfekta tago krom tio, ke jukega ruĝa

makuleto aperis sur lia ŝultro. Ju pli li gratis, des pli ĝi jukis al li.

Daŭre laborante, li sentis pli da juko. La juko pli kaj pli intensiĝis. Malgrandaj ruĝaj makuletoj senĉese aperis kaj kovris lian tutan torson. Li povis fari nenion alian ol demeti sian laborilon kaj okupiĝi pri la gratado.

Ju pli li grategis, des pli jukis al li la korpo, kaj des pli da ruĝaj makuletoj aperis. Li do frotis sian dorson sur arbo dum li gratis la bruston kaj brakojn per la manoj kaj la krurojn per la piedoj.

Lia tuta korpo des pli jukis. Lia haŭto vundiĝis de la gratado, kaj eĉ el ĉiu ruĝa makuleto rampis formiko.

Kiam tio okazis, la Kvardek-sesa jam duone freneziĝis. Li mortis mizere pro la sufero post kelkaj tagoj.



## 91. Avideco



Sinjoro Shen (Ŝen) famis pro sia malavareco. Li preferis morti ol marĉandi. "Kio gravas, ke mi elspezas monon senprudente? Nu, mono ja estas destinita por elspezi, kaj kiamaniere elspezi ĝin ja estas tute egale." Li ĉiam tiel opiniis.

Same kiel multaj ĉinoj, li ŝatis manĝi kaj festeni. Oni diris, ke li povas manĝi "ĉion du-kruran krom siajn gepatrojn, kaj ĉion kvar-kruran krom litojn kaj seĝojn."

Ni parolu pri liaj litoj. Ĉu vi povus imagi tiel luksajn litojn? Ili estis delikate gravuritaj kaj supre pendis belega baldakeno. La litoj de Shen estis taŭgaj eĉ por reĝoj. Li kutime sin vestis per plej valoraj kaj plej belaj vestoj, kaj ĉiam postulis la plej bonkvalitajn objektojn por uzi.

Manĝado estis lia ĉefa hobbio. Por

la tri manĝoj ĉiutage li prenis cerbon de anasoj, pulmojn de ursoj, ŝarkajn naĝilojn, kamelan ĝibon, lipojn de simioj, kokaĵon, ranaĵon, cervajaĵon kaj ĉiujn aliajn rarajn kaj plej valorajn frandaĵojn, kiujn vi eĉ ne povas eldiri. En multaj jaroj, miloj da bestoj mortis pro lia frandemo.

Emeritiĝinte, li aĉetis palacosimilan etaĝdomon. En lia ĝardeno estis lagetoj kaj rojoj, kun pavilonoj por lia ripozo. Tie oni ne kapablis distingi, ĉu ili estas en la ĉielo aŭ sur la tero. Li dungis la plej bonan kuiriston por manĝaĵoj.

"Kiom longe oni povas vivi?" Shen kutime diris al la gastoj, "Kiam vi ĝuos la vivon se vi ne ĝuas nun? Kia vivo tio estus sen montaj kaj maraj bongustaĵoj sur la tablo?"


"Li suferos de sia malbona sekvo iutage," oni diris. Sed Shen tute ne zorgis pri tio.

Lia luksa vivo konsumis al li

grandan sumon, kaj lia havaĵo pli kaj pli malmultiĝis. Kaj krome, Shen komencis konduti kurioze. Li manĝis ĉion, kion li povis meti en la buŝon. Ne nur pladoj preparitaj de la kuiristoj, sed ankaŭ folioj, branĉoj, ŝtonoj, eluzitaj ŝuoj, rubo, birda fekaĵo kaj eĉ tetaso iris en lian buŝon. Li maĉis kaj englutis ĉion en la buŝo. Nelonge poste, li mortis de sia avideco.

Ĉu lia vivo ne finiĝis malfeliĉe?





## 92. Feliĉa homo



Iutage en printempo, Wang Liangbin (Uan Ljanbin) alvenigis sian servanton.

"Kiom da helikoj vi aĉetis?" "100 kilogramojn, Sinjoro." "Ĉu ankaŭ birdojn?"

"Jes, sinjoro, pli ol sesdek." "Ĉu vi havis sufiĉan monon?" "Jes, Sinjoro."

Wang neniam elspezis multe por si mem. Li estis ŝparema kaj vivis simple. Li elspezis plejparton de sia mono aĉetante bestojn por liberigi.

Okaze de lia naskiĝtago, liaj lernantoj volis okazigi festenon por li. Kiam li informiĝis pri tio, li proponis al ili: "Se vi volas favori min, uzu la festenan monon por aĉeti bestojn kaj liberigi ilin. Tio estos la plej bona donaco por mia naskiĝtago."

Ĉiuj liaj lernantoj estis emociitaj, kaj ili agis laŭ lia propono.

Tiujare li savis bestojn duoble pli multe ol kutime.


Post kelkaj jaroj, bubalo de lia najbaro estis tro maljuna por labori kaj ĝia mastro decidis vendi ĝin al buĉisto. La bubalo eble sciis, ke venos ĝia fino, ĝi do forkuris de sia mastro kaj rekte iris al Wang Liangbin. Ĝi genuiĝis antaŭ li por peti lian helpon.

Wang kolektis sufiĉan monon, aĉetis ĝin kaj prizorgis ĝin dum ĝia resta vivo.

La infanoj lernas tre rapide de siaj gepatroj eĉ sen instruado. Wang estis ĉiam bonkora al la aliaj, tial liaj infanoj ankaŭ lernis bonkorecon. Wang ĉiam faris sian laboron atenteme, kaj liaj infanoj ankaŭ faris la siajn atenteme. Ili obeis al siaj gepatroj kaj lernis tre diligente. Poste ili gajnis altan pozicion en la kortego kun grandaj gloro kaj honoro al la tuta familio.

Wang Liangbin havis longan,

pacan kaj feliĉan vivon. Li forpasis sen ajna doloro aŭ malkomforto. Post la morto li aspektis ankoraŭ tiel paca kaj kvieta, kiel meditanta bonzo.



## 93. Vojaĝo al la ĉielo



Gu Shunzhi (Gu Ŝunĝi) estis vegetarano. Li vivis en Changshu-urbo (Ĉanŝu), Jiangsu-provinco (Ĝjansu). Li neniam manĝis viandon kaj kvin fiodorajn legomojn (ajlon, poreon, cepon, ŝenoprazon kaj asafetidon). Iunokte li enlitiĝis kiel kutime sed ne plu vekiĝis en la sekva mateno. Liaj familianoj maltrankviliĝis pro tio. Li daŭre spiradis normale, do ili sciis bone, ke li ankoraŭ vivas. Sed li nur dormadis. Li dormis sep tagojn sinsekve.

"Kio okazis al vi?" oni demandis lin kiam li vekiĝis.

"Ha! Mi havis feliĉan tempon! Kiam mi enlitiĝis, iu vokis min. Divenu, kiu li estas?"

"Kolektisto de imposto?"

"Ne, tute ne. Estas Majstro Daguang (Dagŭan), mia plej estimata

majstro. Li proponis: 'Sinjoro Gu, ni aŭskultu darman predikadon.' Certe, mi konsentis, kaj ni tuj eliris."

"Ni atingis grandan monaĥejon. Ĝi estas tre majesta! Mi neniam vidis tiel majestan monaĥejon. Mi tute ne kapablas trovi taŭgajn vortojn por priskribi ĝian majestecon. Kiam ni eniris, jam estis multaj homoj aŭskultantaj sutrojn. En la antaŭa halo oni predikis La Diamantan Sutron, kaj en la posta halo oni predikis La Dankeman Sutron."

"Ni iris aŭskulti la Dankeman Sutron. Kiam la majstro finis la predikadon, li atentigis, ke ni neniam mortigu vivestaĵojn, precipe por manĝi. Tiel ni povos gajni grandan meriton al niaj gepatroj kaj ankaŭ povos kompensi nian propran malbonan karmon."

"Li ankaŭ diris, ke vegetaranoj povas koncentri sian menson multe pli facile, kaj povas sin teni al sia

principo pli bone ol tiuj, kiuj manĝas viandon."

"Poste, Majstro Daguang kondukis min al alia loko. Vere timige! La unua objekto, kiun mi vidis, estis laĝeto de sango."

"Tiam mi vidis, ke ploras kaj ĝemas virino kuŝanta en la sanga laĝeto. Ŝia korpo estis kovrita de helikoj kaj lumbrikoj. Mi opiniis, ke ili manĝas ŝian karnon."

"'Kio estas tio?' mi demandis."

"Majstro Daguang eksplikis: 'Vi estas vegetarano kaj faris multajn bonojn, do via nuna patrino estis jam savita. Sed tiu ĉi estis via patrino de unu el viaj antaŭaj vivoj. Ŝi kutime manĝis anasojn. Jen la rezulto de tio. Vi povas savi ankaŭ ŝin. Ĉantu La Grandan Kompateman Mantron kaj La Purlandan Mantron, kaj poste ŝi estos savita el la suferego.'"

"Fine, Majstro Daguang kondukis min hejmen. Mi tute ne imagis, ke mi



dormis tiel longe."

Gu komencis reciti la Grandan Kompateman Mantron de Bodisatvo Avalokiteŝvaro kaj La Purlandan Mantron de Budho Amitabo.

Se vi volas lerni ilin, petu budhisan monaĥon aŭ monaĥinon por instrui vin. La Granda Kompatema Mantra estas sufiĉe longa, sed La Purlanda Mantra estas multe pli mallonga.

Se ambaŭ mantroj estas ankoraŭ tro longaj por vi, aŭ se vi trovas nenium por instrui vin, nur recitu la nomon de Avalokiteŝvaro aŭ Amitabo. Tio estas same bona kaj efika.

Estos des pli bone, se vi povos fariĝi pura vegetarano same kiel sinjoro Gu.



## 94. Reviviĝo el morto



En malhela lamplumo, malsanulo tordiĝis kaj turniĝis en pura lito. Li ĝemis kaj ambaŭmane premis la maldekstran parton de sia ventro: "Dolore! Dolorege!"

Liaj familianoj aŭdis lian ĝemon kaj murmuron, tamen ili ne povis distingi klare, kion li diras. La malsanulo subite trovis, ke li forlasis la liton. Anstataŭ piediri, li kvazaŭ ŝvebis alten en la ĉielon. Li ne sciis, kio levas lin, tamen li leviĝis tiel alten ke li eĉ sentis teruron.

Post nelonge li atingis palacon malluman kaj humidan. La palacaj gardistoj aspektis kiel demonoj. Kiam ili vidis lian alvenon, ili alpaŝis kaj puŝis lin en la palacon. Nur tiam li eksciis, ke li estas en la juĝejo de la alia mondo.

Li vidis potenculon kun krono sur

la kapo. La majesteco de la potenculo povis vekti timon de ĉiuj homoj. Ĉe la potenculo sidis juĝisto.

La potenculo ekparolis. Lia voĉo sonis kiel tondro ruliĝanta de la montdeklivo: "Ĉu vi scias, ke jam venis la tempo por via fino? Vi ankaŭ scias, ke via avo mortis pro la sama liena malsano, ĉu ne?"

La malsanulo ne povis vorti pro timo.

"Meng Zhaoxiang (Men Ĝaŭŝjan)!" Aŭdinte sian nomon, la malsanulo ektremis. "Kiam via avo vivis, li mortigis multajn vivestaĵojn kaj pro tio li havigis al si malbonan destinon. Vi iam faris iom da bonfaro, do ni kredas, ke vi povos fari kompenson kontraŭ viaj antaŭaj malbonaj agoj. Ni donu al vi ŝancon por tio."

"Ni plilongigos vian vivon je kelkaj jaroj por vidi, kiel vi kondutos. Memoru miajn vortojn. Mortigu

neniom plue, por ke vi ne estu mortigita. Lasu la vivestaĵojn liberaj, kiel ni lasos vin libera hodiaŭ."

"Diru al aliaj, kion vi vidas ĉi tie, por ke ili sciu pri la kosto de krimo, kiun kaŭzis ilia mortigado, kaj ankaŭ por ke ili kompensu sian krimon. Tiel vi povos likvidi la antaŭan malbonan destinon. Ĉu vi komprenas bone?"

Meng povis fari nenion alian ol kapjesi senpense. Li kvazaŭ denove ŝvebis en la nubon, kaj iom post iom sin trovis en la lito kun siaj familianoj ĉirkaŭe. Lia lieno ne plu doloris al li. Liaj familianoj surpriziĝis kiam ili vidis, ke li ellitiĝas kaj iras rekte al la statuo de Budho. Tie li ĵuris, ke li ne plu mortigos vivestaĵojn.

Li kondukis vere bone laŭ sia promeso. Li verkis pri la okazaĵo, presis broŝurojn kaj donacis al ĉiuj por legi.

Lia vivo ne finiĝis tiam. Li vivis pli longe.

En maljuna aĝo, li eĉ fariĝis fama  
oficisto.



## 95. Vortoj de saĝulo



Banditoj denove atakis Fuyang-gubernion (Fujan). Ĉi-foje, ili prirabis dekojn da homoj, kaj dehakis iliajn kapon kaj manojn. Ĉiuj estis timigitaj de la sovaĝa konduto.

Inundo okazis en Xiangyang-gubernio (Ŝjanjan). Centoj da homoj malaperis en la akvo dumnokte. La loĝantoj perdis ĉion kaj havis nenian lokon por iri. Sed ili estis feliĉaj, ke la inundo nek englutis nek forportis ilin.

Kiel loka oficisto, Li Peide (Li Pejde) sentis, ke li devas ion fari kontraŭ la suferoj de la popolanoj. Kiel bonkorulo, li sentis bedaŭron por ĉiuj malfeliĉaj homoj. Kiel laika taŭisto, li volis eltrovi, kio estas la kaŭzo de ĉiuj malfeliĉaĵoj.

"Neniu scias pri tio krom mia instruisto, la granda sorĉisto Lin." Kiam li havis ŝancon, li iris al Dufea-



templo por viziti sian instruiston. Kiam li atingis la templon, la sorĉisto sidis meditante por ekzerce plialtigi siajn povojn.

Kiam li eniris, la sorĉisto bonvenigis lin. Li demandis: "Instruisto, mi volas peti informon pri la kaŭzo de ĉiuj malfeliĉaĵoj, kiuj okazis en nia regiono. La banditoj venis kiel koleraĵoj. Ili mortigis homojn kaj forbruligis ĉion. Inundoj detruis la fruktojn de nia longjara laborado. Diru al mi pri tio, Instruisto!"

"Mi malofte forlasas la templon," diris la instruisto, "kaj mi ne scias multe pri la nunaj aferoj."

"Sed pro kio ĉiuj suferas de tiel timigaj okazaĵoj?"


La sorĉisto faris longan suspiron: "Ili rikoltas kion ili semis. Homoj estas avidaj kaj kruelaj. Ili pensas nur pri sia propra ventro. Ili mortigas kaj mangâs vivestaĵojn kiel mangâĵon."

"La mortigitaj vivestaĵoj estis kolerplenaj. Kiam multe da malamo akumuliĝis, tio perturbis la naturan pacon. Do la ĉielo rompiĝis kaj la akvo torentis al la tero. Krome, iuj vivestaĵoj renaskiĝis kiel homoj, kaj ili mortigis kaj prirabis venĝe por tio, kion oni iam faris kontraŭ ili."

"Neniu povas fuĝi de la natura prijuĝado. Tiuj, kiuj faras malbonon, ricevos fatalaĵon al si mem kaj al sia familio. Tiuj, kiuj kondutas kontraŭ la natura leĝo, rikoltos malfeliĉan frukton."

Kvankam la rakonto okazis centojn da jaroj antaŭe, tamen ĝi estas precipe grava por ni, kiuj vivas en la 21-a jarcento. Florido estis atakita de tajfunoj kaj tornadoj. Kalifornio estas frekventata de tertremoj kaj inundoj post la sekeco. En la regionoj de la tuta lando ŝtormoj damaĝis ĉies havaĵojn, kaj pro tio, miloj da homoj perdis sian hejmon.

Ni devas obei la antikvajn saĝulojn kaj atenti, kion ni ne faru kontraŭ la naturo. Mortigo, volupto, perforto, drogo, samseksaĵo, fanatika muziko, drinkado kaj senbrida seksaĵo ja fariĝas amuzajoj por modernaj junuloj. Ĉu ni povas revii, ke la naturo tolerus nin?



## 96. Dankemo de ranidoj



Zhang Zuozhi (Ĝan Zŭoĝi) estis guberniestro de Shaoxing (Ŝaŭŝjin), Zhejiang-provinco (Ĝeĝjan). Iutage li eliris por inspektado. Apenaŭ li trapasis rizkampon, miloj da ranidoj sturmis al la vojo. Ili tordiĝis kaj levis la kapon por rigardi lin.

"Vere strange! Ŝajnas, ke ili havas ion por raporti," diris Zhang (Ĝan) al la sekretario.

"Jes. Ŝajnas, ke ili ploras."

Zhang decidis fari enketon. Li iris el sia portseĝo. Vidinte tion, la ranidoj ekscitiĝis, eknagiĝis al iu direkto, kaj haltis je futoj por retrorigardi, kvazaŭ ili gvidus la vojon.

"Ja des pli strange," pensis Zhang kiam li piediris tra la rizkampo sekvante la ranidojn. Subite li haltis surprizite. Tri viroj kuŝis en la akvo de la rizkampo!

Zhang tuj eltiris sian spadon. Estis neni alia en lia vidkampo. Li do ekpririgardis la kadavrojn atenteme.

"Jen, Via Moŝto!" kriis la sekretario, "Unu el ili ankoraŭ vivas!"

Zhang estis forta. Anstataŭ atendi alies helpon, li formovis du kadavrojn kaj portis la trian viron al la rando de la kampo. La viro ankoraŭ havis spiron, sed lia koro batis malforte.

"Feliĉe, ni venis ĝustatempe. Alie, li perdos sian vivon."

Zhang ordonis, ke oni alportu varman akvon. Post nelonge, la viro reviviĝis. Li dankis Zhang elkore, sed al Zhang pli interesis la okazaĵo.

"Mi entreprenis malgrandan lombardejon," la viktimo diris al li. "Mi estis sur la vojo al mia hejmo kolektinte elpruntitan monon. Mi vidis du virojn antaŭ mi irantajn al bazaro. Ĝuste ili ambaŭ! Mi demandis, kion ili vendos, kaj ili respondis, ke ili havas freŝajn ranidojn por vendi. Iuj

ŝatas manĝi ranidojn, Via Honoro scias bone."

"Sed, mi estas budhano. Do mi ne toleras lasi bestojn mortigitaj por manĝi, kaj ĉiam ŝatas liberigi ilin. Mi havis iom da mono, mi do faris negocon kun ili. Mi petis ilin vendi siajn ranidojn al mi, por ke mi liberigu ilin."

"Ili respondis: 'Bone, sed la akvo ĉi tie estas malprofunda. Se vi liberigos la ranidojn ĉi tie, oni povos kapti ilin refoje. Estas lageto tie en la arbaro. Ni liberigu ilin en sekura loko.'"

"Sed ni tute ne atendis, ke du rabistoj jam vidis min kolekti monon kaj sekvis min. Antaŭ ol ni atingis la lageton, ili subite atakis nin per hakiloj. Mi nur scias tiom, Via Honoro."

Zhang diris: "Eble ili mortigis ambaŭ virojn por eviti atestantojn. Kiam okazis la akcidento?"

"Antaŭ nelonge, Via Honoro."

"Do la rabistoj estas ankoraŭ ne malproksimaj!" Zhang dissendis siajn subulojn, kaj ili baldaŭ kaptis la rabistojn. Zhang redonis la monon al la komercisto, kaj kondamnis la rabistojn pro la prirabado kaj murdo.

Zhang neniam forgesis, ke ankaŭ ranidoj amas sian vivon, kaj eĉ scipovas esprimi sian dankon al la savinto!





## 97. Savinto de maljuna kokino



Dum feliĉa intervidiĝo, la gastiganto diris al Lian Yucheng (Ljan Juĉen), "Mi vere ĝojas, ke vi nin vizitas irinte tiel longan vojon. Mi preparos specialan festenon por nia kuniĝo!"

Lian (Ljan) respondis: "Vi ne bezonas tiel agi por parenco kiel mi. Mi ja ne estas reĝa oficisto aŭ iu simila."

Alia parenco diris: "Ni havas kokinon grandan kaj dikan. Ni mortigu ĝin morgaŭ."

Lian tute ne deziris la abundan festenon. Kaj krome, li sentis bedaŭron por la kokino, do li elpensis pretekston: "Mi manĝas nur vegetarajn manĝaĵojn je certaj datoj, kaj morgaŭ estos la dato por mia fasto. Mi petas, ke vi ne mortigu la kokinon por mi."

Via sincereco en mia koro estas multe pli kara ol la kokino en mia ventro."

"Bone. Se vi insistas, ni ĉiuj manĝu vegetarajn manĝaĵojn morgaŭ," konsentis lia parenco.

Post la intervidiĝo, estis tempo por Lian Yucheng adiaŭi kaj reveni hejmen. Sur la vojo al la hejmo, li atingis riveregon kaj devis transpasi ĝin per boato.

Li tute ne atendis, ke apenaŭ li enboatiĝis, maljunulo kun longa blanka barbo fingre montris lin kaj kriis sur la bordo: "Estas mensogulo en la boato! Li diris, ke li estas vegetarano, tamen li tute ne estas tia! Ne portu lin trans la riveron per via boato!"

Aŭdinte tion, la homoj en la boato komencis demandi, kiu estas la mensogulo. Fine, Lian konfesis: "Mi faris mensogon ne malican, kaj al neniu alia mi intencis damaĝi." Sed oni nek zorgis pri lia motivo, nek volis

lasi lin resti en la boato pli longe. Do per puŝo kaj treno, ili elboatigis lin, kaj ĵetis lian pakaĵon sur la bordon. Post tio, ili ekveturis.

Lian koleris pro tio. Li decidis retrovi la maljunulon por demandi, pro kio li intervenis en lian aferon. Sed estis kurioze, ke li neniel trovis la maljunulon. Li do povis fari nenion alian ol sidi ĉe la pakaĵo sur la bordo vane rigardante la boaton malproksimiĝantan.

Post nelonge subite okazis forta ŝtormo. La boato sinkis anstataŭ atingi la transan bordon, kaj ĉiuj pasaĝeroj dronis.

Lian neniam supozis, ke li savos sian propran vivon pro la maljuna kokino.



## 98. Mesaĝo sendita de testudo



Dum la kvina jardeko de la deknaŭa jarcento okazis tumulto en Taiwan (Tajŭan). La imperiestro ordonis Xu Shuren (Ŝju Ŝuĵen) gvidi armeon por kvietigi la tumulton. Tang Yi'an (Tan Ji'an) estis sendita kune kun li. Tang maltrankviliĝis pri sia frato, kiu gvidis armeon en Xiamen (Ŝjamen) sur la ĉeflando, trans Taiwan-markolo. Sed la komunikado estis tre malfacila, precipe dum la milita periodo, do estis preskaŭ neeble komuniki per leteroj.

Iutage, kvar fiŝistoj alportis grandan testudon por vendi. Ĝi estis tre granda kaj la prezo estis sufiĉe alta. La subuloj de Tang volis aĉeti ĝin, sed ne kapablis pagi tiom, kiom postulis la fiŝistoj.

La fiŝistoj petis sinjorinon Tang aĉeti, sed ŝi opiniis, ke la prezo estas

tro alta. Apenaŭ la fiŝistoj pretis forporti la testudon, sinjorino Tang rimarkis, ke ĝi rigardas ŝin kun malĝoja esprimo. Ĝi eĉ larmis. Ŝi sentis bedaŭron por ĝi, kaj tuj aĉetis ĝin malgraŭ la alta prezo. Ŝi informis sian edzon pri tio kaj li decidis liberigi ĝin en la maron en la sekva tago.

La testudo estis tiel granda, ke necesis kvar viroj por porti ĝin, sed kiam Tang hazarde movis ĝin en la sekva mateno, li trovis, ke ĝi estas tiel malpeza, ke li povas porti ĝin per si mem.

"Ĝi estas neordinara testudo," li pensis. Li mense diris al la testudo: "Mi kredas, ke vi estas supernatura testudo. Ĉu vi estas tia aŭ ne, mi liberigos vin en la maron hodiaŭ, en la oka de la naŭa monato. Mi dankas vin, se vi havas magian povon kaj povas fari mian fraton gvidantan armeon en Xiamen skribi leteron al mi. Ĉu vi komprenas?"

Dirinte, li liberigis la testudon.


Ĝi aspektis feliĉa en la akvo! Ĝi sin amuzis laŭplaĉe en la ondoj. Antaŭ ol fornaĝi, ĝi retrorigardis kaj kapklinis al Tang trifoje, kvazaŭ dirante adiaŭon.

Monaton poste, Tang Yi'an ricevis leteron de sia frato, kiu skribis, ke ĉio estas bona ĉe li. La letero datiĝis ĝuste en la oka de la naŭa monato.

Ĉu tio estis koincido aŭ tio, ke la testudo komprenis la vortojn de Tang kaj portis la mesaĝon al lia frato? Eble tio estis danko de la testudo.

Ambaŭ fratoj Tang faris grandan kontribuon al sia lando en la malfacila tempo, kaj ili spertis multe da bataloj kaj havis multe da milita gloro. Poste, ili retiriĝis kaj vivis kviete en sia resta tempo. Ili ofte rakontis sian historion al la najbaroj, por atentigi ilin, ke ankaŭ bestoj amas sian vivon kaj per helpo al la bestoj iam oni povos helpi sin mem.





## 99. Senrankoriĝo per budhismo



"Strange!" demandis Yin Anren (Jin Anĵen) al siaj familianoj, "Kiu mortigis nian azenon?"

"Kio?"

"Iu mortigis nian azenon kaj postlasis la felon en la korto."

Ili eliris por esplori.

"Ŝajnas, ke iu manĝis la viandon kaj postlasis la felon." Ili koleriĝis. Ĝi ja estis tre bona azeno.

Unu aŭ du jarojn poste, iu renkontis Yin sur la strato kaj diris al li: "Venos via fino. Lakeoj de la anima mondo venos al vi morgaŭ." Dirinte, li malaperis en la aeron.

Yin tuj estis trafita de timego. Li konis kelkajn monaĥojn en Cimenmonaĥejo, li do iris rekte en la monaĥejo kaj sidiĝis en la ĉefhalo. Anstataŭ reveni hejmen, li pasigis

la tutan nokton senĉese kultante, kaj recitante sutrojn kaj nomon de Amitabo.

Vere, en la sekva mateno li vidis dekojn da demonoj, kiuj venis kun lancoj, spadoj kaj halebardoj por kapti lin. Ili staris ekster la monaĥejo kaj kriis: "Tuj elvenu!" Yin Anren ne zorgis pri ili, sed senĉese recitis sutrojn.

Iu el la demonoj plendis: "Mi jam diris al vi, ke ni devus kapti lin hieraŭ. Nun li recitas sutrojn tie, kaj ni kapablas fari nenion kontraŭ li." Kiam Yin Anren aŭdis tion, liaj haroj stariĝis. Li sin okupis pri la recitado tutkore. La demonoj interkonsiliĝis. Poste, ili foriris por kapti aliajn animojn, lasante unu demonon ĉe la pordo por kapti Yin Anren tuj post lia eliro.

Post nelonge, la gardanta demono diris: "Jen! Kial vi ne elvenu pace sen kontraŭstaro? Tio estus bona al

ni ambaŭ. Ni persone havas nenian malamon kontraŭ vi. Ni nur plenumas nian taskon."

"Jen la problemo: la azeno mortigita de vi akuzis vin, do ni devas kapti vin por la prijuĝado. Pardonu, homo, tio ja estas nia devo."

"Demandu miajn familianojn!" Yin Anren respondis: "La kompatindan azenon mortigis ne mi! Aliulo faris tion kaj postlasis la felon en mia korto. Mi estas senkulpa!"

"Raportu tion al la juĝisto."


"Do, ni tiel agu. Mi ĉantu sutrojn kaj okazigu budhismajn ceremoniojn por favori al mia estinta azeno. Se mi mortus, mi ne povus tion plenumi. Ĉu vi bonvolas iri kaj peti la azenon por tio?"

"Bone. Mi iros vidi, kion mi povas fari. Se la azeno ne konsentos, ni denove revenos morgaŭ por kapti vin. Estos malbone por vi kaŝi vin ĉi tie. Tamen, se ni ne venos morgaŭ, tio

signifas, ke ĝi jam konsentis." Dirinte, la demono malaperis kiel fulmo.

En la sekva tago Yin Anren estis tre maltrankvila kvazaŭ sidante sur pingloj, sed la demonoj ne plu vidiĝis. Li recitis sutrojn kaj okazigis ceremoniojn por liberigi la azenon el sufero.

Estis plej bone, ke Yin Anren havis gravan lecionon. Li komprenis, ke ĉiuj vivestaĵoj amas sian vivon. Ekde tiam, li kaj lia tuta familio ne plu manĝis viandon.



## 100. Plej bona donaco



La dek-dua ĉapitro de Saĝo-malsaĝo-Sutro (Damamuka-nidana) rakontis, ke monaĥo praktikis meditado en arbaro proksima kiam nia budho Ŝakjamunio estis en Ŝravastio. Tie li ankaŭ recitis sutrojn. Lia voĉo estis tre belsona, do lia recitado eĉ plaĉis al la birdoj kaj bestoj.

Malgranda birdo precipe ŝatis lian recitadon. Kiam ajn la bonzo recitis sutrojn, ĝi ĉiam sidis sur la proksima branĉo kaj aŭskultis atente.

Iutage, kiam la birdeto absorbiĝis en la sutro, ĉasisto trafis ĝin. Sed post la morto ĝi tuj iris en la ĉielon kaj renaskiĝis kiel glora ĉielulo pro la merito aŭskulti sutrojn. La ĉielulo havis magian povon rememori sian antaŭan vivon. Konsciinte pri la kaŭzo de sia naskiĝo en la ĉielo, li

portis ĉielajn florojn kaj ŝutis ilin al la monaĥo recitanta la sutrojn en la arbaro. Poste, li genue kliniĝis al la monaĥo por esprimi siajn elkorajn dankon kaj estimon.

La monaĥo surpriziĝis kiam li vidis la ĉielulon esprimantan sian respekton al li, la mortulo. Li do demandis pri la kaŭzo. Kiam li trovis, ke tiu iam estis lia malgranda aŭskultanto, li ĝojis pro tio. Li donis al sia aŭskultanto donacon plej bonan — donacon de saĝo. Li instruis la ĉielulon pri la vero de la universo, alivorte, pri tio, kion ni nomas Budha Darma.

La ĉielulo ĝojegis pro tiel bona donaco. Pro la nova saĝo, li progresis rapide kaj reiris al la ĉielo por daŭrigi sian lernadon.





## Postskribo



Ni esperas, ke vi jam ĝuis la rakontojn en la libro. Iuj el ili estas vere antikvaj — Cheng Tang (Ĉen Tan) en la tria rakonto vivis pli ol trimil jarojn antaŭe. Vi jam legis pri la lokoj, kiujn vi neniam aŭdis, kaj pri la ideoj, kiujn vi neniam havis antaŭe. Eble vi pensis: "Ĉu vere troviĝas Draka Imperiestro en la mondo?" Multaj el tiaj rakontoj estas konataj al ĉinoj, sed ŝajnas tre fremdaj al vi.

Eble vi iam savis birdon falintan el sia nesto. Leginte la libron, vi pensus: "Pro kio mi ankoraŭ ne ricevas la rekompencon?"

Sciu, ke la rekompencoj gajnitaj de la bonkoraj homoj en la libro estis gravaj aferoj en la homa vivo: saĝo, scio, bonfarto kaj feliĉo. Estas ne eble por vi trovi oran minejon pro la insekto, kiun vi ne piedpremis. Vi

devas pensi laŭ la maniero pri kiu temas sube.

La rakontoj legitaj de vi ankoraŭ ne estis rakontitaj en Esperanto antaŭe. La okcidentanoj tute ne havas tian ideon. Legi tiun ĉi libron estas rara bonŝanco por vi, unu el miliardoj da homoj en la mondo. Tio estas bonega ŝanco, kaj eble estas la rekompenco por via bona konduto. Do bone ĝuu la raran bonŝancon!

Eble vi neniam savis vivestaĵojn el danĝero. Do vi volus scii: "Kion mi faru por savi vivestaĵojn?"

Unue, vi devas scii, ke vi ne rajtas mortigi vivestaĵojn. Fiŝado kaj ĉasado estas teruraj hobioj, kaj tio kaŭzas katastrofojn al vi kaj viaj karuloj. Ne mortigu vivestaĵojn por amuziĝi.

Ankaŭ ne mortigu vivestaĵojn por manĝi. Nature la homoj estas vegetaraj manĝuloj. La plej terura mortiganto al homoj en Usono estas kora malsano. La usona Instituto de Koro, Sango kaj

Pulmo trovis, ke en 1989 usonanoj elspezis 151 miliardojn da dolaroj por kuraci korajn malsanojn. Oni jam pruvis la medicinan fakton, ke manĝi viandon kaŭzas korajn malsanojn.

La Usona Ĝenerala Kirurgo raportis, ke 68% de malsanoj en la lando rekte rilatas al la dietoj.

El ĉiu sep dolaroj elspezitaj en Usono, oni elspezis unu dolaron por kuracado.

Ho! Tio estas granda sumo. Mi diru al vi pli klare.

Multaj malsanoj en Usono hodiaŭ venas de viandaj manĝaĵoj. Vian sanon difektas la manĝado de viando, fiŝo, ovo, lakto, butero kaj fromaĝo.

Se vi estas malsana, vi devas elspezi multe da mono por kuracado.

Se vi ne estas malsana, vi tute ne bezonas konsumi monon por tio, vi do ŝparas la monon kaj... Jen! Tio signifas:

\* Se vi diris NE al bovaĵo kaj savis

vivon de bovo;

\* Se vi diris NE al porkaĵo kaj savis vivon de porko;

\* Se vi diris NE al kokaĵo kaj savis vivon de koko, vi jam gajnis rekompencan en kontanta mono!

Vi ŝparas la monon, kiun la viandmanĝuloj devas pagi al kuracistoj. Ĉu oni pagas multe al la kuracistoj? Pri tio demandu viajn gepatrojn.

Bone. Vi volas faktojn kaj ciferojn. Laŭ la statistiko de ekonomiistoj, ordinara tri-membra familio povas ŝpari 4000 dolarojn ĉiujare per vegetara manĝado, kaj ili ŝparos pli multe en longa tempo poste.

Ni akumulu la tutan sumon, jaron post jaro...

Tio estos granda riĉaĵo!

Nun ni ne nur parolu pri la mono. Ĉu plaĉas al vi malsano? Tio estas doloriga. Estas suferiga eĉ la ventrodoloro pro malsato, kiun vi

spertas antaŭ la vespermanĝo.

Kio estas la plej doloriga el ĉiuj malsanoj?

Eble kancero.

Ĉiujare mortas pli da homoj en Usono pro kancero ol tiuj, kiuj mortis dum la dua mondmilito, la korea milito kaj la vjetnama milito entute.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj de kancero estas manĝado de viando.

Simple, ju malpli da viando ni manĝas, des malpli ni suferos de kancero.

Kancero kaj kora malsano ne estas la nuraj problemoj. Longa kaj terura estas la listo de malsanoj, kiujn vi suferas pro manĝado de ovoj, laktaĵoj kaj mortintaj bestoj. Sed tio estas nur duono de la rakonto: Sufero de homoj.

Kiel suferas la kompatindaj bestoj mortigotaj por provizi la ingrediencojn por ĉiuj niaj malsanoj? Ĉu vi opinias, ke ili ĝuas tion?

La rakontoj en tiu ĉi libro okazis

antaŭ longa tempo en Azio. Kvankam la bestoj suferis multe kiam ili estis mortigataj, tamen tiam ili estis almenaŭ breditaj humane. Porkoj vivis en malpuraj porkejoj, sed ili havis almenaŭ iom da spaco. Bovoj vivis ekstere plejparte de la tago kaj laboris diligente, sed la kamparanoj ankaŭ tiel laboris. Kokidoj estis liberaj por serĉi manĝaĵon en rubo kune kun kokinoj.

Iuj el la kutimaj metodoj transporti ilin al bazaro estis kruelaj, tamen malgraŭ ĉio la bestoj ne suferis tro multe kiam ili vivis.

Tempo jam ŝanĝiĝis. Ĉu vi scias, kiel oni produktas viandon per moderna maniero? Terure!

Nun porkoj, bovoj kaj kortobirdoj estas malliberigitaj en laŭeble plej mallarĝa spaco kaj breditaj per nenaturaj manĝaĵoj. Iliaj idoj estas forprenitaj de la patrinoj. Multaj el ili eĉ ne povas trovi spacon por sin movi. Ili neniam povas vidi la sunlumon. Ili

estas breditaj per potencaj kemiaĵoj por rapida dikiĝo. Ĉiuj metodoj por breĉi la senkulpajn bestojn estas kruelaj kaj senkoraj.

Eĉ la plej senkoraj homoj ne toleras tuŝi pecon da viando, eĉ se ili scias nur duonon de la bestaj suferoj por produkti viandon en Usono — eĉ antaŭ la morto de la kompatindaj bestoj.

Estas multaj aliaj problemoj kaŭzitaj pro manĝado de produktoj el bestoj.

Ĉu vi jam aŭdis pri la malriĉuloj mortintaj pro malsato en aliaj partoj de la mondo? Iuj dirus: "Tre malbone, ke mankas greno al ili."

Tio ne estas vero. La kamparanoj en la nuna tempo produktas grenon pli multe ol la bezonon de ĉiuj homoj en la tuta mondo. Sed pro kio iuj homoj estas malsataj? Ĉar plejparto da grenoj estas forkonsumitaj de bovoj, porkoj kaj kortobirdoj por provizi viandon.



La produktantoj de viando bredas miliardojn da bestoj. La bestoj devas manĝi, ĉu ne? Se la viandproduktantoj foraĉetas ĉiujn grenojn por breedi la bestojn, malriĉaj homoj do havas neniom por manĝi.

Se la homoj en Usono manĝus malpli da viando je 10%, estus pli multe da greno por savi la malsatajn homojn en la nuna mondo.

Tero por dek kvin vegetaranoj nur povas vivteni unu viandmanĝanton. Alivorte, kiam vi manĝas viandon, vi kaŭzas malsaton al 15 homoj.

Alia problemo estas tio, ke la metodo produkti viandon difektas la ekologian sistemon. Se la ekologia sistemo estos difektita, ni ĉiuj perdos la vivon.

Se vi pensas, kiel riĉaj ni estos, kondiĉe ke ni nur manĝu grenojn kaj vegetalojn, eble vi ekkonscias, ke ni tute ne bezonas torturi kaj mortigi bestojn.

Sed ĉasi kaj manĝi viandon ne estas la nura metodo por mortigi bestojn.

Nenio pli incitas vin ol moskito zumanta ĉe viaj oreloj dum la nokto. Vi kutime mortigas ĝin.

Kio estas pli abomeninda ol blato paŝanta trans la planko? Vi kutime piedpremas ĝin.

Kion tiuj ĉi insektoj faras en la ĉambro? Ili sendas al vi mesaĝon. Blato estas kuriero por informi vin, ke via ĉambro estas ne sufiĉe pura. Se vi ne volas vidi blatojn, purigu kaj ordigu vian ĉambron por ke ili ne plu ĝenu vin.

Moskito estas alia kuriero por atentigi vin teni vian fenestran kulvualon firma.

Eble vi pensas: "Mi scias kion fari kontraŭ tiuj kurieroj. Mi mortigu ilin per efika insekticido. Ili scios, kiu estas la vera mastro en tiu ĉi loko!"

Hodiaŭ per insekticido oni povas

mortigi la insektojn, sed kiu suferos de tio en la longa tempo poste? Vi, mi, ni ĉiuj.

Insekticido estas forta veneno por mortigi la insektojn. Produkti venenon poluas la medion. Kiam la venenoj estas ellasitaj, ili povas resti en la ĉirkaŭa medio kaj malsanigi nin.

Por unu dolaro da insekticido ŝprucigita de vi, ĉirkaŭ sep dolarojn vi devas elspezi por kuraci la damaĝojn de viaj korpo kaj medio.

Nun ni ne parolu pri dioj aperantaj en la sonĝoj de malproksimaj ĉinoj antaŭ centoj da jaroj. Ĉi tie ni parolu pri nia nuna tempo.

Se vi manĝas korpojn de mortintaj bestoj, vi suferos de: kancero, kormalsano, renaj problemoj kaj dekoj da aliaj malsanoj.

Esploru per vi mem.

\* Se vi manĝas mortintajn bestojn, vi devos elspezi multe da mono por viziti kuracistojn kaj aĉeti medikamentojn.

\* Se vi manĝas viandon, fiŝojn, ovojn aŭ laktaĵojn, vi kaŭzas suferon al multaj bestoj.

\* Se vi manĝas viandon, vi konsumas kiel porko pli da manĝaĵo kaj kaŭzas malsategon al pli multaj homoj.

\* Se vi manĝas viandon aŭ uzas insekticidon, vi helpas difekti la medion, en kiu ni vivas.

Ĉu tio havas signifon? Vi devas akcepti la fakton eĉ sen profunda diskuto pri la natura ekvilibro aŭ la natura leĝo, kiun ni nomas darmo.

Mortigi bestojn estas ago kontraŭ la naturo.

"Leonoj kaj tigroj mortigas ĉiutage, ĉu ne? Do mortigo estas natura, ĉu ne?"

Jes, leonoj kaj tigroj mortigas. Sed eble estas ne malbone por vi ekzameni vin mem, se vi neniam pensis pri tio antaŭe.

Ĉu vi havas voston kiel leono? Ĉu

vi havas striojn kiel tigro? Ĉu vi havas grandajn, pintajn dentojn kaj fortajn ungojn?

Ne. Kion vi havas? Inteligentecon, multe da inteligenteco, tial vi povas paroli, legi, skribi kaj pensi, anstataŭ nur mordi kaj grati. Vi devas uzi vian inteligentecon por disvolvi saĝon.

Se vi retrorigardas la homaran historion atente, vi povas vidi klare, ke ni pli kaj pli uzas nian saĝon ol nian forton.

Se homoj antaŭ miloj da jaroj volis movi grandan ŝtonon, ili devis kunvenigi grupon da homoj kaj laboris kun krioj ĝis ili movis ĝin sukcese.

Poste, kiam oni lernis iom pri la fundamenta fiziko, la ŝtonegon povis movi nur unu homo, kiu scias kiel uzi levilon. Sed tio ankoraŭ bezonis ŝvitigan forton.

Nun se ni volas movi tiun ŝtonegon, ni havas maŝinojn. Se ni

scias kiun butonon premi, ni povas movi la ŝtonegon sen granda forto.

Tio okazas ĉar ni uzas nian menson, sed ne nur nian korpon.

Alivorte, ni fariĝas pli kaj pli kapablaj. Tio estas bona, sed ankoraŭ ne sufiĉa. La fina rezulto de la homaraj klopodo kaj evoluado dum milionoj da jaroj estas ne pasigi nian vivon nur por elfosi ŝtonojn, rigardi televidon aŭ amuziĝi per ludiloj.

Ni ne plu estas sovaĝaj bestoj en ĝangaloj. Ni estas civilizitoj kaj devas kondukti civilize. Kiam ni kreskas, ni forĵetas niajn pupojn kaj kolerŝtormojn; kiam nia racio disvolviĝas, ni devas forlasi nian sovaĝan manieron kaj disvolvi nian menson.

Iuj diris: "Jes, sed leono estas besto granda, forta kaj potenca. Ĉu vere?"

Ĉu leono estas vere tre forta? Ĉu vi aŭdis, ke leono povas muĝi tiel

laŭte kiel laŭtparolilo, kuras tiel rapide kiel trajno, tranĉas tiel profunde kiel segilo, aŭ piedpremas tiel forte kiel premaŝino? Tiuj fortaj maŝinoj estas produktaĵoj de nia inteligenteco. Homa inteligenteco estas pli granda ol la forto de bestoj.

Ni respektu leonojn, tigrojn, marporkojn, hundojn kaj ĉiujn aliajn bestojn; ni honoru ilian rajton por vivi; ni estimu ilian kontribuon al la ekosistemo, kaj plene kompatu ilin.

Leono eble havas fortan korpon, kaj ĝi eble havas iom da inteligenteco, sed la tragedio de leono kaj ĉiuj aliaj bestoj estas tio, ke ili estas malsaĝaj. Ho, certe, kvankam ili povas komuniki unu al aliaj, kaj povas trejniĝi por ludi akrobataĵon, sed ili povas nek pensi multe kaj nek koncentri sian menson, tiel ili ne povas scii, kia estas la universo.

Tio estas tre grava misio de ni homaro kun pli granda inteligento. Ni

devas lerni, kio ni estas, kie ni estas kaj kiuj ni estas. Se ni ne scias tion, ĉiuj niaj inventaĵoj, urboj, monumentoj kaj scienco estos sensencaj.

Se ni ne scias, kie ni estas, kio ni estas, kaj kiuj ni estas, ni ne povas kompreni nin mem. Ni devas kompreni nin mem por konscii, kio estas la universo. Nur tiel ni povos liberigi nin el la sufero.

Se ni ne povas kompreni nin mem, ni devas suferi animmigradon de naskiĝo al morto, kaj de renaskiĝo al morto ĝis ni tute elliberiĝos el la ciklo. Vivo estas plena de tiel multaj suferoj, ke iam ni estas tro indiferentaj por konscii la plibonigeblecon de nia situacio. La metodo por plibonigi nian situacion estas disvolvi nian saĝon por koni la universon, liberigi nin el la animmigrado inter vivo kaj morto.

Ne nur bestoj, sed ankaŭ plej multe da homoj ne povas pensi sufiĉe pri tio. Se ni volas konscii kio estas la



universo, ni devas labori tre diligente por disvolvi saĝon. Saĝo estas la vojo al liberiĝo. Liberiĝo signifas liberigi nin el la suferoj. Por disvolvi saĝon, la unua farendajo estas ne plu meti obstaklojn por ni mem.

Por disvolvi saĝon, ni bezonas fortikan korpon kaj fortan menson.

Ĉu vi memoras la lastan fojon de via malsano? Vi ne povis viziti lernejon ĉar vi ne povis koncentri vian atenton en viaj lecionoj kiam via korpo estis en sufero. Same, se vi ne estas sana, via menso ne estas klara. Forta kaj sana korpo estas fundamento por forta kaj sana menso.

Fizika ekzerco faras nian korpon forta kaj sana, sed ankaŭ tre gravas la nutraĵo, kiun ni metas en nian korpon.

Se ni ŝarĝas nian korpon per viando el mortigitaj bestoj, ni difektas nian sanon. Se ni volas esti sanaj, ni devas fariĝi vegetaranoj.

Alia problemo estas tio, ke ni

rompas la naturan leĝon, kaj fine ni devos repagi al la bestoj se ni manĝas ilin. Estas pli facile ne rompi tiun leĝon, tiel ke ni ne metu multajn obstaklojn sur nian propran vojon.

Sed kiel ajn strebe ni laboras, estas tre malfacile liberigi nin mem el la suferado ol naĝi tra la Pacifika Oceano.

Jen kial Budho Amitabo sentis bedaŭron por ni kaj kreis Puran Landon aŭ Okcidentan Paradizon. En la Pura Lando, ni povos disvolvi nian saĝon sen sufero kutima sur la tero. Se ni volas iri tien, Amitabo bonvenigos nin kaj poste instruos nin kiel fariĝi budhoj.

Se ni volas iri tien, ni recitu Amitabon tutkore kaj tutanime. En ĝusta tempo, li alvenos por bonvenigi nin.

Alveninte tien, ni tuj liberiĝos el ciklo de naskiĝo kaj morto. Ni povos lerni kaj studi. Iutage ni povos libere

reveni al la homa mondo kiel budhoj  
por helpi ĉiujn suferantajn vivestaĵojn  
fariĝi budhoj.

Jen niaj elkoraj bondeziroj al vi:

Ni bondeziras al vi grandan  
feliĉon,

Ni bondeziras al vi bonan sanon,  
kaj Ni bondeziras al vi brilan  
saĝon!

AMITABO!

## Pri la esperanta traduko

Mi ekmemlernis Esperanton kune kun aliaj lingvoj antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj, sed poste ĉesigis la lingvajn lernadojn por ĉefe okupiĝi en la lernado de budhismo. Nur antaŭ kelkaj jaroj mi denove eklernis ĝin post kiam mi hazarde trovis, ke jam estas sufiĉe bona kondiĉo por lerni kaj praktiki Esperanton en la nuna tempo. Nelonge post mia refoja lernado, mi denove decidis esperantigi budhisman literaturajon plej plaĉan al mi.

Hazarda okazaĵo iniciatis mian tradukadon de antikva rakontaro en Ĉinio "Amo al Vivo". Kiam mi vivis en Zhejiang (Ĝeĝjan) provinco en la suda parto de Ĉinio, mi unuafoje iris kun miaj samideanoj al bazono de marbestoj por aĉeti elliberigotajn vivestaĵojn. Tian aktivadon monkontribuis budhanoj kaj ni kutime aĉetis kaj liberigis

bestojn laŭ iliaj deziroj. Kiel denaska nordano mi neniam imagis kiel dolore suferas tiel multaj maraj bestoj. Onia kruelaĵo mortigi vivestaĵojn estis vere terura. Sinkuraĝiginte, mi iris al la kompatindaj bestoj por beni ilin unu post alia per mantro. Tie mi vidis, ke la vendistoj de ranoj aplombe senhaŭtigas la ranojn kaj detranĉas iliajn antaŭajn membrojn. La suferantaj ranoj baraktis kaj saltetis senhelpe en la pelvego.

Ĉe la apuda stando iu fendigis angilojn de la kapo ĝis la vosto. Vere timige! Mi sentis, ke ankaŭ mia koro dolore sangas same kiel la kompatindaj akvuloj. Ne plu povante elteni la vidaĵon, mi revenis al miaj samideanoj, kiuj aĉetas serpentojn. En la vendejo de serpentoj amasiĝis grandaj kaĝoj plenaj de serpentoj longaj kaj dikaj, kiajn mi neniam vidis antaŭe. Interkonsentinte pri la prezo, la mastrino de la vendejo

ekkaptis serpentojn kaj metis ilin laŭvice en la sakojn pretigitajn de ni. Min mirigis la afero, ke la venenaj kaj ferocaj serpentoj estis tiel obeemaj en ŝia mano. Ŝi povis kapti kaj kurbigi ilin laŭplaĉe. La liberaj vendistoj el aliaj butikoj ankaŭ kolektiĝis por helpi en la laboro. Oni eĉ instigis min kapti serpentojn, sed mi rifuzis pro timo. Starante proksime, mi nur mense recitadis mantron por beni ilin. Mi elkore bondeziris, ke ili havu sekuran vivon en tiu ĉi vivo kaj ne plu renaskiĝu suferaj en la sekva. Tiam mi vidis ion neordinaran. La mastrino ĉiam evitis kapti la serpenton plej dikan kaj plej longan. La aliaj helpantoj demandis, kial ŝi ne kaptas ĝin. Ŝi respondis, ke per tiel granda serpento oni kutime enspezas pli multe. La aliaj atentigis, ke ŝi devas vendi ĝin, ĉar ni jam interkonsentis aĉeti la serpentojn senescepte en la tutaj kaĝoj per definitiva prezo. Kiam

ĉiuj aliaj serpentoj estis en niaj sakoĵ, ŝi restigis la plej grandan postulante pli da mono. Oni riproĉis ŝin, kaj finfine, ŝi povis fari nenion ol devigite elpreni la serpenton. Je la komenco la serpento restis obeema kaj senmova en ŝia mano. Post longa momento ŝi ŝanĝis sian opinion kaj anstataŭ meti ĝin en la sakon, ŝi provis remeti ĝin en la kaĝon. Ĝuste tiam la serpento levis sian kapon kaj subite atakis ŝin per mordo je ŝia mano. Premante la vundon per la alia mano, ŝi sukcese enkaĝigis la serpenton. Multaj rigardantoj kompatis la ribeleman estaĵon, kaj insultis ŝin por savi ĝin. Ŝi do povis fari nenion ol denove elpreni la serpenton kontraŭvole. Ŝi ne tuj metis ĝin en nian sakon, sed tenis ĝin senmove eble pro hezito ĉu ŝi vendu aŭ ne. Longa momento forpasis ĝis la serpento denove ŝin mordis. Piedbatante la teron pro doloro ŝi finfine metis ĝin en la sakon. Feliĉe la

kompatinda estaĵo saviĝis de la morto. Kvankam la okazaĵo daŭris nelonge, tamen ĝi ĉiam aperas en mia memoro. Ĉiuj vivestaĵoj amas sian propran vivon kiel ni amas la nian. Ili ankaŭ havas senton kaj humoron same kiel ni mem, sed nur ne kapablas sin esprimi al ni libere en homaj lingvoj. Kial mi ne faru ion por favori ilin des pli efike? Laŭ budhisma teorio, la militoj kaj konfliktoj estas kaŭzitaj de la mortigado al vivestaĵoj. Se oni mortigos malpli da vivestaĵoj, estos malpli da rankoro kaj ni havos pli da espero por la mondpaco. Do mi decidis elangligi la rakontojn pri amo al la vivestaĵoj okazintajn en antikva Ĉinio. Jen la deveno de mia traduko "Amo al Vivo".

